

MEFEI KÖNYVTÁR
ÁLLOMÁNYA

HUNGARA VIVO

4
1981
13,–Ft

ETERNE MODA,
ETERNE VALORA ESTAS
LA GOBLENO
Hungarocoop Budapest

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 4
(98)

ENHAVO

Mihalkov, G.: Aŭtuna promenado en Budapeŝto 122
Pri la utilo de Esperanto (Intervjuo kun C.*Lonati*) 124
D-ro *Gegesi Kiss,* P.: 100 jaroj de la Hungara Ruĝa Kruco (D-ro I. *Ferenczy*) 125
Szenes, I.: Oficejo de UEA en Budapeŝto (Intervjuo kun G. *Maertens*) 126
Mihalkov, G.: Amikeco tra jarcentoj 127
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 14. (*P.A.R.*) 128
Benczik, V.: Kulturo super karbotavoloj 130
De Kock, E.: Aspektoj de la Esperanta elizio 132
Benczik, V.: Por kio servas bildrakontoj? 136
Nemere, I.: Forgeso 138
Servi per grafikarto (Pri I. *Karkus*) 139
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 140
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
D-ro *László,* F.: Inĝeniero Pál Vásárhelyi 144
Szilágyi, F.: Tre moderna fabelo (Por komencantoj) 151
Ni ridu! 151
Recenzoj de V. *Goñŝtejn,* E. *Fenyvesi,* G. *Mihalkov* 153
Krucenigmo 157
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 157
Leterkesto 158
Korespondi deziras 158
Enhavtabelo 1980 159

Sur la titolpaĝo: Popoldomo de Tatabánya.
Foto: Rudolf *Szilvássy*

Aperas sen malfruo...

tiu ĉi numero de HV, kaj per tio realiĝis unu el la plej varmaj revoj de la Redakcio. Ni esperas, ke tiu ĝustatempa apero kontentigos ankaŭ niajn fidelajn legantojn, kiuj nun jam pli facile povos varbi novajn abonantojn inter siaj geamikoj-esperantistoj. Eksterlandanoj fakte jam povas eĉ komenci varbadon, ja la plimulto de la perantoj preferas ricevi la abonpagon por 1982 jam dum aŭgusto-septembro.

Tiu ĉi numero estas unuavice varia, ja la nombro de la tuŝitaj temoj estas pli granda ol kutime. Sur la sekva paĝo G. *Mihalkov* invitas vin promeni en Budapeŝto, ĝin sekvas intervjuo kun s-ro *Lonati,* ĝenerala sekretario de la Monda Organizo de Turismo. S-ro *Maertens,* prezidanto de UEA donis al ni intervjuon okaze de sia marta restado en Budapeŝto. Ni primemoras ankaŭ du jubileojn: la 1300-jaran de la bulgara ŝtato, kaj la 100-jaran de la Hungara Ruĝa Kruco.

Per la dekkvara daŭrigo finiĝas la serio «Jarcentoj de la hungara literaturo». Ni esperas, ke ĝi iom helpis kompreni la evoluprocezon de la hungara literaturo, kaj per la ricevitaj informoj oni pli facile intimiĝos kun la hungaraj literaturaĵoj.

Dupaĝa artikolo prezentas la centran ministan kulturdomon de la urbo Tatabánya. Tiu kulturdomo, familiare nomata «Popoldomo», fieras ankaŭ sur la frontpaĝo. Laboras en Tatabánya ankaŭ la grafikisto István *Karkus,* kiun ni prezentas en nia kutima belarta rubriko.

Edwin *de Kock* artikolas pri la aspektoj de la Esperanta elizio. Multaj kontraŭantoj de elizio surpriziĝas, kiom ofte eliziado fakte aperas eĉ en la plej ordinaraj prozaj tekstoj.

«Forgeso» sur la paĝo 138 estas specimeno el la baldaŭ aperonta novelaro «La naŭa kanalo» de István *Nemere.* Ĉi tie mi informu pri ĵus ricevita, dolora informo: la 28-an de aprilo en Budapeŝto mortis la esperantista novelisto Endre *Tóth,* kies novelaro «Lappar, la Antikristo» same aperos baldaŭ ĉe HEA. En majo li estus fariĝinta 50-jara.

Pro teknikaj kialoj iom malfrue ni aperigas la enhavtabelon de niaj pasintjaraj numeroj. La ĉijara enhavtabelo espereble povos aperi ĝustaloke, do en la numero 1981/6.

Kaj la sekvan numeron 1981/5 atendu ĝustatempe. Gi atingos vin en septembro.

Aŭtuna promenado en Budapeŝto

Somere Budapeŝto similas al bunta foiro. Sur la stratoj, en la magazenoj kaj kafejoj, ĉe la bordo de Danubo zumas vigla diverslingva babilo kaj la tuta urbo gajas, ridas, eĉ frivolas, kvazaŭ ebria de la suna brilo kiu verŝiĝas sur ĝin kiel sukcenkolora Tokaja vino.

Nun estas ankoraŭ somero, sed, kara leganto, permesu al mi diri, ke la Budapeŝta aŭtuna trankvilo pli ravas min. Tiam kun Danubo, friska blovo eniras en la urbon. Sur la monteto Gellért ekflamas okraj, kupraj, oraj koloroj. Iom post iom la aŭtuno malvestas la arbojn, la aero iĝas kristala kaj la rigardo vidas pli malproksimen kaj pli klare. Mi scias, ke aŭtuno ne estas „tradicia" turisma sezono, tamen, indas foje veni vidi la aŭtunan Budapeŝton.

Danubo fluas lante, kaj kiel amikaj brakoj etendiĝas la Budapeŝtaj pontoj. En la someraj vesperoj ili lumas kiel artfajraĵoj, kaj vintre similas al prujnaj floroj. Ĉiu ponto estas por mi simbolo kaj ĉiuj kune kvazaŭ rakontas la historion de la hungara ĉefurbo. La majesta Ĉen-ponto estas la plej malnova kaj ĉiam memorigas al mi pri la nobla kaj sindona grafo István Széchenyi (Iŝtvan Seĉeni), kiu iniciatis kaj subtenis la konstruadon de tiu ĉi ponto. La ponto estis konstruita inter la jaroj 1939–1849 sub la gvido de la angla inĝeniero Adam Clark.

Kvar ŝtonaj leonoj ornamas la du flankojn de la ponto kaj legendo rakontas, ke, kiam la skulptisto rimarkis, ke li lasis sen langoj la leonojn, li saltis en Danubon.

En la malproksimo videblas la eleganta ponto Margit. Ĝi kunligas ne nur la du partojn de la urbo, sed ankaŭ la insulon Margarita. Kiel senmova verda ŝipo estas la silenta insulo. Somere infanaj gajaj krioj eĥas sur ĝiaj veluraj herbejoj, sed aŭtune profunda silento regas ĉi tie kaj min obsedas la sento, ke mi promenadas sola en mirinda fabelo. Nur la susuro de la aŭtunaj folioj rakontas al mi la historion de tiu ĉi insulo. Kiam la tataraj triboj invadis Hungarion, la reĝo Béla Kvara (Adalberto Kvara), 1235–1270, donis sankta promeson, ke, se li forpelos la malamikojn, li dediĉos sian plej junan filinon al Dio.

La reĝo plenumis sian ĵuron kaj sendis la belan Margaritan en la monaĥinejon sur la insulo. La reĝfilino en sia 29-a jaro mortis ĉi tie.

Kiel aspektis la kompatinda Margarita? Ĉu ŝiaj okuloj estis bluaj, kiel la profunda hungara ĉielo, aŭ nigraj kiel olivoj? Neniu povas diri tion. Nur la ruinoj de la monaĥinejo fidele gardas la rememoron pri ŝi.

De la insulo videblas la montetoj de Buda, kaj la domoj de la malnova urbo. Mi ŝatas ofte promenadi tie, inter la iamaj etaj Mezepokaj metiejoj de ŝuistoj, kudristoj, ĉarpentistoj... Aŭtune la placo Sankta Triunio, kie majeste levas siajn kupolojn la katedralo Mátyás, estas preskaŭ senhoma. En 1309 en tiu ĉi katedralo estis kronita la reĝo Róbert Károly, kaj de tiam ĉiujn hungarajn reĝojn oni kronis ĉi tie.

Dum la turka regado la katedralo estis aliformita moskeo.

La 8-an de junio 1867, dum la kronada ceremonio de la reĝo Francisko Jozefo Unua kaj reĝino Elizabeta en la katedralo eksonis la Kronceremonia meso de la fama hungara komponisto Ferenc Liszt (List).

Ankaŭ nun estas plezuro aŭskulti la ravan melodion de la katedrala orgeno.

En la proksimo de la katedralo kiel severaj soldatoj staras la blankaj turoj de la Fiŝkaptista Bastiono. En la Mezepoko sur la placo ĉe la katedralo estis bazaro por fiŝoj, kaj la gildo de la fiŝkaptistoj konstruis tiun ĉi bastionon por defendi la urbon kontraŭ la malamikoj.

En la aŭtuna vespero miaj lantaj paŝoj obtuze eĥas sur la ŝtonaj ŝtuparoj de la bastiono kaj mi kvazaŭ aŭdas la voĉon de la mezepokaj gardistoj, kiuj de tiuj ĉi turoj gardis la trankvilan dormon de la urbo.

Malsupre arĝentas Danubo, kies akvo kvazaŭ kisas la fundamentojn de la impona Hungara Parlamentejo. Lumaj torentoj surversas tiun ĉi harmonian konstruaĵon, kaj en la aŭtuna vespero ĝiaj novgotikaj formoj reliefiĝas pli klare. La parlamentejo estis konstruita inter la jaroj 1885–1902 laŭ la planoj de la hungara inĝeniero Imre Steindl.



La plej malnova ponto el la tunelo, kondukanta sub la fortikaĵo

Aŭtune Budapeŝto igas min al medito kaj miaj pensoj nevole revenas al la tempo kiam en tiu ĉi Danuba urbo loĝis la plej granda hungara poeto Sándor Petőfi. Ankaŭ nun mi kvazaŭ vidas lin antaŭ la Nacia Muzeo, antaŭ la ribelinta homamaso, kiam la 15-an de marto 1848, per la sugesta recito de sia poemo „Nacia kanto" Petőfi startigis la hungaran revolucion.

Budapeŝto – urbo kun jarcentaj historio kaj kulturo, urbo en kiu loĝis kaj loĝas talentaj verkistoj, muzikantoj, pentristoj. Petőfi, Ady, Kodály, Bartók delonge jam ne apartenas nur al la hungara popolo, ilia kreado eniris la mondan kulturan trezorejon.

Pri Budapeŝto oni povas rakonti senfine. Oni povas rakonti pri ĝiaj multnombraj muzeoj, pri ĝiaj artaj galerioj, pri ĝiaj teatroj kaj koncertejoj, oni povas senlace promenadi sur la vastaj stratoj de tiu ĉi vigla urbo. Sed en Budapeŝto troviĝas ankaŭ unu malgranda strato, kies nomo estas „Kenyérmező" kaj kiu signifas „pana kampo". Multaj el la budapeŝtanoj eĉ ne aŭdis pri tiu ĉi strato, malgraŭ tio, ke ĝi estas en la centro de la urbo. Multaj el la turistoj ne rimarkas ĝin, sed la esperantistoj bone ĝin konas, ĉar tie troviĝas Hungara Esperanto-Asocio. Tie, en la oficejo de la Asocio, de mateno ĝis vespero regas vigleco. Sonoras telefonoj, venas Esperanto-aktivuloj, fremdlandaj gastoj, personoj kiuj interesiĝas pri lingvokursoj... La afablaj junaj kunlaborantoj senlace respondas kaj donas klarigojn al la multnombraj demandoj kaj petoj.

La Matias-preĝejo, antaŭ ĝi la statuo de la Sankta Triunuo



Multajn mondfamajn muzikistojn, publikon de multaj koncertoj vidis jam ĉi tiuj statuoj sur la fronto de la kulturcentro „Vigadó", vid-al-vide al la Burg-monteto, sur la Peŝta bordo de Danubo

Fasado de la Nacia Muzeo





Mezepoka kapelo sur ombra promenejo de Margarita-insulo

Fotoj de Zoltán *Fejér*

Ĉi tie kunsidas la Estraro de la Hungara Esperanto-Asocio, ĉi tie naskiĝas la novaj numeroj de la „Hungara Vivo" kaj „Budapeŝta Informilo", ĉi tien venas la manuskriptoj de la Esperanto-libroj, kiujn eldonas Hungara Esperanto-Asocio, ĉi tie oni organizas multnombrajn Esperanto-renkontiĝojn, konferencojn, seminariojn en diversaj partoj de Hungarlando. Ĉi tie estas la pulsanta koro de la Hungara Esperanto-movado.

Mi ofte vizitas la Asocion, ĉar ĉi tie mi renkontas karajn amikojn, ĉi tie mi ekscias multon pri nia movado, kaj ŝajnas al mi, ke ĉi tie ankoraŭ regas la renesanca Esperanto-spirito de Baghy kaj Kalocsay.

Mi senlace povas promenadi sur la stratoj de la nova kaj antikva Budapeŝto, ĉar en ĉiu sekundo mi renkontas homojn, kiuj loĝas en tiu ĉi urbo, kiuj vartas ĝiajn tradiciojn kaj kiuj plu konstruas kaj evoluigas ĝin.

Somere Budapeŝto gajas kiel bunta foiro, aŭtune meditas, ornamita per oraj koloroj, vintre silentas sub neĝa vualo, printempe ridetas en floroj, sed ĉiam ĝi allogas kaj ravas.

Georgi *Mihalkov*

Robert C. Lonati interparolas kun la fama artisto Amerigo Tot. Meze staras Márton Lengyel, vic-gvidanto de la Tutlanda Fremdultrafika Oficejo, Komitatano de HEA

Pri la utilo de Esperanto

Intervjuo kun Robert C. Lonati, ĝenerala sekretario de MOT

Sur la paĝoj 4-5 de nia numero 1981/1 oni povas legi en la priturisma artikolo de Márton Lengyel, *vicprezidanto de la Hungarlanda Turisma Oficejo, ke s-ro Robert C.* Lonati, *ĝenerala sekretario de la Monda Organizo pri Turismo (MOT) havas simpatian sintenon al Esperanto. Ĉi-sube tiu aserto pruviĝas. Fine de marto s-ro Lonati venis al Budapeŝto, kaj Márton Lengyel intervjuis lin por la revuoj de Hungara Esperanto-Asocio. La intervjuinto ne havis malfacilan taskon, ĉar s-ro Lonati kvazaŭ mem verkis artikolon por ni. Jen liaj vortoj:*

– Mi tre ĝojas pro la eblo – komencis la ĝenerala sekretario de MOT –, ke mi povas ekspliki mian opinion pri Esperanto, tiu ĉi moderna lingvo, respondanta al la postuloj de nia epoko. Ekde mia junaĝo mi sekvas kun granda atento la argumentojn, eldiritajn por Esperanto, kvankam mi mem ne parolas la lingvon. Mian atenton kreskigis, ke min ĉirkaŭas internacia kunlaborantaro, en kiu troviĝas pluraj esperantistoj.

Koncerne la estonton, mi supozas, ke Esperanto estas destinita por venki la lingvajn malfacilaĵojn de la internacia komunikado. La plirapidiĝo de la komunikado – ĉi tie mi pensas kaj pri la teknikaj komunikiloj, kaj pri la bezono de la homoj esti komprenataj dum vojaĝo – rezultigas, ke la lingvaj baroj fariĝas pli kaj pli ĝenaj. Ofte la homoj ne povas uzi sian gepatran lingvon, ili devas komprenigi sin per nesufiĉe regata lingvo, kaj okazas problemoj pri la kontentigo de eĉ la plej bazaj bezonoj. Mankas do tia esprimilo, kiu ebligas la kontaktojn, tial mi pensas, ke Esperanto povus bone servi kiel rimedo de komunikado, interkompreniĝo kaj interŝanĝo de pensoj inter diversnaciaj homoj.

Vojaĝoj fariĝas ĉiam pli oftaj kaj amasaj, vere necesas do, ke la homoj povu senpere komuniki siajn pensojn unu al la alia. Nuntempe, en la epoko de la supersonaj aviadiloj, transistoroj, kosmoŝipoj, radia kaj televida komunikado, kiam informoj trakuras milojn da kilometroj dum sekundo, por multaj turistoj estas malfacile peti glason da akvo, demandi pri prezo de hotelĉambro, pri maniero de monŝanĝo, aŭ esprimi sian plaĉon aŭ malkontenton. Tiaj provoj tre ofte malsukcesas, tiu malsukceso kreskigas la streĉitecon en la interhomaj kaj ankaŭ internaciaj rilatoj, la ĝeneralan malkontenton.

Nuntempe Esperanto estas tiu baza ilo, kiu ebligas por amaso da individuoj komuniki ankaŭ en eksterlando, kiu kapablo estas gravega postulaĵo de nia epoko.

En la rekomendoj de la Monda Konferenco de Turismo, okazinta en Manila, ricevis lokon ankaŭ Esperanto, kvankam tio estas nur komenca paŝo. Sed mi kredas, ke la delegitoj de la ŝtatoj-membroj kaj la asociiĝintaj membroj – reprezentantoj de naciaj kaj internaciaj organizaĵoj kaj privataj societoj – vidos en Esperanto ilon, kiun ili volonte subtenos, ja ĝi povos kontribui al la plej efika efektivigo de iliaj celoj.

Tio estas ne nur mia persona opinio, sed ĝin firmigas ankaŭ la spertoj de mia 29-jara internacia agado. Dum tiuj jaroj mi spertis, ke la kontaktoj inter la homoj ĉiam lanĉis grandajn problemojn, ankaŭ tiam, se la interpretistoj faris tre bonan laboron. Ĉar se oni aŭdas interpretadon ne en sia gepatra lingvo, ofte oni ne komprenas ĝin. Tial oni devus fari paŝojn por tio, ke estu organizitaj Esperanto-kursoj por ĉiuj, kiuj agadas sur la kampo de internaciaj rilatoj. Mi pensas ĉi tie ne nur pri la turismo, sed ankaŭ pri aliaj kampoj, ja oni devus plirapidigi la komunikadon inter la homoj kaj elimini la tempoperdojn, kiuj tre oftas dum la intertraktoj. Tio estas konstanta problemo de la internaciaj kontaktoj, kaj mi supozas, ke la multflanka akcepto kaj disvastigo de Esperanto elvokus favorajn reagojn ĉe la plimulto de la socio en ĉiuj landoj – finis la intervjuon s-ro Lonati.

Márton *Lengyel*



– Eble li lernis la anglan el alia libro.

D-ro Pál Gegesi Kiss
akademiano, prezidanto de la Hungara Ruĝa Kruco

100 jaroj de la Hungara Ruĝa Kruco

Dum tiuj cent jaroj, kiuj pasis depost la fondiĝo kaj rekono de la Hungara Ruĝa Kruco (1881) ĝis nun (1981), kvazaŭ tute ŝanĝiĝis la mondo. Rezulte de sennombraj lokaj militoj, du mondmilitoj, multaj, la popolojn subpremantaj perfortoj de regantaj individuoj kaj klasaj socioj, rezulte de perarmilaj movadoj, batalintaj por la libereco de la popoloj, grandaj ŝtatoj disfalis, ĉesis, novaj sociaj sistemoj formiĝis, kaj ne nur la mondmapo, sed ankaŭ la vivo de la mondo estas tute alia, ol estis antaŭ 100 jaroj. La rezultoj de la scienco, surbaze de ili la progreso de la kulturo kaj tekniko kvazaŭ tute ŝanĝis la vivon, la viveblecojn, perspektivojn, pensmanieron, agadon, taksadan prijuĝon de la homoj, familioj, Oni preskaŭ ne povas kompari la nutradajn, sanitarajn, vestaĵajn, loĝejajn, trafikajn, produktajn, kreajn, komunikadajn cirkonstancojn, eblecojn de antaŭ 100 jaroj kaj de la nuna civilizita mondo.

Kaj kio okazis dum la mondon ŝanĝintaj 100 jaroj kun la Ruĝa Kruco?

Plenrajte ni povas diri, ke la ruĝkruca ideo, la esenco de la humana penso de Henri Dunant restis en sia origina pureco: per humanismo, per filantropia kunsento helpi al malfeliĉuloj, mildigi la suferon. Eble ĝi ŝanĝiĝis nur tiel, ke, konservante la bazan ideon, ĝi profundiĝis, etendiĝis kaj elpaŝinte el la limoj de komence nur de unu lando, poste de unu kontinento (Eŭropo), ĝi iĝis mondskala, kaj la ideon realigantaj organizoj, la Societoj de *Ruĝa Kruco* kaj *Ruĝa Lunarko* nuntempe kvazaŭ trateksas ĉiujn landojn de la kvin kontinentoj, kaj ilia filantropia agado ĉeestas kaj efikas egale sur la tero, sur la maroj, kaj en la senfina aero.

Ankaŭ la Hungara Ruĝa Kruco, konservante sian nacian karakteron ankaŭ kiel natura parto de la Internacia Ruĝa Kruco, dum la 100 jaroj depost la fondiĝo kaj rekono trairis seriozan evoluon el vidpunkto de organizaj, ĉiutagaj, aktualaj laboroj, kaj ĝeneralaj celoj. La antaŭ 100 jaroj ekfunkciinta Hungara Ruĝa Kruco havis nur kelkcent membrojn en kelkaj lokoj, kaj nuntempe jam ĝi troveblas en ĉiuj lokoj de la lando, en pli ol 10 mil bazorganizoj, kun preskaŭ unu miliono da volontulaj membroj, inter ili kun centmiloj da gejunuloj. El la iamaj malmultnombraj bonfaremaj grupoj disvolviĝis dum la pasintaj 100 jaroj bone funkcianta vera amasorganizaĵo, kiu kapablas solvi la surprenitajn multflankajn taskojn.

Ankaŭ la agado de la Hungara Ruĝa Kruco komenciĝis tiel, kiel ĝenerale ĉie la ruĝkrucaj agadoj. Ĉe la komenco la agado konsistis el sendistinga helpo, subteno al la inter militaj cirkonstancoj vunditaj homoj, el prizorgado de vunditoj kaj esence ĝi daŭris ĝis la resaniĝo el la vunditeco. Poste baldaŭ oni surprenis ankaŭ la – denove tute sendistingan – protektadon de la jam senarmilaj militkaptitoj.

Tiun ĉi periodon de la agado rapide sekvis tiu epoko, kiam konservante la bazajn funkciojn, Ruĝa Kruco akceptis sia tasko ankaŭ la subtenon de la loĝantaro, suferanta pro kataklismoj: tertremo, inundo, incendio, epidemioj.

Kaj post tio sekvis kvazaŭ nepre, ke inter pacaj rilatoj, ĝi akceptis en socia skalo financan, moralan, sentimentan helpon al pro io ajn malsanaj, solaj homoj kaj ties familianoj, *sendependa* de la deveno, raso, nacieco, religio de la koncerna homo.

Grava paŝo estis en la evoluo de la Hungara Ruĝa Kruco, kiam simile al aliaj ruĝkrucaj societoj, ĝi rekonis, ke la humane pensantaj organizoj devas helpi ne nur al la jam *suferantaj, malsanaj* homoj, sed akceptante la ideon de la moderna medicino, ĝi partoprenis ankaŭ en la agado por „preventi la malfeliĉon, malsanon". Ankaŭ la Hungara Ruĝa Kruco rekonis, ke malfeliĉo, malsano povas superigi iun ne nur pro la jam konataj etiologiaj kaŭzoj, sed ekzistas problemoj, kiuj aperas pro la nekonvena socia kunvivado. Ekde tiu ĉi rekono Hungara Ruĝa Kruco helpas ĉiujn fakajn – ni diru – *ŝtatajn fakservajn* agadojn, kiuj direktiĝas por preventi la kreiĝon de la malsanoj, la evoluon de komplikaĵoj en kelkaj malsanoj kaj por atingi pli efikan resaniĝon. Tiu ĉi akcepto de nova tasko rezultigis, ke la Hungara Ruĝa Kruco fariĝis organizanto de la volontula sangodona movado, kaj ni povas fiere konstati, ke per tiu ĉi informa, mobiliza agado nuntempe jam volontulaj sangodonantoj certigas la necesan sangokvanton al la hungaraj sanitaraj laboroj.

Al la preventa agado apartenas la ruĝkruca partopreno en la sanitara edukado de la loĝantaro; edukado por akceptigo de sana vivreĝimo, edukado por la familia vivo, disvastigo de konoj pri la unua helpo, kontraŭ la *malutilaj pasioj:* la prezento de la danĝeroj de alkoholismo, de nikotina trouzado, la klarigo de sinprotektado kontraŭ ili.

Estis tre grava rekono, kiam la Ruĝa Kruco konstatis, ke en la nuna historia epoko la plej ĉefa homa danĝero, malbon-fonto estus la milito, ĉar se eksplodus milito, utiliganta nukleajn armilojn, terura malbono falegus sur la tutan homaron. Laŭ tiu ĉi rekono ankaŭ la Hungara Ruĝa Kruco agadas por la *defendo de la paco,* kaj per siaj specialaj rimedoj ĝi deziras kontribui al la plifortigo de la pacmovado en nacia kaj internacia skalo.

Ĉu la ruĝkruca ideo, movado, agado havas estonton, ja en la plej evoluintaj socioj la ŝtata fakservo konsideras sia propra tasko la sanitaran kaj socian provizadon de la tuta loĝantaro?

La Hungara Ruĝa Kruco opinias, ke apud la ŝtata fakservo, ĝin helpante ankoraŭ dum tre multaj jardekoj – eble dum la plena sekvonta dua jarcento –, estos ne nur necesa, sed eĉ ne malhavebla la socia sanitara kaj socia la filantropia, homeduka ruĝkruca laboro, ĉar eĉ la ŝtata fakservo apud la plej bona organiziteco bezonos la socian laboron de la Ruĝa Kruco. Eble ĉiam necesos, ke la ŝtatan fakservon helpu socia organizo, havanta plurmilionan membraron, por ke ĉiu homo, ĉiu familio, ĉiu komunumo, laborejo, ĉiu aganta kolektivo ne nur konu, sed *ankaŭ alproprigu* kaj aktive, iniciateme praktiku tiun homan agadon, kiu celas preventi malbonon kaj malsanon, helpi al ĉiuj, kiuj bezonas helpon, kaj mildigi la suferojn de la suferantoj.

El hungara: d-ro Imre *Ferenczy*

Oficejo de UEA en Budapeŝto

Intervjuo kun Gregoire Maertens, prezidanto de UEA

Fine de marto venis al Budapeŝto s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA. Li vizitis la turisman ekspozicion „Vojaĝo '81", kie havis standon ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio. Tie ĉi li renkontiĝis kun d-ro Vilmos Sághy, *hungara ministro pri interna komerco. La prezidanto de UEA dankis la ministron pro la iniciato de la hungara registara delegitaro dum la pasintjara Mondkonferenco pri Turismo en Manila, kiu iniciato rezultigis akcepton de rekomendo, favora al Esperanto. Post la interparolo kun la ministro li donis intervjuon por la revuoj de HEA.*

– Ĉu vi jam estis en nia lando? Kiu estas la celo de via nuna vizito?

– La trian fojon mi vizitas vian belan landon – li respondis. – La unua vizito okazis en 1966, kiam Universala Kongreso de Esperanto estis aranĝita en Budapeŝto. En la nuna vojaĝo mi havas du taskojn. La unua tasko estas transdoni al Hungara Esperanto-Asocio la Trofeon Fyne, kiu iras en ĉiu dua jaro al iu bone laboranta Landa Asocio de UEA. Per tiu ĉi trofeo UEA esprimas sian rekonon pro la elstaraj rezultoj de la hungara movado. Cetere HEA estas la unua el la asocioj en socialismaj landoj, kiu ricevas tiun trofeon.

– El la vidpunkto de la internacia movado kiel vi taksas la rezultojn de la hungara movado?

– Unue mi emfazu tion, ke la hungara movado per siaj malnovaj tradicioj, enlanda kaj internacia agado akiris la moralan kaj financan subtenon de la hungaraj sindikatoj. La Esperanto-movado ankaŭ en aliaj landoj ricevas subtenon de sindikatoj, sed la hungaran modelon mi trovas aparte imitinda, ĉar ĝi inkluzivas kunlaboron ankaŭ sur la nivelo de la mezaj kaj bazaj organoj. Mi memoras ankoraŭ la intervjuon, kiun en 1974 donis por via revuo Sándor *Gáspár*, ĝenerala sekretario de la Tutlanda Konsilantaro de Sindikatoj pri la demando: kiel la internacia sindikata movado povus utiligi Esperanton? Preskaŭ la tuta Esperanta gazetaro informis pri tiu intervjuo, kiu tiel elvokis vastajn reeĥojn. Kaj en pluraj landoj – ekzemple en Britio – la intervjuo grave kontribuis al tio, ke landaj sindikataj centroj kaj iliaj gvidantoj akcelas inter siaj membroj la popularigon, instruadon de la Internacia Lingvo.

Hungara Esperanto-Asocio dediĉas gravan atenton ankaŭ al la nacilingva informado. Jus aperis en granda eldonkvanto tre bela populara informilo kun titolo „...mi jam scias, kio estas Esperanto!"

Hungaraj iniciatoj

– En pluraj landoj okazas parlamentaj kampanjoj por la oficiala rekono de la Internacia Lingvo. En Britio laboras tiucele 118-membra por-esperanta parlamenta grupo. En Hungario dum 1976 140 parlamentanoj sendis leteron pri la rolo de Esperanto al la kultura komisiono de la parlamento. Rezulte de tiu elpaŝo la komisiono pritraktis la lernejan fakultativan instruadon de Esperanto, kaj rekomendis ampleksigi la instruadon de la Internacia Lingvo. La hungara Esperanto-movado kreis modelan kunlaboron kun la hungara kooperativa movado, kaj ties formojn oni difinis ankaŭ per kontrakto. Estis iasence sekvo de hungaraj iniciatoj, ke la Monda Asocio de UN-Societoj kaj la Monda Organizo pri Turismo deklaris favore al la disvastigo de la instruado de Esperanto.

– Kiu estas la dua celo de via vizito?

– UEA rekonis, ke la aplikadon de Esperanto oni devas intensigi ankaŭ sur la kampo de la scienco kaj tekniko. La organizaĵoj de la diversfakaj esperantistaj sciencistoj agadas tre aktive, kaj ankaŭ en tiuj organizaĵoj laboras multaj hungaroj. Rezulte de la bona laboro de esperantistaj sciencistoj la prestiĝa revuo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, krom en aliaj kvar lingvoj, nuntempe aperas ankaŭ en Esperanto.

Universala Esperanto-Asocio nun kontraktis kun HEA pri tio, ke la hungara asocio organizos kaj kunordigos la eldonadon de esperantlingva faka literaturo. Tiucele en la kadro de la hungara asocio estis kreita oficejo, kiu speciale dediĉas sin al tiu ĉi tasko. UEA cetere havas plurajn filiajn oficejojn, interalie en Novjorko kaj Antverpeno.

Vizito en la Sindikata Centro

– Ĉu oni ankaŭ presos la eldonaĵojn en Hungario?

– Jes, surbaze de niaj mendoj kaj per nia financa partopreno. Ni volas kontribui al la teknika aspekto ankaŭ per transdono de maŝinoj, interalie de moderna lumkompostilo. Tiujn maŝinojn – kiuj tamen restos la posedaĵo de UEA – kompreneble rajtos uzi ankaŭ HEA. Certan onon de la eldonitaj fakaj libroj ricevos Hungara Esperanto-Asocio. Ankaŭ per tiuj ni pagos por la farita laboro.

– Pri kiuj aliaj temoj vi traktis en Hungario?

– Ni informiĝis pri eventuala eblo aranĝi Universalan Kongreson en Budapeŝto meze de la okdekaj jaroj, ja via lando kaj ĝia ĉefurbo havas ankaŭ multajn turismajn allogaĵojn. Dum mia restado mi intertraktis ankaŭ kun s-ro József *Timmer*, sekretario de la sindikata konsilantaro. Tiu intertraktado koncernis ankaŭ la ampleksigon de la kontaktoj de la internacia sindikata movado kaj la internacia Esperanto-movado, tiom pli, ke s-ro Sándor Gáspár, prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj, kiel jam menciite, deklaris tre favore pri la internacia aplikebleco de Esperanto.

Imre *Szenes*

Amikeco tra jarcentoj

Antaŭ 1300 jaroj
fondiĝis la bulgara ŝtato

La legendo rakontas, ke iam en la fora, fora pasinteco, ie sur la stepoj de Azio, foje dum ĉasado, la du fratoj Hunor kaj Magyar enpaŝis en la teritorion de la gento Belár. La gentestro Belár havis du belajn filinojn, kaj la du fratoj forrabis ilin. La filinoj de Belár fariĝis edzinoj de Hunor kaj Magyar. La vorto „belár" signifas „bulgaro" kaj tiel, laŭ la legendo, hungaroj kaj bulgaroj iĝis parencoj.

Bela estas la legendo kaj eble la bulgara-hungara amikeco vere komenciĝis de la stepoj de Azio. Sed pasis jaroj kaj jarcentoj, en 681, ĉe la delto de Danubo, la prabulgara ĥano Asparuh fondis la bulgaran ŝtaton. Árpád – la estro de hungaraj triboj, atingis ĝis la meza fluo de Danubo. Diferenciĝis moroj kaj kutimoj de la du popoloj, sed ilia amikeco ne forvelkis.

Kiam la turkaj hordoj invadis Balkanan duoninsulon, tiu ĉi amikeco plifirmiĝis per la frata sango, elverŝita de hungaroj kaj bulgaroj en bataloj kontraŭ la komuna malamiko. En 1443–1444, ĉe bulgara urbo Varna, militis kontraŭ la turkoj hungara-pola reĝo Jagello Ulászló kaj János Hunyadi. Per kortuŝaj kantoj la bulgara popolo prikantis la bravecon de hungaraj soldatoj.

Longa kaj kruela estis la turka jugo kaj al multaj bulgaraj familioj najbaraj hungaraj regionoj donis rifuĝon.

En 1849 la bulgara urbo Ŝumen donis azilon al la gvidanto de la hungara nacia revolucio, Lajos Kossuth kaj lia taĉmento de kvin mil hungaraj soldatoj. En Ŝumen la hungaraj enmigrintoj trovis ne nur azilon, sed amikojn kaj fratojn. Ankaŭ nun la urbo vartas karan rememoron pri hungaroj, sub kies influo okazis la unua teatra prezento ne nur en Ŝumen, sed en tuta Bulgario. Same en Ŝumen, en 1851, la juna hungaro Mihály Sáfrán kreis la unuan orkestron en Bulgario. Nun en la centro de la urbo kiel bela simbolo de hungara-bulgara amikeco estas la domo-muzeo, kie loĝis Lajos Kossuth.

La memor-preĝejo Aleksander Nevski en Sofio, en la fono la monto Vitoŝa.

Kiam dum la turka jugo iom post iom komencis estingiĝi la flamo de la bulgara kulturo, Buda Universitata Presejo eldonis bulgarlingvajn librojn per kiuj ĝi helpis la kulturan kaj nacian renaskiĝon de la subpremita bulgara popolo.

La eksplodo de Aprila ribelo en 1876 forte reeĥis en Hungario, kaj multaj hungaraj ĵurnaloj indigne reagis kontraŭ la krueleco de la turka despotismo.

Dum jarcentoj ĉefe Danubo kunligis la du popolojn. Tra Danubo Kossuth atingis Ŝumenon. En 1876 la granda bulgara poeto-revoluciulo Hristo Botev trapasis Danubon, gvidante sian taĉmenton al Bulgario por helpi al la ribelanta popolo. Por mi simbola estas la fakto, ke la ŝipo, per kiu Botev trapasis Danubon, hazarde estis aŭstro-hungara. Delonge jam la bulgaraj kaj hungaraj literaturistoj komparas la revolucian agadon kaj poezion de Botev kun la heroa vivo kaj poezio de Petőfi. Ankoraŭ en 1884 la bulgara poeto Ivan Vazov tradukis la poemon „La frenezulo" de Petőfi, kiu poemo iĝis unu el la plej ŝatataj kaj popularaj poemoj en Bulgario.

Multaj kaj elokventaj estas la esprimiĝoj de la bulgara-hungara amikeco. Viva estas la rememoro pri bulgaroj, kiuj en 1919 kune kun la hungaraj laboristoj batalis por la defendo de la unua hungara proleta ŝtato.

Nun la bulgara-hungara amikeco de jaro al jaro plifirmiĝas. Multaj hungaroj kaj bulgaroj fervore laboris kaj laboras por la kultura interkonatiĝo de la du frataj popoloj. Běla Bartók, la mondfama hungara komponisto, esploradis la specifaĵojn de la bulgara popola muziko. La konata hungara lingvisto István Kniezsa studis kaj komparis la bulgaran kaj hungaran lingvojn. Géza Fehér, historiisto kaj arkeologo, faris gravajn esplorojn pri la historiaj kaj parencaj rilatoj de la du popoloj. Ankaŭ multaj elstaraj bulgaroj aktive kontribuis por tio, ke la hungara kaj bulgara popolo pli bone ekkonu unu la alian.

Ĉiujare ambaŭ landoj gastigas el la alia ekspoziciojn, teatrajn kaj koncertajn prezentadojn. En ambaŭ landoj aperas multaj tradukitaj libroj, tamen la lingva baro ekzistas: hungaro kaj bulgaro ne povas senpere konversacii. Sed des pli jubila estas mia ĝojo kiam mi aŭdas, ke bulgaro kaj hungaro parolante Esperanton, trankvile kaj libere esprimas sentojn kaj pensojn. Esperanto, simile al Danubo estas viva ligo de la du frataj popoloj, kies amikeco floras kaj floros de jarcentoj al jarcentoj.

Georgi *Mihalkov*

Jarcentoj de la hungara literaturo

István Torda

14. Novaj generacioj

„Mi naskiĝis en 1928, en vilaĝeto apud Budapeŝto, nomata Bia. Mia patro estis masonisto, miaj senlegendaj prauloj kampuloj, laborantoj por tagsalajroj, servistoj, senrangaj soldatoj, servutuloj, ilin karakterizis simpleco, ili havis pezan koron, estis silentemaj, fekund-sinaj, same kiel la tero, la ŝtonoj kaj la radikoj... Tio, ke mia ekpoetiĝo koincidis kun la komenco de la nov-konceptita vivo de la postmilita Hungarlando, ankaŭ ne estas nura hazardo. Centjaraj febroj, feaj delicoj, grasaj terbuloj, naskantaj vivon, atendis eldiron, kaj oni devis surpreni la taskon." Tiel rememoras sian debuton Ferenc *Juhász* (Juhas) (1928–), kiu fakte aperis eksplode en la hungara literaturo en sia 19-jara aĝo. Post kvar jaroj li ricevis la plej altan honorigon por artisto, nome la Kossuth-premion (Koŝut). Kvankam en la epoko de la literatura skemismo li estis serioze atakata, ĉar li eksonigis ankaŭ siajn dubojn, dolorojn, li tamen iris plu sian vojon, tiun de la nekutimaj fantazibildoj, tiun de la mondvivado, vastiĝanta ĝis kosmaj dimensioj en la lirikaj poemoj kaj lirikeskaj eposoj (*Disipa Regno,* 1954, *Legendoj pri la Sankta Fajro-inundo,* 1969, *La Reĝo de la Mortintoj,* 1971, *La Savonta Orglavo,* 1973). Kaj eĉ se liajn abunde ondantajn versojn, en kiuj superregas la vidaĵoj de la teruro, li ĉiam serĉas la solvon en la nomo de puriĝinta homaro. Ankaŭ inter la ektimo pro la danĝero pri atommilito eksonas optimismo (*La Bildoj de la Nokto).*

István *Simon* (Ŝimon) (1926–1975) kaj László *Nagy* (Nadj) (1925–1978), ekirintaj kune kun Juhász, devenis el kampulaj familioj. Simon pluevoluigis la realismon, bazitan sur elementoj folkloraj. Li estis poeto softvoĉa, hontema, kaŝanta sian direndon malantaŭ ĝenro-bildoj, sed pere de tio li pretendis profunde travivi la realon, kapti la spiriton de la epoko. Nagy aperis en la fino de la 40-aj jaroj kun sia bravura verstekniko. Precipe interesa estis lia kapablo uzi muzikecajn elementojn. Lia ludema, optimisma tono iom poste tenebriĝis: liaj strangaj alegoriaj poemoj, konstruitaj el folkloraj bild- kaj lingvomaterialo, enhavantaj superrealismajn elementojn, sonigis la timon pri la individua pereo, la laŭdon de la potenca amo. Pere de siaj poemegoj (*Perlo-jupo,* 1959, *Nuptofesto,* 1969, *La Verda Anĝelo,* 1965) kaj pere de pli mallongaj poeziaĵoj li iom post iom altiĝis al la vico de la plej grandaj reprezentantoj de la kuntempa literaturo.

La kvardekaj jaroj «Novluno»

Inter la jaroj 1946 kaj 1948 la poetoj, flegintaj la heredaĵon de Mihály Babits, la spiriton de la humanisma literaturo burĝa, grupiĝis ĉirkaŭ la literatura revuo „Újhold" („Novluno"). En ĝi publikigis unue siajn poemojn poetino Ágnes *Nemes Nagy* (Nemeŝ Nadj) (1922–). Ĉi tiuj poeziaĵoj fandas du kontraŭajn materiojn: la intelekton kaj la pasion, kaj en ili malfermiĝas iu propra, fermita kosmo, tiu de virino, verkanta poemojn. Ankaŭ sur la paĝoj de la revuo aperis verkoj de poeto proksima al la novkatolikismo, János *Pilinszky* (Pilinski) (1921–). Lian unuan volumon, titolitan *Trapezo kaj paralel-stangoj* (1946) la kritiko akceptis kun granda rekono, sed lia sekva poemaro *Triatage* aperis nur en 1959. De post tiu tempo jam eliris ok Pilinszky-libroj: la pretendo esprimi sin, la deziro eldiri la pensojn kaj sentimentojn trabatis la muron de la silento. Li unuavice eksonigas la tragikon, la mallumajn flankojn de la vivo. Liaj formoj estas senfine koncizaj, puriĝintaj. Lia liriko lastatempe fariĝis pli intima, kvankam ĝia esenco ne ŝanĝiĝis: ĝi restis konfeso de superinta humanismo, akceptanta la ŝarĝojn.

Magda *Szabó* (Sabo) (1917–) ankaŭ debutis kiel poetino en la grupo de „Újhold". Sed ŝi fariĝis unu el la plej popularaj hungaraj verkistinoj per sia prozo, siaj romanoj kiel ekz. *Fresko* (1957), *La Kapreolo* (1959). Tiuj ĉi verkoj montras la disfal-procezon de la provinca „mezklaso", ĝian transformiĝon. En la romanoj la plej interesaj estas la tre simpatiaj virin-figuroj. Lastatempe Szabó verkas ankaŭ dramojn, kiuj estas ludataj en teatroj kun granda sukceso. Unu el ili estas *Eksmoda Historio,* kiu estas dramigo de ŝia furora romano samtitola.

La lirikon de Gábor *Devecseri* (Deveĉeri) (1917–1971), la travivaĵo de la liberiĝo de sub la faŝismo pliriĉigis per motivoj de la patriotisma-porsocia poezio. Li estis unu el la plej elstaraj arttradukistoj hungaraj. Lia plumo hungarigis la plenan verkaron de Homero, ĉiujn versaĵojn de Catullus kaj verkojn de multaj aliaj antikvaj kaj modernaj aŭtoroj.

Inter la hungaraj prozistoj de la 20-a jarcento unu el la plej interesaj estas István *Örkény* (Erkenj) (1912–1978). Li verkis siajn unuajn gravajn verkojn ĉe la fino de la 40-aj jaroj. Lia groteska vidmaniero tamen nur pli poste montris sin en la ĝenro, ellaborita de li. Tio estas la famaj „unuminutaj noveloj". Lia romano *Familio Tót* (1967) per la rimedoj de la absurdo revokas la absurdeskan realon de la dua mondmilito. Alia mallonga romano de Örkény, titolita *Katludo* (1966) estas kortuŝe bela kaj samtempe diable ridinda bildo pri la sentimentaro de gemaljunuloj. En la romano *Rozekspozicio,* aperinta en 1977, la verkisto per sia delikata ironio igas al „homproksimo" la morton. István Örkény iĝis mondfama kiel dramverkisto. Li estas vaste konata kiel aŭtoro de la surscenigoj de la propraj romanoj. La plej famaj Örkény-dramoj estas *Familio Tót* kaj *Katludo.* Liaj eminentaj teatraĵoj (*Sangparencoj,* 1974, *Ŝlosil-serĉantoj,* 1976) estas satiroj, surscenigantaj akiraĵojn de la „unuminutaj noveloj".

Iván *Mándy* (Mandi) (1918–) estas verkisto de la sonĝoj, tiu de la nostalgioj. Liaj fruaj noveloj havas sian scenejon en la periferioj de grandurbo. Liaj herooj estas vagabondoj, spilistoj, vagantaj figuroj de la urbaj placoj, parkoj. Poste li iom plivastigas sian mondon: li montras la vivon de la verkistoj, intelektuloj, tiun de la junularo, foje-foje groteskan kaj kontraŭdiran.

Miklós *Mészöly* (Mesej) (1921–) inter la unuaj provis plivastigi limojn de la hungara epiko pere de uzado de



László Nagy

Erzsébet Galgóczi



Gábor Devecseri

György Moldova

la elementoj malrealaj kaj absurdaj. Mondvizio de liaj noveloj kaj romanoj (*La Morto de la Atleto,* 1966, *Saulus,* 1968, *Filmo,* 1978) sugestas: la ĉiutagaj eventoj de la individua sorto nepre kontaktiĝas kun la ekstera mondo, kies leĝoj ŝajnas sendependaj disde la homo kaj estas nekompreneblaj por li. En la fokuso de la verkado far Ferenc *Karinthy* (Karinti) (1921–) staras la vivo grandurba, ĉefe la Budapeŝta. En la aŭtobiografia verko, memoranta pri lia patro, Frigyes Karinthy (*Fantomverko,* 1946) li konatigas la leganton kun la literatura vivo en la 30-aj jaroj. En la romano *Printempo Budapeŝta* (1953) li skizas la vojon de la intelektuaro kaj tiun de la burĝaro en la cirkonstancoj de la lastaj militaj tagoj kaj tiuj de la liberiĝo el sub la faŝismo. En la lastaj jaroj li verkas dramojn kaj intereskaptajn spritajn novelojn. La lastaj kun siaj denove kaj denove aperantaj rolantoj formas fakte ciklojn.

La 50-aj jaroj

Inter la grandsignifaj poetoj hungaraj komence de la 50-aj jaroj aperis du kampuldevenaj lirikistoj, nome Imre *Csanádi* (Ĉanadi) (1920–) kaj Sándor *Csóri* (Ĉori) (1930–). La temaron kaj vivkoncepton de la poemoj de Csanádi karakterizas strikta ligiteco al la noblaj tradicioj de la poezio kaj la konciza stilo. Poemoj de Csóri estas verkitaj en impresisma stilo, aperta al ĉiu efekto, entenanta ĉion eblan kaj bazita sur bildaj-humoraj motivoj.

Tibor *Cseres* (Ĉereŝ) (1915–) debutis per noveloj, montrantaj la vivon de la renaskiĝanta vilaĝo. Lia romano *Malvarmaj Tagoj* (1964) havas agadon disvolviĝantan en du epokoj kaj sur du scenejoj. Ĝi estas elstara, belega verko pri la nacia memkontrolo. La temo de la romano estas: Novi Sad-a amasbuĉado far la hungaraj faŝistoj dum la dua mondmilito.

La antaŭnelonge forpasinta Lajos *Męsterházi* (Meŝterhazi) (1916–1979) interesiĝis pri problemoj moralaj, li pasie serĉis motivojn de la individuaj agoj. Post la jaro 1956 li verkis pri la tagoj de la kontraŭrevolucio, poste pri la renoviĝo de la vivo, pri la puriĝo de la ideoj. La agado de la grandsukcesa dramo de Imre *Dobozy* (Dobozi) (1917–1980), *Tempesto* (1958) okazas aŭtune de 1956. La saman temon li priverkis ankaŭ en sia romano *Hieraŭ* (1960).

La unuaj rakontoj de Imre *Sarkadi* (Ŝarkadi) (1921–1961) grandskale montris la vivon de la kampuloj. Li havis grandan talenton en la montrado de konfliktoj. Tio rezultigis novelojn dramecajn. En ili estas pentrita la transformiĝo de la vilaĝo kaj la multaj problemoj de la organizado de agrikulturaj kooperativoj. Tragika vojo de la vivo de Sarkadi estis unu el la ĉefaj kialoj de tio, ke reprezentaj verkoj de lia dua verk-periodo montras krizon, ili barakte luktas kontraŭ la problemoj de la monstra individuismo, ili serĉas la solvon de la reciproka dependo inter la vivmaniero, la moralo kaj la idealoj. Tiuj verkoj estas: *Simeono la Kolonulo* (1960), *La Paradizo Perdita* (1961) – dramoj kaj rakonto: *La Poltrono* (1961).

«Fajro-danco»

Renoviĝo far la engaĝita, socialisma liriko estas kunligita al la nova poetgeneracio, aperinta en la antologio *Fajro-danco* (1957). La liriko far Mihály *Váci* (1924–1970) iĝis populara pro la alta individueco, aperta senpereco, senlima viv- kaj homamo kaj pasio pri sociaj aferoj. Gábor *Garai* (1929) interesiĝas pri la problemoj de la formado de homo nova, laboranta por la socia bono. Lia intelekta liriko estas firme ligita al la socio. Tion aŭtentikigas bildaro konkreta, formita zorge.

La unua romano de Endre *Fejes* (Feješ) (1923–) *Rustaĵtombejo,* aperinta en 1962, alvokis tempestegon. La verko fosas ĝisfunden en la filistran vivon de la proletoj senklaskonsciaj, respektive malhavantaj ankaŭ la homan konscion. Ĝia unusenca averto estas: la nova socio postulas ne nur ŝanĝitajn materiajn cirkonstancojn, sed ankaŭ novtipan pensmanieron kaj novan moralbazon.

Elstara raportromano fare de Ferenc *Sánta* (Ŝanta) (1927–) titolita *Dudek horoj* (1964, en Esperanto en 1966) montras la dramojn de la vilaĝo. Ĝi malfermas la ĝeneralan homan signifon de la ĉiutagaj eventoj.

La ĉefa ĝenro de la verkistino Erzsébet *Galgóczi* (Galgoci) (1930–) estas la novelo kaj la etromano, do la plej dramecaj proztipoj. Ŝia grandsukcesa romano *La Komuna Krimo* (1976) estas historio „pseŭdo-kriminala", kies agado iras en malgranda vilaĝo post la frakaso de la kontraŭrevolucio de 1956. István *Gáll* (Gal) (1931–) debutis komence de la 60-aj jaroj kun siaj rakontoj. Lia plej bona romano, *La Ĉevalarmastro* (1976) revokas la etoson de personkultaj tempoj. István *Csurka* (Ĉurka) (1931–) komencis sian karieron per noveloj priintelektualaj, nun li jam estas konsiderata precipe dramverkisto-satiristo, bonege konanta la sekretojn de la scenejo. György *Moldova* (1934–) estas populara ĉefe pro siaj satiroj, riĉaj je spritaj eltrovaĵoj. Li estas eble la plej bona hungara raportisto. Liaj sociografiaĵoj fakte tuj depost la apero fariĝas centra temo de la publika vivo.

*

La laste traktita generacio estis fakte la hodiaŭa. Konatigi la multpromesajn talentojn de la nuntempa verkistaro estas tasko pli posta. Jes ja, ĉar la alrigardo postulas iom da tempa distanco.

El la hungara: P. A. R.

Kulturo super karbotavoloj

La „Popoldomo" en Tatabánya

Tatabánya. Urbo kun 75000 loĝantoj, situanta je sepdek kilometroj, nordokcidente de Budapeŝto. Ĝin vivigas karbminejoj, el kiuj la unua eklaboris en la jaro 1894. La specifaĵoj de la minista laboro signife influas la vivon de ĉiuj loĝantoj, ankaŭ de tiuj, kiuj neniam estis en la „senfenestraj laborejoj", profunde sub la tero. Malfacile mi skribas objektive pri tiu urbo, ja ĝis mia dekoka jaro ĉiuj rememoroj ligas min al ĝi. Interalie, tie mi fariĝis esperantisto.

«Eocena programo»

Eoceno: En PIV oni legas: „1. La dua periodo de la terciara epoko. 2. La formacia etaĝo de tiu tempo." Post la freneziĝo de la nafto-prezoj la hungara energio-politiko malkovris, ke indas ekspluati la eocenan „formacian etaĝon" de karbo, troviĝantan ĉirkaŭ Tatabánya. La urbo regajnis tiun gravecon, kiun ĝi havis pli frue en la hungara ekonomia vivo, sed kiun fine de la sesdekaj jaroj ĝi šajnis esti perdonta. La lando bezonegas la karbon, por iom ŝpari naftoimporton. Kaj la ministoj de Tatabánya faras sian eblon.

Tamen, nun mi ne volas skribi pri la minista laboro. Ĝi estas kaj restas pezega kaj danĝera, kiel ajn multaj modernaj maŝinoj helpas ĝin. Mi volas sondi, kiajn kontaktojn povas havi kun la kulturo la plenumantoj de tiu ĉi peza laboro.

«Popoldomo»

Ĉu domo de la popolo? Nu, minista kulturdomo. Ĝi estis konstruita iam fine de la dua jardeko de tiu ĉi jarcento. Meze de la sesdekaj jaroj, kiam mi forlasis la urbon, ĝi jam tute ne aspektis ideala kulturdomo. Mi aŭdis, ke antaŭ du jaroj oni rekonstruis kaj ampleksigis ĝin. Entuziasmaj amikoj diras, ke oni nepre devas vidi tiun „miraklaĵon". Mi cedas al la persvadoj.

Jam la eksteraĵo efikas vere impone. Antaŭ la konstruaĵo staras statuo de la sama skulptisto, kiu lastatempe laboris en la Roma Hungara Kapelo – Imre *Varga*. Nu, provincismo videble forestas, dank' al Dio. (Vd. la foton sur la frontoaĝo.)

Interne – atendas min pliaj surprizoj. La ejoj, instalaĵoj de la rekonstruita kulturdomo admirinde taŭgas por sia celo. Nemirinde. La gvidanto de la rekonstruado estis ne nur arkitekto, sed li akiris diplomon ankaŭ pri kultura agado. Ankaŭ nun li laboras en la Popoldomo. Do, li konstruis ankaŭ por si mem.

La Popoldomo vespere

Fotoj de Rudolf *Szilvássy*

La biblioteko ŝrumpigas la mondon

La kafejo de la Popoldomo



Laboras la belarta rondo

Provas la orkestro: du generacioj

László *Gengeliczky*, la juna direktoro fiere prezentas sian „imperion". La teatra salono de la kulturdomo superas la kvaliton de la plej multaj ĉefurbaj teatroj. La malgrandaj salonoj por ĉambromuziko, provoj de la dancensembloj ktp. – ĉiuj estas konstruitaj kaj instalitaj kun skrupula zorgemo. Malofte oni vidas tiel impresan harmonion de belo, praktikeco kaj celtaŭgeco.

Kaj la ejoj de la grandioza kulturdomo estas abunde utiligataj: ekspozicioj, teatraj prezentadoj okazas konstante. Antaŭ kelka tempo oni prezentis la faman „Winnetou" de Karl May – en formo de „country musical".

En la grafikista laborejo ni renkontas la grafikiston István *Karkus*, kiun ni prezentas per aparta artikolo ĉi-numere, kaj la junan ceramikistinon Júlia *Viczina*. Ili plenumas duoblan taskon: prizorgas ĉiujn afiŝojn, prospektojn de la kulturdomo, kaj ankaŭ helpas la laboron de la amatora belarta rondo.

Reto de Publika Klerigo

Ni ekscias, ke la Popoldomo ne estas la sola kulturdomo en la urbo. Ekde 1976 funkcias „Minista Reto de Publika Klerigo". Pri ĝia agado informas la gvidanto, Győző *Hubay*.

Li rakontas, ke tiu Reto konsistas el tri kulturdomoj, kiuj specialiĝis pri apartaj aspektoj de la kleriga laboro. Al la Reto apartenas ankaŭ pluraj bibliotekoj kaj junularaj kluboj, kluboj de pensiuloj ktp. La ĉefa subvencianto estas la Sindikata Komitato de la entrepreno „Karbminejoj de Tatabánya", ĉe kiu laboras 13 000 personoj. La Reto pri Publika Klerigo mem havas 120 kunlaborantojn, kaj ĝi estas aparte fiera pri la multaj amatoraj artistaj rondoj, en kiuj aktivas ĉ. 400 personoj. Oni substrekas, ke inter ili multaj ne laboras ĉe la minejoj: la Reto pri Publika Klerigo, kvankam subvenciata ĉefe de la entrepreno „Karbminejoj de Tatabánya", volas servi *ĉiujn* loĝantojn de la urbo, senkonsidere al tio, kie ili laboras. Dum la pasinta jaro oni havis entute 3238 diversajn aranĝojn – do, preskaŭ 10 ĉiutage!

Minista Tago

La preskaŭ-jarcenta karbminado kreis en Tatabánya atentindajn tradiciojn, iun specialan „ministan folkloron". La kulturaj laborantoj de la Reto donas apartan atenton al la vartado de tiuj tradicioj, kaj se oni rigardas la repertuaron de la minista ĥoro kaj la produktaĵojn de la belartaj rondoj, oni povas konstati, ke tiu atento ne restas senfrukta.

Bona okazo por tia vartado estas la Minista Tago, festo de ĉiuj hungaraj ministoj, kiu okazas ĉiam en la unua dimanĉo de septembro. Tiu festo en Tatabánya daŭras tri tagojn, tiam oni disdonas ankaŭ altajn monpremiojn al la ministoj, kiuj – tute prave – nomas tiun premion *premio pro fideleco*. Jes ja, necesas *fideleco* persisti dum la tuta vivo ĉe tiel peza kaj danĝera, sed necesega laboro.

Baldaŭ alvenos septembro kaj la Minista Tago, kiam la lando denove honoros la ministojn, kiuj ĉiutage descendas en la profundan subterejon, por rabi de la tero tion, kion ni ĉiuj bezonegas: varmon kaj lumon. Adiaŭante Tatabánya, mi diras ne „ĝisrevidon", nek „adiaŭ", sed puŝiĝas al mia lango la tradicia minista saluto, al kiu mi kutimiĝis dum miaj lernejaj jaroj: *Bonan ŝancon!* Ministoj uzas tiun saluton, konsciante pri la danĝereco de sia laboro. Nun ni deziras bonan ŝancon al la kulturaj laborantoj, kiuj tenas la torĉon de la kulturo por tiuj, kiuj pasigas ĉiutage ok horojn en subtera mallumo. Ankoraŭfoje: *Bonan ŝancon!*

Vilmos *Benczik*

Aspektoj de la Esperanta elizio

EDWIN DE KOCK

En Esperanto, kiel en aliaj lingvoj, la fenomeno elizio estas ampleksa afero. Malgraŭ la fakto, ke jam dekomence ĝi ludis sian rolon en nia literaturo – precipe la poezia – oni ĝis nun ne studis ĝin sisteme. Pli ol sporade ĝin ja pritraktis kelkaj aŭtoroj, plej notinde Kalocsay; unu persono, Brendon Clark, eĉ klopodis – vane – kondamnigi kaj per propra ekzemplo forpeli ĝin el la lingvo; sed pli-malpli kompletan studon pri la elizio ni ankoraŭ atendas. Mia nuna skizo estu paŝo en tiu direkto.

Kiom da tipoj de elizio efektive ekzistas en nia lingvo? Ordinare oni supozas, ke nur du: ĉe la substantivo kaj ĉe la artikolo. Tamen distingeblas tri ĉefaj manifestiĝoj: *aferezo* aŭ kapelizio, *sinkopo* aŭ mezelizio kaj *apokopo* aŭ finelizio. Ĉiu el ili siavice inkludas subspecojn diverskarakterajn. Precipe ĉe apokopo troviĝas atentinda nombro (pli ol dek), tuŝante preskaŭ ĉiun parolelementon de Esperanto. Ĉu tiu aserto ŝajnas pure fantazia? Ni vidu.

Unue ni tamen estu certaj pri la senco laŭ kiu ni devas kompreni la terminon *elizio.* Ĝi efektive uzeblas dumaniere. Ĝi povas priskribi aŭ la fortrancon de ekzistanta elemento aŭ la neuzon de ero alie utiligebla sed ne ĉeestanta kiel devigaĵo en la koncerna vorto. Ekzemplon de fortrancо liveras la afereza formo *'stas,* ĉar neniu dubus, ke tio estas vortostumpo de *estas.* Aliflanke la sinkopa *poŝtkesto,* sen mezo *o,* anstataŭ *poŝtokesto,* prezentas specimenon de neuzo rilate tiun vokalon. Ŝajnas al mi, ke plej ofte la Esperanta elizio montriĝas neuzo kaj ne fortrancо.

1. AFEREZO

De aferezo (kapelizio) Esperanto konas almenaŭ du kazojn, kiuj konsistigas malsamajn tipojn, kvankam ili ambaŭ troviĝas ĉe la sama, altfrekvenca verbo *esti.*

Grabowski, sekvate far diversaj aŭtoroj, forigis la tutan radikon, konservante nur la verban finaĵon *'as,* k.s. Temas pri neuzo, ĉar la restaĵo prezentas nuran gramatikilon. Tiun ekzemplon oni ne tre emis imiti, malgraŭ ke la ideon proponis Zamenhof mem. Negramatika aŭ maleleganta ĝi tamen ne estas, kvankam aŭdaca. Tre ofte *esti* kaj ĝiaj formoparencoj ne havas veran signifon, nur funkcion, interalie por montri la tempon aŭ modon. Ĉu rilate la ekuzon de *'as* rolon ludis la fakto, ke en lingvoj kiujn la iniciatoro konis aŭ scipovis – ekzemple la hebrea kaj la rusa – eblas konstrui frazojn sen *estas*?

Alian, ŝajne pli novan metodon mallongigi tiun ĉi verbon prezentas *'stas,* k.t.p. Ĉi-foje la aferezo ne tiel drastas, ĉar oni videble fortrancas nur la komencan vokalon anstataŭ preterlasi la tutan radikon. Per tio la lingvo akiras unikan, netipan radikon unusilaban. Ĝi reduktiĝas al la du konsonantoj *'st.*

2. SINKOPO

Sinkopo estas aŭ trancо aŭ neuzo meze de kunmetitaj vortoj. Ĝi do prezentiĝas sur la tereno de vortfarado, konsistigante la solan specon de Esperanta elizio kiu ĝis nun vere abundas – kiel en la poezio tiel en la prozo. Ĉar intima parto de nia gramatiko, kaj ordinaraĵo, ĝi kutime ne estas rekonata kiel sinkopo. Al ĉi nerekono certe kontribuas tio, ke ĝin ne akompanas apostrofo. Laŭ mia scio nur unu alia persono ĝin rimarkis, nome R. Rossetti. Kvankam mia propra eltrovo de la fenomeno okazis jam en 1977 kaj ne deriviĝas de lia, li havis la honoron unue publikigi la fakton.

En Esperanto ekzistas du specoj de sinkopo.

La unua rilatas al la sufiksoj *-ĉj* kaj *-nj,* kiuj ĉe vortformado postulas sonfortrancojn en la radiko, jene: *Vilhelm + ĉj + o* ne troveblas, kaj tion do anstataŭas *Vilhelm – helm = Vil + ĉj + o,* t.e. *Vilĉjo.* Simile *Margarita + nj + o* efektiviĝas kiel *Margarita – rgarita = Ma + nj + o,* t.e. *Manjo.* Alivorte, ĉiam interestas la minusa funkcio de fortranca sinkopo antaŭ la sufiksa aldono. Ĝenerale oni tion rigardas kiel raran ekzemplon de fleksio en alie aglutina aŭ (laŭ Claude Piron) izola lingvo. Tio ĉiukaze inkludas elizian procedon.

La dua speco de sinkopo koncernas la pluformadon. Esperanto ordinare simple kunmetas radikojn (*poŝt + kest + o = poŝtkesto, grand + urb + a = grandurba, mult + angul + a = multangula),* sed ĝi ankaŭ uzas gramatikajn „finaĵojn" – pli ĝuste signojn – post la unua radiko (*poŝt + o + kest + o = poŝtokesto, angl + a + lingv + a = anglalingva, mult + e + kost + + a = multekosta).* Ĉi lasta maniero malpli oftas, kaj oni ĝin ĝenerale utiligas ĉefe pro la kolizio de nefacile prononceblaj konsonantoj; sed ĝi ne estas ignorenda, kvankam ĉe kunmetado la neuzo de tiaj signoj efektive superpeziĝas. Parenteze, tio ĵetas interesan lumon sur la demandon ĉu niaj radikoj per si mem havas gramatikan karakteron aŭ ĝin nur ricevas de la almetataj finaĵoj. En la cititaj ekzemploj ni observas, unue, ke la *-o, -a* kaj *-e* havas funkciojn analogajn al tiuj ĉe la vortfinoj kaj, due, ke ili alternas sen perturbo aŭ signifoŝanĝo kun sia neuzo. Estas kvazaŭ oni farus frazojn en Esperanto sen gramatikaj finaĵoj, dependante ekskluzive sur la ĉirkaŭteksto. Tiu ĉi fenomeno de vortinterna sinkopo foriganta *-a, -o* aŭ *-e* apogas la tradician vidpunkton pri gramatika karaktero ĉe la radikoj mem. Ĝi bone akordiĝas kun la Kaloĉajaj analizoj en *Lingvo, stilo, formo,* kaj verŝajne ankaŭ la izollingva teorio de Piron.

Sinkopo laŭregule permesas larĝan preterlason de la menciitaj vokaloj, kio kontrastas kun apokopo, kiu ordinare toleras la neuzon nur ĉe *-o.* Kompreneble mezelizio koncernas la rilatojn interradikajn, dum finelizio rilatas al intervortaĵoj. Sed pro la strukturo de Esperanto ni ne devus akcenti tiun diferencon ĝisekscese, memorante la ideon de Zamenhof, ke ĉiu radiko iusence funkcias kiel vorto memstara. Ekzistas, efektive, grava similo inter la seno de *o* en, ekzemple, *poŝtkesto* kaj mankanta, vortfina *-o* ĉe *kest'.* Ambaŭ elizioj efektiviĝas per neuzo kaj ne fortrancо, malgraŭ la nur grafisma apostrofo de ĉi lasta vorto.

3. APOKOPO

Apokopo (vortfina elizio) estas la plej konata tipo en Esperanto, precipe ĉe la poemarto. Oni ĝenerale emas supo-

zi, ke ĝi limiĝas je du vortospecoj, la substantivoj kaj la artikolo. Sed almenaŭ eksperimente apokopo jam aperis ĉe preskaŭ ĉiuj parolelementoj. Ĉi tion ni devas nun laŭpunkte konsideri.

3.1 Artikola elizio

Laŭ la lasta el la famaj dek ses reguloj de la Fundamenta gramatiko, oni rajtas uzi *l'* anstataŭ *la.* Pro tio, ke konsonanto ne povas en nia lingvo stari sola, sed bezonas la apogon de alia vokalo – aŭ antaŭe, kiel en *de l'*, aŭ sekvanta, kiel en *l' akvo* –, ĝi prezentas fortranĉon kaj ne simplan neuzon. Do ĝi ne plene paralelas, ĉi-rilate, kun la substantiva *-o.*

Artikola elizio iafoje aperas ankaŭ proze, sed ĝis nun ĝin multe pli ofte uzas la poetoj.

3.2 Substantiva elizio

Estas interese ke la jam aludita regulo en la Fundamento formulitas iom malsame per la diversaj nacilingvoj uzitaj far Zamenhof. Laŭ la franca teksto oni povas subpremi („supprimer") la vokalon, laŭ la angla ĝi rajtas esti forfaligata („dropped"), sed laŭ la germana ĝi ellaseblas („kann ausgelassen wereden"). Ĉu pro tio oni devas do rezoni, kiel multaj faras, ke temas pri fortranĉo de *-o,* kun la apostrofo kiel videbla postesigno de la operacio? Ne necese, ĉar samprave kaj prefere oni povas vidi la substantivan elizion kiel simplan neuzon.

Efektive, la Esperanta substantivo diferencas de la adjektivo kaj la *e*-adverbo en tio, ke ĝi povas havi du formojn, egale validajn, nome sen aŭ kun finaĵo. Do ekzemple *dom'* estas ne nur radiko sed ankaŭ vorto, kun plena uzrajto, same kiel *domo.* La apostrofo, kiu konsistigas parton de la kutima maniero skribi eliziitan substantivon, kompreneble ne tuŝas tiun ĉi fakton en ĝia kerno. Gi estas signo pure ortografia sed ne lingva, ne aperante ĉe la parolo aŭ deklamado (ankaŭ ne en la teksto de miaj nuntempaj poemoj).

Ekzistas inter certaj samideanoj emo tro limigi la elizion Fundamentan. Iufoje oni priskribas ĝin kvazaŭ ĝi estus nura licenco, iel kontraŭa al la vera spirito de la lingvo, kvankam tolerebla en esceptaj kazoj, pro respekto al Zamenhof aŭ la poezio. Tio tute misas. La gramatikan mekanismon ne plene dominas la finaĵoj, kiel ajn utilaj. Tre gravas ankaŭ la ĉirkaŭteksto, kaj aliaj faktoroj, per kiu ebliĝas la substantiva kategorieco sen *-o.* Tia ĉi elizio prezentas ne licencon sed uzeblan regulon.

Alia, simila eraro estas supozi, ke ĝi havas nenian civitanecon en la prozo, ke ĝi apartenas sole al la regno de la poetoj. Sed ankaŭ tion ne intencas aŭ sugestas la koncerna regulo Fundamenta. Konsentite, ke en nia ĝisnuna lingvaĵo – pro tradicia konservemo – praktike estis nur la poezio kiu vere fruktuzis ĝiajn latentojn. La prozistoj ĝenerale ne elizias, sed nenio tion malpermesas principe. Kiu scias, la estonteco ankoraŭ povus alporti diferencan praktikon, eble kiam la Lingvo Internacia fariĝos ĉiutagaĵo vaste uzata far rapidemaj parolantoj. Ĉiukaze *-o* ne tute paralelas kun *-a* kaj *-e,* ĉar ĝi ne montriĝas deviga kaj do estas forlasebla.

La substantivan elizion oni ankaŭ ne limigu laŭ la implicoj de PIV, kiu ŝajne volas rezervi ĝin por radikoj substantivaj, sugestante, ke licas ekzemple diri *hom'* anstataŭ *homo,* sed ne *bel'* anstataŭ *belo* aŭ *kur'* anstataŭ *kuro.* La kialigo estas, ke *-o* post substantivaj radikoj prezentas elementon pleonasman.

Sed, kiel mi jam montris, la substantivecon povas indiki ne nur *-o* sed ankaŭ la ĉirkaŭteksto kun siaj sintaksiloj. Ekzemplas la apudesto de artikolo, adjektivo aŭ verbo. Krome, tial ke la aliajn ĉefajn parolelementojn signas la finaĵoj *-a, -e, -i* ktp., la uzo ankaŭ de *-o* fariĝas negrava, almenaŭ el vidpunkto funkcia. Pro tio la substantiva elizio neniel malhelpas la klarecon, kiun Waringhien konsideras la ĉefa kriterio gvidinta Zamenhof ĉe la ellaborado de Esperanto (*1887 kaj la sekvo,* p. 45.)

Do *bel'* kaj *kur'* estas formoj tute akceptindaj.

Cetere, se ĉi-rilate oni emas uzi la vorton *pleonasma,* oni devus apliki ĝin pli vaste, ĉar iusence substantiva *-o* ĉiam montriĝas tia. Sed senrola ĝi kompreneble ne estas. Interalie ĝi ebligas la almeton de *j* kaj *n.*

La fakto, ke la Esperanta substantivo povas havi du formojn, kun aŭ sen *-o,* postulas pritrakton pli ampleksan ol tiu, kiun mi rajtas dediĉi al ĝi en ĉi eseo prielizia. Sed ke, ekzemple, nacilingvaj vortoj kiel *house, Haus* aŭ *maison* ne egalas nur *domo* sed ankaŭ *dom',* tion devus zorge atenti lingvistikaj analizantoj, kiuj serĉus deirpunkton por siaj diskutoj de la gramatika kategorieco.

Ĉu oni povas do rigardi la substantivan elizion kiel senlime utiligeblan, ankaŭ proze? Nu, ekzistas almenaŭ unu bona kaŭzo por sindetenoj. Ĝi ne estas gramatika sed eŭfonia. Ne taŭgas formoj kiel *lingv', astm'* aŭ eĉ *prism',* ĉar apenaŭ prononceblaj kaj malestetikaj. Sentema orelo Esperanta evitus ĉiujn eliziojn langotordajn. Tiaj estas ankaŭ la malpli drastaj *tabl'* aŭ *patr',* prezentantaj tipojn akceptindajn en iuj nacilingvoj sed ne ĉe ni. Esceptojn al tio ni povus trovi en kombinoj kun vokalo komence de vorto sekvanta.

3.3 Adjektiva elizio

Ĉi tion identigis Kalocsay en *Lingvo, stilo, formo,* sed montris iom da hezitemo pri ĝia uzeblo por nia poezio. Malgraŭ lia aŭtoritata ŝajnpermeso kaj neoftaj ekuzoj ĉe iuj poetoj, ĉi licenco tamen neniam enradikiĝis. Feliĉe, ĉar la adjektiva *a*-elizio estas serioze kontraŭregula. Ĝi konfliktas kun la Fundamento, estigante konfuzon kun la substantivo.

Kaj *o*-formoj kaj *a*-formoj havas tre altan frekvencon en Esperanto. Ĉar ne nur la gramatika diferenco sed ankaŭ la spirito de la lingvo mem postulas netan kaj klare indikatan apartigon de adjektivoj disde substantivoj, elizio povas havi vivorajton ĉe nur unu el ili.

Ekzemplon de duspeca apokopo en apudstarantaj vortoj mi ĉerpas el poemo apartenanta al fasketo, eble ankoraŭ ne aperinta, kiun mi ricevis dum 1960 de la aŭtoro. (Ĝi troviĝas en la komenco de „Mi vidis ŝipon" far la bedaŭrata L.N. Newell, kies arton mi alte estimas:

„Mi vidis ŝipon en la *last haven...*"
(Mia kursivigo.)

Ĉi-kaze la poeto sciis eviti sencokonfuzon, sed en la sama verko li ankaŭ diras:

„Kaj ĉian belon de l' *fier maten*
La tempo kaj forgeso homa glutos..."
(Mia kursivigo.)

Ĉu temas pri *fiero matena* aŭ *fiera mateno?* En poemo ĉio finfine estas ebla!

Ne, bedaŭrinde, la preterlaso de la *-a* kreus por ni problemojn. Ĝi meritas bojkotadon. Tial ĝi veršajne ne prosperos en la estonteco. PIV ĝin saĝe rifuzas.

3.4 Numerala elizio

Ĉe la numeralo neofte renkonteblas *un'* por *unu.* Tio apartenas al tute alia speco de apokopo ol la jam konside-

rita. La forigo de la finvokalo *-u*, kiu ĉi-kaze havas nenian gramatikan funkcion kategoridistingan, ne povas kolizii kun io ajn. Estas do afero malgrava ĉu tiun ekzemplon oni sekvos aŭ ne. Ni povas nomi ĝin elizio eksterregula (kiel ĉe afereza *'stas*), kiu ĝuste pro tio ne rigardeblas kiel kontraŭregula.

Sed kio pri *kelk, mult, plur* kaj *pok?* Temas pri *a*-vortoj, kiujn oni ĝenerale nomas kvantaj adjektivoj. Se ni rigore insistus pri tiu kategoriigo, la preterlaso de la *a*-finaĵo kompreneble estus rifuzinda, pro la motivo menciita en la antaŭa sekcio. Tamen ekzistas bonaj kialoj ankaŭ konsideri ĉi vortojn kiel nedifinajn numeralojn, kion ja faras *Plena Gramatiko.* Pro tio ili lokiĝas en iom aparta klaso ol la ceteraj adjektivoj.

La numeraloj *unu* ĝis *dek, cent* kaj *mil* malhavas gramatikan finaĵon. Elizio ĉe *kelk, mult, plur* kaj *pok* efektive prezentas emon konformigi ĉi-lastajn al tiu aro. Alivorte, ĝi konsistigas alikategoriigon, kaj interesan ekzemplon de lingva evoluo en Esperanto, almenaŭ ĉe la poetoj.

Notindas, ke de la komenco troviĝas kvazaŭ forma ŝanceliĝo ĉe la kvantaj adjektivoj/nedifinaj numeraloj, eble precize pro tio, ke oni povus grupigi la koncernajn vortojn jen en unu jen en la alia de tiuj klasoj. Plia faktoro verŝajne estis la manko en nia lingvo de specife numerala finaĵo. Se Zamenhof adjektive destinis tute la *-a* al *kelka*(j), *multa*(j) kaj *plura*(j), li agis malsame rilate la tabelajn *-om* vortojn.

Iam, en recenzo de la Kaloĉaja traduko *Somermeznokta Songo,* mi kondamnis elizion ĉe la pritraktataj vortoj, kvazaŭ ili plene apartenus al la adjektivo, sed nun ŝajnas al mi, ke tio estas tro severa. Pro la faktoro de ilia numeraleco oni povus almenaŭ toleri tian ĉi *a*-apokopon, kiu kompreneble konsistigas neuzon kaj ne fortrancon. Grava motivo por tiu licenco troviĝas en la fakto, ke temas pri nur malgranda grupeto da vortoj kaj ne vasta lingvotereno. Mi ne dubas, ke la gramatika sistemo de Esperanto povas – se necese – akomodi sin al elizio de *kelk, mult, plur* kaj *pok.*

3.5 Verba elizio

Sub *aferezo* mi jam aludis la formojn *'as* kaj *'stas* k.s., kio montras, ke ankaŭ ĉe la verbo renkonteblas elizio.

Sed ĝi troviĝas krome sur alia tereno, tiu de abruptaj, kvazaŭ interjekciaj ordonoj, ekzemple *halt', marŝ'* kaj *front'.* Tio estas iusence dua, aldona formo de la imperativo. Ni povus tial eĉ rigardi ĝin kiel specon de *u*-elizio.

De tiu ĉi ili tamen diferencas en unu atentinda rilato. Dum la substantiva apokopo troviĝas ĉe radikoj de ĉia kategorio, la verba eblas nur ĉe la propraspeca. Alivorte en formo kiel *halt'* temas pri la uzo de verba radiko kiel vorto memstara kaj ĉiam verba. Ne licas tiamaniere uzi ekzemple *man',* kiu ne povas ne esti substantivo kaj sinonimo de *mano.* Kontraŭe *halt'* facile funkcias, se tion ebligas la ĉirkaŭteksto, samsence kiel *halto.*

Krom ke la verba elizio havas malaltan frekvencon kaj tial prezentas randan fenomenon en la lingvo, rolas ankaŭ alia faktoro interesa, nome la manko de unu specifa finaĵo por la Esperanta verbo. Kontraste kun *-o, -a* kaj *-e,* kies funkcio – precipe ĉe la du laste menciitaj – estas indiki la kategorion parolelementan (ni havas la areton *-as, -is, -os, -us* kune kun *-u* kaj *-i,* kiuj signifas nur la specifan tenson, modon, aktivan formon, ktp. Ĉe la malesto de vokalo por montri ĝeneralan verbecon, kiam bezonas iu formo ne indikebla per la kutimaj rimedoj, la uzo de la nuda radiko ne estas mallogika.

Aliflanke ne konsilindas plivastigi la verban elizion sen forta motivo. Oni evitu ĉian kolizion kun la substantiva apokopo.

3.6 Interjekcia elizio

Parenca al kaj ne ĉiam distingebla de la tipo ĵus pritraktita estas interjekcioj kiel *pat'* kaj *plaŭ',* ĉe kiuj la verbeco tamen multe malpli evidentas aŭ eĉ mankas. Tio koncernas vortospecon kvazaŭ ekster la ordinaraj kategorioj de la gramatiko. Ĝi ankaŭ ne vere konfliktas kun la substantiva elizio pro malalta frekvenco. Ĉe *pat'* ni trovas kazon de simpla neuzo, sed *plaŭ'* el *plaŭdi* – Zamenhofa kreaĵo – krome prezentas fortrancon.

3.7 Adverba e-elizio

Adverban apokopon de *-e* renkonteblas malofte. La ekzemplo plej bone konata certe estas *dank' al,* kiu eble stabiliĝis pro nacilingvaj paraleloj. Iafoje verkistoj hezite emas al plivastigado de tiu modelo. Laŭ mi la *e*-elizio ĝenerale estas evitenda, pro la danĝeroj de troaj kolizioj kun la substantivo. *E*-adverbo prezentas gravegan specon en nia lingvo. Efektive, ĝuste al tiu finaĵo – egale kun la akuzativo – ŝuldiĝas tiom de ĝia mirinda flekseblec o. Ĝi pensigas unuflanke pri la latina ablativo, ofte kun tiu vokalo, kaj aliflanke pri la bantua (zulua, xhosaa, ktp.) lokativo, kiun oni formas per prefiksa *e-,* plus iafoja afikso – kvankam la Esperanta adverbo havas funkciojn multe pli vastajn.

Por gardi tiun ĉi trezoron de la Zamenhofa sistemo oni evitu la *e*-adverban elizion.

3.8 Prepozicia elizio

Speciala, interesa kazo tamen estas *far,* nova prepozicio valora por la lingvo, kiu originis ĉirkaŭvoje el verba radiko pere de adverba *e*-elizio. Unue tio estis *fare de.* Iom analoge al *dank' al* oni poste preterlasis la finan *-e,* sed skribante la rezultan formon kiel unu vorton, *farde.* Poste forlasis la *de* per dua apokopo. Ambaŭkaze la elizia procezo konsistigas neuzon anstataŭ fortrancon.

3.9 Aŭ-elizio

Ĉe Grabowski kaj iafoje ankaŭ aliuloj oni trovas elizion de *-aŭ.* Ekzemploj estas *presk', kvaz', anstat'* kaj *apen'.* Tio rilatas precipe al adverboj, sed ne – kiel oni eble supozus supraĵe – al la forigo de finaĵo. Mi diru tion nemiskompreneble: *-aŭ* neniel estas gramatika indikilo. La distrancо ĉe tia elizio tuŝas simplan diftongon. Ĝi sekve ne povus rezultigi konfuzon inter vortospecoj. Memorendas, ke ekzistas vera diferenco inter integra, ne diserigebla vorto kiel *preskaŭ,* kiu per si mem estas adverbo, kaj ekzemple *hunde,* kunmetita el substantiva radiko *hund* plus *-e. Presk'* ne rigardeblas kiel radiko. Ĝi estas vorto apokope mallongigita.

Povas troviĝi iuj dubantoj, por kiuj *-aŭ* tamen ja aspektas kiel finaĵ gramatika kiel *-o, -a* kaj *-e.* Por pruvi la kontraŭon mi mencias, ke tiu diftongo povas aperi ĉe preskaŭ ĉiu parolelemento, laŭ la sekvaĵoj (apoge sur PIV):

3.9.1 Adjektivo: ambaŭ
3.9.2 Adverbo: almenaŭ, apenaŭ, baldaŭ, hieraŭ, morgaŭ, kvazaŭ, preskaŭ
3.9.3 Interjekcio: adiaŭ, miaŭ
3.9.4 Partikulo: kvazaŭ
3.9.5 Prepozicio: anstataŭ, antaŭ, ĉirkaŭ, kontraŭ, malgraŭ

3.9.6 Pronomo: ambaŭ
3.9.7 Sunjunkcio: anstataŭ, antaŭ (kune kun *ol*), apenaŭ, kvazaŭ
3.9.8 Substantivo: hieraŭ, morgaŭ*

Krome troviĝas la konjunkcio *aŭ* kaj la numeralo *naŭ*, unusilabaĵoj en kiuj la diftongo same ne estas gramatikilo sed simpla sonkombino.

Paradokse *aŭ* provizas certajn vortojn plursilabajn por ke tio *ne* funkciu kiel finaĵo. Eble oni povus nomi ĝin *malfinaĵo!* Ĝenerale ĉiu Esperanta vorto kun pli ol unu silabo, finiĝanta per vokalo, apartenas al specifa vortoklaso, ĉar la *-a, -e, -i, -o, -u* indikas parolelementojn aŭ almenaŭ verban modon. Tiuj finaĵoj cetere estas forigeblaj por cedi lokon al iu alia ero. Sed *-aŭ*, tute kontraŭe, signas neniun specifan kategorion kaj ankaŭ ne distranĉeblas, por ke almetiĝu iu alternativa vokalo. Ĝi ĉiam restas integra parto de la koncerna radiko mem. Ĝuste tial iuj reformuloj siatempe tre eraris, forĵetante *-aŭ* favore al *-e*, kies funkcio tute diferencas. Vorto kiel *hieraŭ* manifestas per sia primitiva adverbeco ion esence alian ol ekzemple *bone*, kiun ĝuste la finaĵo precizigas kiel adverbon anstataŭ adjektivo. Ke *-aŭ* prezentas parton nedisigeblan de la koncernaj vortoj, kion montras formo kiel *hieraŭa*. La plukonstruado efektiviĝas per aldono kaj ne substituo, kiel ĉe *rapide/rapida (rapid+e/a)*. *Aŭ*-elizio do estas simpla fortranĉo de sono, sed ne de finaĵo. Ĝi tute paralelas la faligon de fina *u* ĉe *un'*.

En la antaŭaj paragrafoj nekompletaj mi mallonge aludis – sub aferezo, sinkopo kaj apokopo – almenaŭ dek tri specojn de elizio en Esperanto, kio montras, ke ĝi estas fenomeno sufiĉe ampleksa. Ĝi troviĝas kiel fortranĉo kaj, precipe, neuzo. Rilate al la Fundamento oni povus tipigi ĝiajn aperoformojn kiel laŭregulajn (ĉe *-o, la* kaj sinkopaj vortkunmetoj), kontraŭregulan (kaze de adjektiva *-a*), alikategoriige regulosanĝajn (koncerne la radikojn *kelk, mult, plur* kaj *pok*) kaj eksterregulajn (ekzemple *'stas, un'* kaj *aŭ*-apokopo). Se ĉi-lasta speco ne estis antaŭvidita en nia origina gramatiko, ĝi tamen ne konfliktas kun aŭ la kohereco aŭ la spirito de la lingvo. La kialo por ĉi tio kuŝas en la fakto, ke eksterreguleco interrespondas bone kun precipe tri aferoj: fortranĉo prefere al neuzo, malalta frekvenco kaj limigitaj kategorioj.

Se ĝi ne minacas la integrecon de Esperanto, nek tuŝas ĝian kernon, elizio restas flankafero de unuopaj vortoj. Tiukaze ĝi povas eĉ provizi eblojn evoluajn, krom oportunaĵoj por la poetoj. Ekzemple formoj kiel *'stas* kaj *kvaz'* povus esti valoraj, ĉar la koncernaj vortoj – precipe la unua – aperas ofte, meritante unusilabigon.

La elizio kapablas ludi rolon krean en la dinamiko de nia lingvo daŭre disvolviĝanta. Speciale frapa ekzemplo estas la jam aludita prepozicio *far*, kiu solvas veran problemon ĉe la tro ofte uzata kaj multsenca *de*, kvankam ĝi ja ne apartenas al la kategorio eksterregula. Ĝi devenas el *e*-elizio, ĝenerale evitenda, kiu ĉi-rilate tamen liveris bonan rezulton.

Ankaŭ vidiĝis, ke elizio havas implicojn gravajn por la Esperantaj gramatikanalizoj. Espereble ĉi tio ne restos senefika en niaj vicoj.

Klare la tuta temo meritas kaj iam espereble ankaŭ ricevos atenton pli ĝisfundeman ol tiu kiun mi povis dediĉi al ĝi en unu artikolo. Jen tamen, intertempe, mia kontribuo.

* En nia PIV-ekzemplero ili tamen estas adverboj. (Red.)

LEHEL

Vojaĝante, ripozante

SIFONO



Produktas:

HŰTŐGÉPGYÁR

Por kio servas bildrakontoj?

Sur la apuda paĝo oni trovas fragmenton el la baldaŭ aperonta bildrakonto „La aventuroj de Tom Sawyer". Ĝi estos la kvara en la vico de la bildrakonta serio de Hungara Esperanto-Asocio. La serio ekis somere de 1978 per „La filoj de l' ŝtonkora homo" de Mór *Jókai,* ĝin sekvis en 1979 (fakte en 1980) „Steloj de Eger", adaptaĵo de la historia romano de Géza *Gárdonyi,* kaj aŭtune de 1980 eliris „La Faraono" de Boleslaw *Prus.*

Miskomprenoj

La recenza reeĥo pri tiuj tri eldonaĵoj estis vasta kaj *ĝentila.* Jes, *ĝentila,* ĉar la plej multaj recenzistoj havis sian rezervon pri niaj bildrakontoj, sed, verŝajne pro respekto al la grava financa fortostreĉo de la eldonejo, ili ne volis tradraŝi la libretojn.

La recenzista rezervemo estis esence dutipa. Iuj trovis niajn bildrakontojn tro konvenciaj, el ĉiuj vidpunktoj. Oni malaprobis remaĉadon de tedaj, trolegitaj klasikaj romanoj, kiuj malhavas originalan, spritan modernecon, promesas nenian surprizon por la leganto. Same malplaĉe oni deklaris pri la tradicie desegnitaj bildoj, kiuj ankaŭ malhavas ajnan originalecon – kvankam ĉiuj rekonis, ke tiuj bildoj estis faritaj de vera artisto, kiu tamen bridis sian talenton por la plejeble fidela bildigo de la aŭtora penso. Tiuj kritikistoj sugestis, ke ni eldonu estonte verajn „komiksojn", t.e. bildrakontojn, kiuj ne estas adaptaĵoj de aliĝenraj verkoj.

Aliaj recenzistoj havis aliajn skrupulojn. Multaj esprimis sian timon, ke ni volas anstataŭi la legadon de ampleksaj klasikaj romanoj per kelkdekpaĝa kripligita resumo. Ni ricevis ankaŭ leterojn de legantoj, kiuj *postulis* la eldonon de la plena teksto de romanoj, samtempe ankaŭ ĉesigon de la „kripligado de la mondliteraturo".

Celoj de la eldonejo

Kompreneble, la eldonejo tute ne celis „anstataŭi la mondliteraturon" per siaj 40-60 paĝaj kajeroj. Ni ne kontestas, ke iuj eble havos la falsan iluzion vere *koni* la koncernajn verkojn post tralego de la bildrakonta adaptaĵo, sed la sama falsa iluzio povas naskiĝi ankaŭ per fuŝaj televidaj, kaj filmaj adaptaĵoj. Tamen oni ne rezignas daŭre fari televidajn adaptaĵojn de konataj romanoj.

La rezervojn de la unue menciita recenzista sinteno ni povas respondi nur per tio, ke ni *ne deziris eldoni suverenajn, aŭtonomajn verkojn.* Niaj bildrakontoj servas celojn pure *didaktikajn,* nome, por legigi esperantistojn. Do, oni rigardu ilin ne kiel beletron, ne kiel grafikan arton, sed kiel specialajn lernilojn. Ili celas legigi tiujn esperantistojn, kiuj posedas pli-malpli la plenan Esperantan gramatikon kaj ankaŭ certan leksikon, sed ili malhavas la rutinon legi en fremda lingvo, kaj la liter-maro de ordinara libro ŝokas, fortimigas ilin. Ofte tiuj esperantistoj bone babilas, libere komprenigas sin en ĉiuj eblaj situacioj, sed la struktura (kaj ofte enhava) komplikeco de la beletra *skriba* lingvo pruviĝas por ili malfacila, manke de la relative facile akirebla rutino „deĉifri" ĝin.

Kriterioj de elekto

Tiuj celoj kompreneble klare difinas la kriteriojn de la elekto de eldonotaj bildrakontoj. *Klasikaj romanoj* havas plurajn avantaĝojn. Unue, la *prestiĝo* de tiuj verkoj favore influas la legonton. Due, tiaj romanoj, precipe la historiaj, havas *interesan, atentokaptan,* tamen relative *nekomplikan agadon.* Trie, ili estas *vaste konataj,* do, la leganto povas intimiĝi en la romana mondo eĉ antaŭ ol komenci la legadon, kaj tiu cirkonstanco signife *helpas la komprenon* de la teksto. Do, la modestajn lingvoscion kaj legrutinon fortigas ekstertekstaj faktoroj, sed rezulte de tio nelerta leganto tamen povas sperti travivaĵon de sukcesa legado en Esperanto, kaj tio nepre favore influos lin en lia posta sinteno al librolegado.[1]

Tia ekstertekstа faktoro estas ankaŭ la bildoj. Evidentas, ke bildoj devas esti harmoniaj kun la etoso de la klasika romano (do ili ne povas esti modernaj), sed ankaŭ el didaktika vidpunkto necesas, ke ili estu klaraj, tuj-kompreneblaj – neniel enigmaj.



Granda eldonkvanto

Ĉar la nombro de la alcelitaj esperantistoj estas granda, la eldonitaj bildrakontoj povis aperi en *po dek mil ekzempleroj.* Tiu eldonkvanto – tre malofta ĉe esperantlingvaj libroj – ebligis ankaŭ akiron de kelkaj reklamoj, kiuj povis signife moderigi la vendoprezon de la teknike belaj kajeroj. Kompreneble, ne ĉiuj dek mil ekzempleroj tuj vendiĝas; ekzemple el „La filoj de l' ŝtonkora homo", aperinta antaŭ tri jaroj, vendiĝis nur iom pli ol la duono. Sed la eldonejo regajnis sian investitan monon, kaj tamen ĝi donis belan Esperantan libron je malalta prezo al ses mil esperantistoj.

Necesas do, ke oni akceptu la bildrakontojn kiel specon de *aplikita beletro.* Tio ne estas sakrilegio, ja vera beletro ĉiam celis *servi* la homon: lian animan perfektiĝon, delikatiĝon de lia pensado ktp. – kial ĝi ne povus helpi al li en la ekposedo de legtekniko, legrutino en fremda lingvo?

Vilmos *Benczik*

1 Tiamaniere bildrakontoj nepre servas ankaŭ la edukadon de legantoj por la konsumado de la vera esperantlingva literaturo.

Mark Twain:

La aventuroj de Tom Sawyer

La kalkado de la barilo fare de Tom Sawyer kaj liaj amikoj estas unu el la plej memorindaj scenoj de la tutmonda porjunulara literaturo. La trafaj desegnaĵoj de Attila Dargay bildigas la klasikan verkon de Mark Twain por la esperantistaro.

„La aventuroj de Tom Sawyer" estas la kvara libro de la bildrakonta serio de Hungara Esperanto-Asocio. Kiuj havas la ĝisnunajn tri verkojn, certe volas havi ankaŭ la kvaran, kiuj ankoraŭ ne konas la serion, tiuj ekkonu ĝin per „La aventuroj de Tom Sawyer".

Mark Twain: La aventuroj de Tom Sawyer. 32 p. 24 cm. Kun koloraj kovriloj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1981. ISBN 963 571 085 2 . Prezo: 18,– forintoj (por Hungario), 4,80 gld. (por ne-socialismaj landoj).

István Nemere

FORGESO

Horon post la malsupreniĝo ili komencis la esploradon. Antaŭ ok monatoj, ĉe forflugo jene parolis al ili la Direktantoj: „Veturu al tiu planedo. Pasintjare vizitis ĝin Cander kaj Borisov, la personaro de „Zeta-14". Ili ne revenis, eĉ vivsignon pri si ne donis... Eksciu, kio okazis! "

Jam preskaŭ unu kaj duono da jaroj pasis depost la alveno de Cander kaj Borisov. La „Zeta-14" staras tie, ne pli ol cent metrojn malproksime, ili vidas ĝin sur televidekranoj. Post iom da tempo eklumas verda lampeto; la kodita raporto alvenis en la dekodilon kaj preskaŭ tuj aperis sur la ekrano. „En la atmosfero la parto de oksigeno estas... konsisto de humo... resumo mikrobiologia, floro, premo de atmosfero, gravito, nombro de tagaj horoj, cirkultempo..."

Terpier super la ŝultro de Bartelli ĵetis rigardon al la ekrano:

– Bone. Ni povas eliri... Venu.

– Kaj se okazos io? – Bartelli ĉiam estis pli pesimisma. – Ĉar ne forgesu: ankaŭ ili nur eliris kaj...

– No bone, ni survestu skafandrojn – Terpier ne ŝatis diskuti.

Ekstere atendis ilin blankeca ĉielo, ebena pejzaĝo, sabloza humo. „Unu el ni devus resti en la ŝipo" – tamburis la Leĝo en kapo de Bartelli. Tamen li iris post Terpier.

– Rigardu! Tie... iliaj spuroj! – montris Terpier al direkto de la „Zeta-14".

Vere. Piedspuroj de homoj irantaj tien-reen, sencele.

– Malnovaj spuroj – deklaris Bartelli. – Verŝajne ĉi tie maloftas la ventoj, ne moviĝas la sablo...

La du spacveturistoj alvenis al la „Zeta". La enirpordego estis malfermita. Ili rigardis unu al la alia, mirante, poste Terpier enpaŝis.

Ĉe la kluzkamero pendis unu skafandro; la duan ili trovis en la lifto, ĵetitan sur la plankon. Homo ne estis en la „Zeta".

– Interese – diris Terpier, kiam traserĉinte la spacveturilon, ili denove renkontiĝis en la direktejo – interese. Ili malaperis senspure...

– Ni trovis la skafandrojn. Do, kie estas ili?

– La nutraĵo ankoraŭ sufiĉas por du jaroj, sed laŭ la registrilo de la nutraĵpreparmaŝino, de dekok monatoj eĉ unu porcion ĝi ne donis al iu ajn... La sama situacio estas rilate akvon, medikamentojn, mikrofilmojn. Same la oksigeno sufiĉas ankoraŭ por jaroj. Ankaŭ la energiodonan parton de motoroj almenaŭ unu kaj duonon da jaroj oni ne funkciigis.

– Tio praktike signifas, ke de dekok monatoj ne estas homoj en la „Zeta-14".

– Kaj vi scias, ke Cander kaj Borisov antaŭ preskaŭ precize dekok monatoj descendis sur la sablon de tiu planedo. – Terpier puŝis kelkajn butonojn, montris al la eklumiĝintaj ekranoj: – Ĉu vi vidas? Ili fiksis neniun esplorindikon en la magnetaj memoriloj.

– Do, kion ili faris? Kaj kie nun ili estas? – kriis Bartelli.

– Mi eĉ ne konjektas. Nur unu afero estas certa: Cander kaj Borisov antaŭ dekok monatoj descendis ĉi tie. Ekde tiam la spacveturilo ne ŝanĝis sian lokon. Kaj ili malaperis.

– Kaj ankoraŭ io – montris Bartelli al la ekrano de analizaparato – antaŭ ol eliri, ili samtiel, kiel ni – analizis la indikojn de la planedo, rigardu: kunmeto de atmosfero, mikrobiologio, gravito...

Sekvonttage ili trovis la kadavron de Cander. La spacveturisto preskaŭ nude kuŝis kvarcent kvindek metrojn de la „Zeta"; lia korpo jam duone enpremiĝis en la sablon. Terure maldika li estis; liaj brakoj kaj femuroj kvazaŭ nuraj ostoj, la ripoj preskaŭ trapikis la haŭton. Bartelli hororiĝante observis la enfalintan vizaĝon de la mortinto, sur kiun terura sufero gravuris la sulkojn.

– Jam delonge li ne vivas – diris Terpier. – Delonge. En la ĉi-tiea atmosfero videble ne tiel rapide putriĝas la homa korpo. Ĝi fariĝas mumio... – kaj kvazaŭ flanke li aldonis: – Cander malsatmortis.

– Malsatmortis...? – Bartelli montris al „Zeta", kies arĝente brilanta pinto vidiĝis inter la montetoj. – Ja tie estas la manĝaĵo! La akvo, la medikamentoj, ĉio!

– Cander malsatmortis – ripetis serioze Terpier kaj ekiris reen. Li ne ŝatis diskuti. Bartelli sciis, ke Terpier pravas; fine ja el ili du Terpier faris la kuracist-ekzamenon; siatempe li eĉ faris esploradojn mikrobiologiajn kaj laboris en anatomia instituto.

Posttagmeze ili portis Cander al la spacveturilo kaj metis la kadavron en fridujon. Sekvontmatene sescent okdek metrojn oriente de la „Zeta" ili trovis la korpon de Borisov. La malfeliĉa spacveturisto ne diferencis de Cander – eĉ ŝajnis al Bartelli, ke li estis pli maldika ol Cander. Sur la turmentita vizaĝo de la Borisov-mumio la sulkoj estis eĉ pli profundaj...

Terpier komencis la sekcadon, Bartelli preparis raporton por la Tero. Per mikrofono li surbendigis la viditaĵojn. Antaŭ la fino li ĉiam pli ofte devis haltigi la aparaton, pensadi. Li denove vidis image la mumiiĝintajn korpojn.

Eksonoris la ferdeka telefonaparato.

– Bartelli... aŭskultu min... Mi trovis la kaŭzon. – La voĉo de Terpier estis tre stranga, ŝajnis al Bartelli, ke lia amiko parolas per retenata ekscito, samtempe timego – Bartelli... survestu skafandron kaj fuĝu.

Bartelli sentis, ke lia gofgo kunpremiĝas.

– Kion vi diras...?

– Fuĝu de tie ĉi! Mi trovis ĝin... io atakas la homan cerbon... la ĉelojn kolektantajn la indikojn... la krustan parton de grandcerbaj hemisferoj... sed vi tion ne komprenas... ni ne havas nun tempon... Forveturu! Per la „Zeta" vi povas reveturi al la Tero, nia veturilo jam estas infektita... Rapidu... por mi jam estas malfrue...

– Sed kio ĝi estas...? – kriis Bartelli. – Diru, kia malsano ĝi estas! Kio okazas kun vi...?

– Mi ne scias – alvenis la mallaŭta respondo. La voĉo de Terpier fariĝis ĉiam pli konfuza, la paŭzoj inter vortoj plilongiĝis – elĉerpiĝas... la memoro... fuĝu...

Post momento Bartelli jam estis en la kluzkamero. Poste li vadis tra la sablo al la „Zeta". Zorge li fermis la pordon, desinfektis la kluzkameron, kaj supreniris al la direktejo.

Sur la ekrano li vidis Terpier.

Lia amiko elvenis el ilia spacveturilo, vestita en skafandro, sed sen kasko. Ekiris al sudo, poste haltis, rigardadis. Kaj li ekiris al la alia direkto. Intertempe li forĵetis de sur si la skafandron; iomete tiris ĝin post si per la zono, poste eĉ tion li forĵetis.

– Elĉerpiĝas... la memoro – Bartelli senpove kaptis la randon de la direkteja pupitro. Li nun devus eliri, enporti Terpier, veturigi lin hejmen, al la Tero. Ne lasi lin ĉi tie, ĝis malsatmorto... Sed en lia amiko jam kaŝiĝas la malsano. Eĉ ankaŭ lin infektus Terpier. Ili ne revenus vivaj al la Tero. Al la Tero... por ke la homoj eksciu, kial ne eblas veni ĉi tien, neniam plu...

Elĉerpiĝos la memoro. La spacveturisto ĉion forgesas, rapide. Ankaŭ Cander kaj Borisov. Ili forgesis, kiamaniere fuĝi el tiu ĉi infero. Eĉ forgesis, kiuj ili estas. Ke ĉi tie estas la manĝaĵo, la vivo... Ili eliris al sabla dezerto kaj dum kelkaj horoj forgesis ĉion. ĈION. Jam eĉ la malsato vane vekis en ili instinktojn. Cander, Borisov, Cander, Borisov, Terpier, Terpier...

Fuĝi. Tio estis la sekva penso de Bartelli. Li turnis sin, malrapide. Foriri. Sufiĉas nur puŝi butonon, la spacŝipo suprenleviĝas kaj...

Li sentis, ke stranga vakuo fariĝis en li. Li etendis sian manon. Tiel li restis staranta antaŭ la direkteja pupitro. Cander, Borisov, Terpier...

Necesas puŝi iun butonon. Sed kiun...?

Cander, Borisov, Terpier.

Boris... Terp...

Terp...

Bo...

Servi per grafikarto

István Karkus ne apartenas al la tutlande, eĉ eksterlande konataj majstroj de la hungara grafika arto. Li laboras kiel grafikisto en la «Popoldomo» de la urbo Tatabánya, pri kiu oni povas legi apartan artikolon de tiu ĉi numero. En tiu ĉi kultura instanco li respondecas por la artismaj kvalitoj de la diversaj informaj presaĵoj (afiŝoj, prospektoj ktp.)

Kiel la ĉi-kunaj grafikaĵoj montras, Karkus estas vera suverena artisto. Li estis 20-jara, kiam en 1966 la unuan fojon li ekspoziciis siajn verkojn, kaj de tiam li partoprenis en sennombraj ekspozicioj, kaj gajnis plurajn prestiĝajn premiojn. Tre frue li sukcesis trovi sian propran, karakterizan esprimmanieron, kaj liaj nebule fabelecaj, amarete groteskaj figuroj ne estas mikseblaj kun kreaĵoj de aliaj artistoj.

Komence lia plej ŝatata tekniko estis linoleumgravurado. Dum la lasta tempo li okupiĝas ĉefe pri akvaforto, sed ofte ni povas vidi en lia artlaborejo ankaŭ grandajn tuĉdesegnaĵojn.

Estas aparte simpatia lia «arto poetika». Karkus trovas, ke la pleja aspiro de artisto devas esti – influado, efikado al la homoj. Li konscias, ke sukcesaj teatraj afiŝoj, bele faritaj programkajeroj povas porti arton al multe pli da homoj, ol esoteraj bildoj, pendantaj sur la muroj de malmulte vizitataj galerioj. Ne rezignante pri la propra krea laboro, samtempe li volonte entreprenas la grafikistan servadon de la ĉiutaga kultura agado de «Popoldomo» – por la bono de ĉiuj amantoj de Belo.

V.B.

Homo kun birdo

Elpeligo

Vizio

Papili-ĉasantoj





PANORAMO

Telefon-jubileo

Antaŭ cent jaroj estis ekfunkciigita la unua telefoncentralo en Hungario. Okaze de la jubileo estis inaŭgurita ekspozicio en la Poŝtomuzeo de Budapeŝto. La ekspozicio prezentas la historion de la telefono ekde „pratempo" ĝis hodiaŭ, kaj ebligas rigardon al la proksima futuro. Krom la historia trarigardo, estas honorigita en la ekspozicio ankaŭ la pionira scienculo Tivadar *Puskás,* kiu per sia proponita telefoncentralo la unua en la mondo lanĉis la ideon, ke la telefono estu atingebla ankaŭ por la vasta publiko.

Unesko-konferenco pri inĝenieroj

Internacia Unesko-konferenco okazis en Dunaújváros, kun partopreno de ok Mezeŭropaj kaj Skandinaviaj landoj, pri la spertoj kaj novaj metodoj de poringenieraj altlernejoj. Oni rekomendis disvastigon de praktikaj metodoj elprovitaj en GDR, Pollando kaj Skandinavio kie el la sep-semestra instruperiodo la studentoj pasigas du semestrojn en uzinoj per produktaddirekta laboro. La prelegoj traktis pri ekonomio de la instruado de inĝenieroj, pri pli efika utiligo de la enuzina praktiko kaj pri la antaŭpreparo de la altlernejaj kaj uzinaj instruktoroj, konsilistoj.

La nova instruformo jam estos enkondukita ĉi-aŭtune en du fakultatoj de la Teknika Altlernejo de Dunaújváros.

La «enspeziga kubo»

Laŭ lastatempaj informoj la „magia kubo" de Rubik ĝis nun enspezigis al Hungario 22 milionojn da dolaroj. La ŝatindan ciferon tamen oni ne supertaksu: la hungara eksporto al nesocialismaj landoj dum la pasinta jaro estis ĉ. 4900 milionoj da dolaroj.

La tridekjara Ŝtata Popolensemblo

Multfoje staris antaŭ reflektoroj ĉi tiu impona popolarta ensemblo de Hungario, sur multegaj scenejoj de la mondo. Ĝia repertuaro foje montris eksperimentan serĉadon de novaj vojoj, foje eĉ tro striktan konservadon de tradiciaj trajtoj. La unuan epokon de la ensemblo difinis la grandioza personeco de la gvidanto Miklós *Rábai.* Post lia morto sekvis kelkaj jaroj preskaŭ nur kun la gardado de la ĝis tiamaj tradicioj. Guste nun, okaze de la 30-jara jubileo nova arta gvidanto transprenis la ensemblon: Sándor *Timár.* Li konscie volas daŭrigi la prezentadon de la malnovaj grandsukcesaj programoj. Por tio nepre estas necesa la unueco de la tri artaj branĉoj – ja ĉe tiuj programoj la orkestro, la dancgrupo kaj eĉ la ĥoro rolis samtempe sur la scenejo. Sed li volas elformi ankaŭ tiajn programojn, ĉe kiuj la artaj grupoj ankaŭ aparte povos aperi antaŭ la publiko. Ties neceso estas despli urĝa, ĉar la tuta ensemblo pro la multaj membroj apenaŭ povas trovi konvenan scenejon enlande. Estus ankaŭ pli facile moveblaj la apartaj pli malmultnombraj grupoj.

Ankaŭ en la artpedagogio la nova gvidanto havas specialan celon. Por klarigi ĉi tiun celfiksadon, li citas la ekzemplon de Béla *Bartók,* kiu siatempe eksonigis la popolkantojn en la

NORAMO

Pli ol cent fakuloj el 17 landoj kunvenis en la Hungara Nacia Parko Hortobágy, kie oni okazigis la ĝeneralan kunvenon de la Eŭropa Asocio de Naciaj Parkoj kaj Park-arbaroj

plej simpla, originala formo, sed lia muziko tra diversaj ŝtupoj atingis la „Concerto"-n aŭ la baletmuzikon inspiritan de la popola muziko. Tiel simile li ŝatus atingi ke ĉiuj tri artaj brancoj estu kapablaj tiel prezenti la muzikon, dancojn, kantojn kiel ili efektive vivas, en tiu plej simpla formo, kiel ili naskiĝis. Por ĉi tio oni devas eĉ pli profunde alproprigi la originalajn stilojn. Sed li volas gvidi la ensemblon plu por percepti kaj prezenti ankaŭ arte prilaboritajn, novajn komponaĵojn, kreaĵojn de modernaj komponistoj kaj koregrafoj. Sed la folklora bazo ne estas malhavebla. Posedante tion oni povas ĉion akcepti, kio estas valora.

Por protekti Hortobágy

Konsilio de la Nacia Parko de Hortobágy fondiĝis en Debrecen. La anoj de la 15-membra korporacio estas reprezentantoj de sciencaj kaj kulturaj institutoj, tiuj de sociaj, ŝtataj kaj kooperativaj organizoj. Ilia tasko estas atenti pri la stato de la naturaj trezoroj de la Nacia Parko kaj ili faras proponojn por plua malkovro kaj konservado de la valoraj raraĵoj.

Ekskursejo ĉe Pécs

Nova ekskurscentro estas ekipita por la loĝantoj de la suda urboparto de Pécs vid' al vide al la montoj de Mecsek. Sur la ĉarma monteta regiono oni „konstruis" 9 hektaran lagon en la valo Malomvölgy (valo de muelejo) kaj ĉirkaŭis ĝin per promenejoj, ludejoj, sportejoj. En la bela park-arbaro la ekskursantoj povas ĝui la panoramon el novkonstruita belvidejo.

Malaperontaj kalvuloj

Daŭre kreskas la eksterlanda interesiĝo pri la harkreskiga „likvaĵo Bánfi", kiun reklamas ankaŭ HV. Lastatempe ankaŭ latin-amerikaj kaj proksim-orientaj firmaoj traktas kun la hungara entrepreno Medimpex, kiu eksportas la vere efikan likvaĵon.

Ofertoj de la Balatonaj hoteloj „DANUBIUS HOTELS" je rabata vintra feriado.

Ĉe Héviz, la plej granda varmakva lago de Eŭropo, en la hotelo „Thermal Hotel Héviz"

UNUSEMAJNA KOMPLETO (kun 7 tranoktadoj)

	de la 1a de Novembro ĝis la 1a de Decembro 1981	de la 1a ĝis la 30a de Decembro 1981
prezoj: en dulitaj ĉambroj persone po	3 771 Ft-oj	3 348 Ft-oj
kromprezo por loĝi sola	926 Ft-oj	

La prezo inkluzivas: duonpensionon, mallongan terapion:
kuracistan ekzamenon, 6 banojn en la varma mineralakvo, saŭnon, 2 masaĝojn.

DUSEMAJNA KOMPLETO (kun 14 tranoktadoj)

kondiĉo de ĝia pretendo estas restado almenaŭ dum 14 noktoj.

	de la 1a de Novembro ĝis la 1a de Decembro 1981	de la 1a ĝis la 30a de Decembro 1981
prezoj: en dulitaj ĉambroj persone po	10 937 Ft-oj	10 295 Ft-oj
kromprezo por loĝi sola	1 741 Ft-oj	
plilongigo semajne po	5 173 Ft-oj	4 869 Ft-oj

La prezo inkluzivas: kompletan pensionon, kompletan kuracadon:
komencan, kontrolan kaj ferman kuracistajn ekzamenojn, diagnozajn ekzamenojn ban- kaj elektroterapiajn kuracadojn, enŝlimigon, subakvan masaĝon, lumoterapion.

En la hotelo „Helikon", situanta ĉe la bordo de Balatono (en la urbo Keszthely):

KOMPLETO POR 3 TRANOKTADOJ

kondiĉo de ĝia pretendo estas restado almenaŭ dum 3 noktoj

	de la 12a de Septembro ĝis la 16a de Oktobro 1981	de la 16a ĝis la 30a de Oktobro 1981
prezoj: en dulitaj ĉambroj persone po	1 105 Ft-oj	776 Ft-oj
kromprezo por loĝi sola	317 Ft-oj	207 Ft-oj
plilongigo tage po	371 Ft-oj	264 Ft-oj

La prezo inkluzivas duonpensionon.

Informado, rezervigo de la ĉambroj ĉe **DANUBIUS TRAVELS 1052 Budapest, Martinelli tér 8: Tx: 22-6342 Tel: 173-652**

DANUBIUS HOTELS

REVUO DE REVUOJ

Ĉu Internacia Lingvo? Do preferu ĝian internaciecon! Tiel mi povus resumi la tonon de pluraj diverslandaj artikoloj el la lastaj monatoj. Ne la lastaj, tutcerte, en tiu temo; kiel bedaŭrinde! „Eŭropaj esperantistoj manifestas malrespekton al la internacia karaktero de Eo" – honte mi legas en LA REVUO ORIENTA, kaj mi malgaje demandas: *kiel?* „Per troa uzo de neologismoj, prefere francismoj... «El Popola Ĉinio» ŝajnas pli komprenebla por japanoj – daŭrigas U. Lins – ol «Esperanto» de UEA..." Kaj ne temas pri plendo pro la poezia lingvo – kies tre limigita riĉiĝo tiom afliktis antaŭ duonjarcento la verdajn korojn. La aludoj tuŝas la „simplajn" gazet-tekstojn pri ĉiutagaĵoj de la vivo. Pri artikoloj, kiuj forte bezonus dike ruĝan krajonon. Por forigi netaŭgajn vortokomplikaĵojn. Por ŝanĝi falsajn vortojn je vere E-aj vortoj, per iom plia cerbumado. Por utiligi neglektitajn sufiksojn, kaj nian mirindan derivadon anstataŭ facilplume *kapti fremdvorton.* Ĉar ĝi ŝajnas moda, aŭ latinaroma, tial ne konsideri ĝin aŭtomate internacia...

Ĉu mankas sufiĉa atento aŭ respekto al la ne-parenclingvanoj, al la ne hindoeŭropan lingvon parolantoj? Mi hezitas respondi, ankaŭ tial, ĉar probable prezentas sin pluraj fenomenoj kun plurradikaj kaŭzoj. Iun gravan mencias Linde Knöschke: *ŝi* (Der E-ist) – hm, hm, meditus iranano nekompreneme – eksplikas averte, ke esperantistoj parolas la saman lingvon, sed ne ĉiam la saman terminologion. La diverseco de la kulturoj neeviteble ekzistas, malgraŭ la „malgrandiĝo" de nia Terglobo moderna epoka, kaj tio kaŭzas same neeviteble embarasojn en la interkompreno. Kion fari? Per bonaj ekzemploj ŝi postulas *por eksterlandanoj kompreneblan tradukon* de naciaj specifaĵoj. Necesas nur iom da internacieca spirito! – Interparolante ekzemple franclingve, ni nepre bezonus spiriton de la franca kulturo...

Plezure oni vidas, kiel kulture ampleksiĝas pluraj E-revuoj – eblas eĉ diri laŭde pri nia diligenta kolegaro, ke ĉijare plivaloriĝis la E-a gazetaro. Pli da (valora) literaturo beletra, pli interesaj kaj altnivelaj sciencaj artikoloj karakterizas jam la paĝojn. Pri la kultura medio de nia lingvo skribis M. Challulau (ŝaljulo) en KULTURAJ KAJEROJ inspire kaj spritege, briligante sian integran scion, plurface apogante la aŭguron: Eo kaj la homaro nepre interligiĝos!

La 75 jaron jubileanta sveda movado (SEF) transformis LA ESPERO-n kaj sekve tion la dudek-paĝa, bonformata revuo lasas sin legi kvazaŭ buntenhava magazino. Pri sciencaj malkovroj, kaj pri la kongreslando Brazilo informas koncize verkitaj, ne longaj artikoloj en la alvenintaj numeroj – pri la inda literatura parto, nun serio de M. Boulton, ni revenu alifoje.

La monda energio-problemo, kiel vaste traktata temo (aro) en KOMUNA E–GAZETARO de Nederlando, jam en si montras la freŝan orientiĝon de nia gazetaro. La malfermo al la publikon interesantaj aferoj – se bone elektataj – ŝajnas necesaj, eble foje vivnecesaj por la (loka) movado, kaj vigligantaj kaj la kluban vivon (aŭ la kongreson), kaj ebligas altiri atenton de la publiko neesperantista, de elstaraj personoj. Post la multaj diskutoj pri la movada vivo, jen prezentas sin kuraĝigaj kaj esperigaj novaj vojoj. Cetere la okpaĝa Energio-Suplemento de la menciita landa gazeto tre prudente apudigas diversajn opiniojn parte ekonomiajn, parte teknikajn, precipe pri la atomenergio. Estas konate, ke la produkto de atomenergio, konekse kun la atomarmilaj disvolvoj, pro la eventualaj danĝeroj provokis vastajn movadojn en pluraj landoj. Post ties artikoloj eblis ĉi tie legi ankaŭ pri „troigataj danĝeroj de atomenergio" kun pensige realaj argumentoj. Feliĉe, ankaŭ tiu ĉi artikolo ne neas al la lukto kontraŭ la atomarmiloj.

Tute alispeca *Suplemento* estas tiu de la Usonaj e-istoj, dediĉita al Zamenhof, parte ankaŭ en angla lingvo. Per teknike inda kvalito ĝi prezentas literaturajn omaĝojn pri la geniulo, pri kaj el lia verko; la imitindan faskon kvazaŭ ĉirkaŭas studoj de Bernard Golden pri la unuaj e-istoj de Usono: la grava lingvisto Leo Wiener (patro de la grandfama Norbert W., fondinto de cibernetiko) kaj Henry Phillips el la konata (de nia movadhistorio) Amerika Filozofia Societo, ricevas emfazan reliefon en la precize funditaj, pionire verkitaj biografioj pri tiuj pioniroj.

Pledo kaj plendo kun fervora rekomendo por nova eldono – tiel manifestas Giorgio Silfer sian ŝaton al la novelisto kaj humuristo Julio Baghy – en LITERATURA FOIRO. Kaj estas vere, ke tiu flanko de Baghy – la sprita mokado super la verda mondeto, la satiraj noveloj kaj scenoj pri la movado, kiun li, la vagabondo konis pli bone ol iu ajn – ne-meritite flankeniĝis el nia literatura horizonto; kvankam ili ne nur validas eĉ nun (kial ne?) kiel ironiendaj figuroj, faktojn asimilintaj anekdotoj, sed restas brilaj paĝoj de nia homcentra literaturo. La ideo de Silfer: eldoni kolektite novelojn kaj humuraĵojn de Baghy ŝajnas trafa iniciato, kaj... ŝtopinda hiato.

La kulturo Esperanta *ricevas* stimulon el nacikulturaj valoroj, kaj *transformante* ilin – vidu hungardevenajn ideojn de Baghy – *naskas* tamen originalajn, novajn kulturvalorojn per nia lingvo – esence tiujn vidas *interfiki* en la E-a kulturo Baldur Ragnarsson, skizante nian kulturpolitikon en ESPERANTO. Tiel kreiĝas nia konscio pri kultura komuneco – vortoj, kiuj multe klarigas pri la multe diskutita kultura identeco pere de Eo, kaj subtenas ĝian ekzistorajton el vidpunkto homara. En tiu senco iĝas prava la deziro absorbi – en la E-an kulturon – la mondliteraturon, kio arde hejtis la tutvivan verkadon de Kalocsay, kaj igis lin per grandioza tradukmajstrado plenumi tiun gigantan verkaron, kiu estas aperonta (grandparte) en TUTMONDA SONORO. Ĉu Esperanto havas por tiaj entreprenoj sufiĉe da lingvaj rimedoj? iu ajn demandus. Kvazaŭ konkursantoj respondas la „unuaj vortoj de Faŭsto", en unua sceno de la ĉefverko de Goethe – la tri diversaj tradukoj, faritaj tra 60 jaroj de tri E-literaturistoj, prezentantaj la abundegon de Eo! De tiu sento tute ravite mi gape legis tiujn perlojn en PACO (GDR-eldono/1980)... por poste enmergiĝi ankaŭ inter la ceteraj valoroj, raraĵoj kaj multaj recenzoj de tiu elstare redaktita numero.

Ervin *Fenyvesi*



D-ro Ferenc László

Nun jam milde fluas la rivero ĉe la vilaĝo Tiszadob

Inĝeniero Pál Vásárhelyi kaj la reguligo de Danubo kaj Tiso

La elstaran hidrologon-inĝenieron Pál Vásárhelyi pro lia verkado en la unua duono de la 19a jarcento rajte honoras ankaŭ la nuna generacio. Inter la eminentaj teknikaj konstruistoj de Hungario lin aparte alten levas la daŭraj valoroj de liaj hidrologiaj verkoj, ties ekzakta fundado kaj vasthorizonta solvado – sekve de kio ili pruviĝis utilaj kaj validaj eĉ post centjara praktiko.

En la pasintjarcenta postrestinta Hungarlando Pál Vásárhelyi ellaboris grandiozajn, science bazitajn projektojn pri natur-transformado, iniciatis vastan projektadon pri riverreguligo kaj inundprotekto, kiujn li mem ĝismorte organizis, direktis. Tiuj projektoj celis aliigi kvazaŭ la mapon de grandaj teritorioj, enkadre de la tiutempa landon evoluiga programo. Tiel kreiĝis la bazoj de la mondkonataj Hungarlandaj inundprotektado, riverreguligo kaj moderna akvomastrumado.

Tiujn grandajn laborojn, kiuj postulis egajn rimedojn, Vásárhelyi konsideris ne izolitaj entreprenoj. Laŭ li, ili estas influontaj la vivon de la tuta popolo, riĉigontaj la tutan landon. Pro tio li kunigis siajn modernajn teknikajn ideojn kun la tutnaciaj interesoj, ne nur lokajn aŭ regionajn taskojn li celis teknike plenumi. La landon reformema epoko, la tiucela socia-politika movado entuziasmigis lin krei, projekti, konstrui akorde kaj favore al la publika plibonfarto. Jen la pioniro de la kompleksa akvomastrumo!

Estis longa la vojo de tiu eminenta scienculo kaj patrioto. Filo de vilaĝa instruisto, li studadis en „Institutum Geometrico-Hydrotechnicum", el kiu instituto poste evoluis la Politeknika Universitato. Lia kariero de tie arkas alten, tra teknika praktikado departe-

menta al la akademia seĝo, ĝis gvidposteno en la tutlanda navigacia inspektejo, responda pri la hidrologiaj laboroj en la lando.

István Széchenyi instigis kaj subtenis la grandan kartografian laboron, direktitan grandparte de Vásárhelyi, nomitan Danubo-mapado. Tion la scienca mondo ĝis nun konsideras klasika verko de la hidrografia mapoverkado. Ĝis tiam nenie estis farita verko simila laŭ dimensioj kaj nivelo. La Aŭstria ĉefdirektoro pri konstruado, Ranchmüller von Ehrenstein karakterizis ĝin tiel: „tiuj mapoj, pro la detaleco kaj perfekteco estas rajte mencieblaj kiel unua rivermapo en la mondo..."

Navigebligo de la Suba Danubo

El nia generacio jam multaj ne scias – eble eĉ tiuj ne, kiuj sur Danubo ŝipveturis ĝis la Nigra Maro –, ke estas Vásárhelyi kiu ebligis la navigadon sur la Suba Danubo per reguligo de la Ferpordo. Dank' al lia elstara laboro iĝis Danubo internacie signifa rivervojo kaj taŭga por kunligi la apudriverajn landojn, la preterajn popolojn por efika kunagado.

La *Ferpordo,* tiu mirinde pitoreska kaj romantika etapo de Danubo estis la plej malfacila etapo por la navigado. En la fluejo, sulkigita ţra la erozia valo, alternis larĝoj kaj mallarĝoj. En la lastaj la rivero estis ege profunda, sed kie la fluon krucis duraj rokkrestoj, tie troviĝis kaskadoj, malprofundejoj, danĝeraj subakvaj rokoj, jen kun altiĝo jen kun ŝtupa falo de la akvonivelo. Antaŭ la reguligo, tiu etapo estis navigebla nur se la akvonivelo superis la mezan altecon. Se ĝi ne atingis tion, oni devis redukti la ŝipŝarĝon por ebligi la trapason. Okaze de malaltakvo eĉ tio tute malebliĝis.

Precipe danĝera obstaklo estis la dekstraflanka promontoro de la montokresto Greben, kiu striktigis la flujon ĝis 250 m. Pli sube, inter krutaj montoj troviĝas la pasejo Kazan – plej pitoreska parto de la Suba Danubo –, kie la rivero mallarĝiĝis je 150 metroj, sed profundis 70 metrojn (pro la nuna ŝveligo ĝi atingas 100 metrojn).

Komenco de la reguligo

Kiam la Ĉefdirekcio de Hidraŭliko kaj Konstruado finis la mapadon de la ĝis tiam precize ne konata riveretapo, ĝi komisiis (laŭ iniciato de István Széchenyi) la projektadon de la riverreguligo al la mapadon direktinta Vásárhelyi.

La unua, kiu rekonis la estontan gravecon de Danubo kiel internacia

Monumento por P. Vásárhelyi en la vilaĝo Tiszadob

akvovojo, estis Széchenyi. Li kuraĝis komenci la reguligon de la kaskadoj en la Suba Danubo, kio siatempe ŝajnis ege riska afero kaj politike, kaj teknike. Laŭ memorando de la Viena Donau-Verein (Asocio pri Danubo) eldonita en 1880, Széchenyi estis tiu „...klera kaj klarvida viro, kiu rekoninte la gravecon de tiu afero, kuraĝis proponi la grandan entreprenon, forigon de la navigaciaj obstakloj, ke tiu grava akvovojo estu malfermebla por la trafiko. Tio estas nedisputebla kaj neforgesebla merito de István Széchenyi..."

Ni aldonu: post la komencaj reguligaj rezultoj – por ke la laboro ne stagnu – li sukcesis pene atingi, kiel organizanto ankaŭ de la Danuba vapor-ŝiptrafiko, ke ektrafikis la regulaj vaporŝiplinioj: de Vieno ĝis la mara enfluejo, poste eĉ ĝis Istambulo. Li antaŭvidis, ke helpe de la ŝiptrafiko la Hungarlanda industrio ricevos mendojn pri varoj el la orientaj landoj – kaj tiamaniere prosperos kun la trafiko ankaŭ la industrio, konforme al lia ekonomion disvolvanta programo.

Antaŭ liaj okuloj prezentiĝis tiu grandega transkontinenta rivervojo, kies konstruo estas nun (post 150 jaroj de la ideo!) efektiviĝata, pro la daŭre kreskantaj bezonoj. Helpe de la moderna tekniko, Jugoslavio kaj Rumanio tiucele jam konstruis samloke unu el la plej grandaj hidraŭlikaj kluzegoj kun akvocentralo.

Antaŭvida aŭdaco kaj entrepremo kune kun moderna inĝeniera arto venkanta la naturfortojn, aperis en tiu regiono, kiam alvenis Széchenyi kun la inĝeniera stabo de Vásárhelyi. „Elstara plenumo de la tiutempa teknika kulturo" (H. Arnold) estis la konstruado de 130 km longa ŝoseo sur la maldekstra bordo (poste Széchenyi-vojo). Ĝi ebligis, krom tirado de ŝipoj, ankaŭ surradan transporton de ŝipaj ŝarĝoj preter la plej kriza etapo (de Bazias ĝis Turnu-Severin) okaze de malaltakvo. Pro financaj malfacilaĵoj – la registaro ne akceptis la kostojn de la subakva rokdetruo – eblis forigi el la fluejo nur rokojn eksplodeblajn dum la eksterordinara malaltakvo (1834). Pro la malfavoraj historiaj-ekonomiaj

Ŝipkanalo ĉe la Ferpordo

Pál Vásárhelyi (1795–1846)

cirkonstancoj provizore oni devis rezigni pri realigo de la tuta projekto.

Sekve de la entrepreno en 1834 tamen estis inaŭgurebla la vaporŝiptrafiko laŭlonge de la tuta Danubo, eĉ se kun grandaj limigoj. La unua vaporŝipo trapasanta la Ferpordon la 14an de aprilo 1834 estis AGRO, ŝipo de la kompanio DDSG. Ĝis Istambulo la linion kompletigis la mara ŝipo „Marina Dorothea" trafikinta inter Galac kaj Istambulo.

La inaŭguro de la Danuba vaporŝiptrafiko estis internacie grava evento: Danubo enfokusiĝis en la Eŭropa interesiĝo. Tion atestas la longa vico de vojaĝ-priskriboj, albumoj Danubaj, kiujn de renomaj verkistoj kaj pentristoj publikigis multaj eldonistoj de Eŭropo (eĉ de Ameriko), se ne paroli pri la vasta literaturo ekonomia kaj teknika jam de 1830. Pluraj eminentaj desegnistoj anglaj kaj germanaj plenumis bildojn pri la Széchenyi-vojo, krom la teknikhistorie gravaj bildoj fare de inĝeniero József Láncz.

Pro la unua hidrografia mapo de tiu riveretapo, la meritoj de Vásárhelyi restas gravaj; tiu mapo prezentis la bazon por ĉiu sekvinta projektado. La menciita memorando konstatis, ke liaj „... mapoj kaj mezuroj en la fluejo, metis la bazon por ĉiaj postaj laboroj tiurilate. Ĝia daŭra valoro troviĝas en la plene fidinda kaj perfekta prezentado..." Interese sonas la aserto de respektata tiutempa aŭstra geografo, V. Streffleur: „...Hungario estas alilande konsiderata „terra incognita" (nekonata), kvankam tie dum la pasintaj 30 jaroj oni tre diligente laboris por mezuradi la riverojn, kaj tiurilate eble neniu lando en Eŭropo produktis simile perfektajn plenumojn..."

En la malmola rokaĵo la fluejo – ankaŭ pro malabundo de la rivera sedimento – eĉ dum jardekoj apenaŭ ŝanĝiĝis (1 mm da defrotiĝo jare). Pro tio la mapoj de Vásárhelyi restis longe validaj, do utiligeblaj por novaj planadoj. Krom la menciita memorando tion poste emfazis ankaŭ prof. H. Arnold en prelego farita en la Germana Inĝeniero-Asocio (VDI): „Vásárhelyi en sia raporto, datita de 15 decembro 1834, resumis la rezultojn de siaj laboroj, faritaj tre klarvide kaj per grandioza fakscio; per tio li levis daŭran monumenton por si, unu el la plej eminentaj hidrologo-inĝenieroj; ĉar la detala kaj demonstra prezento de la fluejo, la konscienca observado kaj priskribo de la opaj kaskadoj montriĝis same taŭga elirbazo por ĉia posta planado, kiel ĝi servis fundamento por la definitiva konstruprojekto."

Dum la postaj laboroj oni utiligis ne nur mapojn de Vásárhelyi, sed ankaŭ liajn projektojn. La zorga komparado de la poste faritaj projektoj evidentigas, ke tiuj sekvis la proponojn de Vásárhelyi – cetere sufiĉe kompreneble. Tio validas precipe pri la projektoj ellaboritaj komisie de la armekomandejo far J. Meusberger kaj G. Wex (1854.), tiu komisie de DDSG far W. MacAlpin (1871.), tiu de la aŭstria-hungara-turka internacia komisiono, kaj tiu de diverslandaj ekspertoj en 1879. Ili estas fakte laŭ la teknika evoluo kaj la dume akiritaj spertoj. Foje eĉ okazis – precipe ĉe variantoj kun malfermata kanalo –, ke oni retropaŝis kompare al liaj ideoj.

Ekzemple ni menciu, ke la t.n. Ferpordo-kanalo – kanalo ĉirkaŭanta la rokon Prigrada – en ĉiu varianto enestas, laŭ lia ideo. Kaj ankaŭ de li devenas la poste ripete prezentiĝinta koncepto – nun fine grand-skale realiĝinta –, laŭ kiu la obstaklojn de la navigado oni devos likvidi *per kluzo(j)*. En lia reguliga plano (1935) estis emfazite, ke montriĝos sensenca ĉia solvo, kiu ne per kluzo intencos traponti la falon, respektive la niveldiferencon, ĉe certaj kaskadplenaj etapoj – precipe ĉe la Ferpordo.

Postaj reprezentantoj de la proponata kluzo-sistemo kutimis referenci al li. Ekzemplon ni citu de eksperta komisiono, delegita de la Aŭstria Asocio de Inĝenieroj kaj Konstruistoj, kies membroj argumentis ĝuste per vortoj de Vásárhelyi: „Se oni lanĉus antaŭ la eminentaj teknikistoj de la mondo la demandon: kiamaniere estus eble interligi du navigeblajn riverojn, kies distanco ne estas pli granda ol 1300 klaftoj*, sed la unua situas 16-17 futojn pli malalte – tiam, laŭ mia opinio, ili unuanime rekomendus ***kanalon** kun kluzoĉambroj*. Neniu rekomendus interligi sole per kanalo, sen kluzoĉambro..."

Kiam fine de la pasinta jarcento estis jam pretaj la reguligaj verkoj, la malkonvenaĵoj de ŝiptrenado en la Ferpordo-kanalo tuj evidentigis, ke restis necese perfektigi la verkon. Eminenta germana inĝeniero kaj ŝipfabrikisto, H. Luther tiutempe unu el la ĉefaj entreprenistoj de tiuj laboroj, nun prezentis la unuan kunigitan planon de kluzaro kaj akvocentralo (1898). La tute novtipan planon varme



Hidrologia instalaĵo ĉe Algyő

apogis H. Arnold, politeknika profesoro en Hannover, en sia artikolo, argumentanta favore al la kluzo-sistemo en la Ferpordo, li emfaze referencis la „multe cititan opinion de la fama hungara inĝeniero Vásárhelyi" kaj lian iaman, pioniran projekton.

Estas do kompreneble, ke la reguligo de la Suba Danubo en okuloj de la interesita faka publiko – dum duonjarcento – kvazaŭ kunfandiĝis kun la nomo de Vásárhelyi. En la pasintjarcenta literaturo pri la Suba Danubo oni ne trovus verkon ne menciantan pri li. Tiel okazis, ke la plej grava faklibro de ĉi temo, la menciita memorando de la Viena „Donau-Verein" en 1880 sur kovrilpaĝo prezentis lian portreton, „dankeme memorante pri liaj meritoj."

Reguligo de rivero Tiso

Alia gravega verko de Pál Vásárhelyi estis la reguligo de rivero Tiso, la ordaranĝo de la valo de Tiso – siatempe internacie unika teknika tasko. La valo de Tiso estas unu el la plej grandaj basenoj en Eŭropo, en kies plej profunda regiono (iama marprofundo) la sedimentiĝo ne kapablas samfakte sekvi la malleviĝon, pro kio la akvo provadas reokupi sian iaman teritorion.

La reguligo-projekto baziĝas sur rekono de la hidrografiaj ecoj de Tiso. La fluejo, krom la tre mallonga supra etapo, pasas ĉie en sia propra sedimentaĵo. Tiapseca fluejo iĝas serpentuma; en homogena grundo ĝi formas por si eĉ regulecan serion da kurboj. La suben serpentumanta Tiso estas tipa ekzemplo de la t.n. mezetap-karakteraj meandrantaj riveroj. Vásárhelyi skribis: „La rivero per nerezistebla forto puŝiĝas al la konkava bordo tiel rompante ĝin, kaj sekve la kurbiĝo senĉese kaj ĉiam pli rapide kreskas." Tia evoluo de la kurbiĝoj daŭras (principe) ĝis la river-inundo trarompas la relative etan „kolon" de la trolongiĝinta kurbiĝo, kaj estiĝas nova, mallonga trafluo. La rivero tiamaniere strebas formi sian falon (longsekcon) laŭ la propra akvoreĝimo aŭ kiel Vásárhelyi diris „laŭ naturo de la rivero"

Tiun naturleĝon intencis Vásárhelyi utiligi ĉe la regulado; laŭ jam konata metodo, pere de „gvidfosaĵoj" urĝigi la trarompon de la jam „maturaj" kurbiĝoj. La eksterordinarajn kurbiĝojn tratranĉante li volis ĉesigi la „degeneron" de la fluejo, kaj malpliigi per triono la longon de la rivero – ja ĝi atingis jam la *duoblon* de la rivervala longo!

Estis jam 1846, kiam Vásárhelyi finis la grandan projekton pri reguligo de Tiso. La projekto solvis la necesajn taskojn – moderigon de alt- kaj mezaltakvoj, inundprotekton – per la sole ebla – kompleksa – maniero.

Depost tiam la malgrand-ŝtupaj, t.n. mezetap-karakteraj riveroj estas regulataj ĉiam laŭ la principo: *unue* korekti la riverfluon. Tion intencis fari Vásárhelyi per tratranĉoj de la meandranta fluejo, t.e. tranĉante la trokreskintajn, „maturajn" kurbiĝojn. Tion li konsideris antaŭkondiĉo de sukcesa inundprotekto, de efika digosistemo. Liaj planitaj 101 tratranĉoj mallongigis la riverlongon. Tial – proporcie al kresko de la riverfalo, de la flurapido – malpliiĝis ankaŭ la tempo de la inunda forfluo. Li konsideris la digokonstruadon lige kun la tranĉadoj; la digoliniojn li projektis tiel, ke samtempe kreiĝu aranĝita *inundareo* por Tiso (altakvo-reguligo).

Tiso, kiel milda „amiko" ĉe Szeged



La glacirompiĝo jam ne pli endanĝerigas la urbon Szeged

Tiuj principoj troviĝas jam en lia „Anticipa rekomendo". En la sekvanta „Ĝenerala projekto de regulado" li jam tiris la praktikajn konkludojn. Krome li aldonis detalajn direktivojn por la efektivigo.

La du projektodokumentoj cetere similas en siaj strukturoj. Ambaŭ deiras de la hidrografia priskribo de la Tiso-valo, por poste determini la farendaĵojn laŭ naturo kaj ecoj de la rivero. Kompare al la anticipa teksto la pli detalaj priskriboj en la definitiva projekto pli vaste kaj konvinke subtenas la konkretajn proponojn. Enestas ĉio, kio gravas elinter la hidrologiaj ecoj de Tiso rilate la reguladon, kaj kio estis iel konstatebla laŭ la tiama teknika nivelo.

Estas notinde, ke la projekto aparte akcentas: apud taskoj de la inundprotekto, la reguligo devas respekti la interesojn ankaŭ de la navigado. Pro tio estis almetitaj du gravaj ĉapitroj. La unua precizigas la suplementajn riverkonstruaĵojn (ekz. direktigajn verkojn, bezonatajn ĉe tratranĉoj). La alia priskribis la farendaĵojn necesajn por la navigado (purigo de riverfundo, vojo por trenado/haŭlado k.s.). Kvazaŭ resumas ĉiujn punktojn fine la detala buĝeto.

Kompreneble la projekto enhavas ankaŭ la detalajn teknikajn planojn, mapojn, kalkuladojn, al kiuj preskaŭ nur klarige rilatas la 36-paĝa teksto. Estante detala kaj preciza projekto, ĝi determinas ne nur la lokojn de la tratranĉoj, sed ankaŭ ties manieron, kaj avertas pri eventualaj zorgoj. Ekzemplo estu la averto, ke en la malmola grundo de la suba etapo pli malfacile kreiĝos la grandaj tranĉaĵoj: tiucele oni devos fari pli larĝan gvidfosaĵon, krome per skrapado de la fluejo disvolvi la tranĉaĵon. (Poste vere prezentiĝis tiaj malfacilaĵoj.) La projekto avizis pri efikoj de la tranĉaĵoj: la altondoj plivigliĝos, impetiĝos, la malaltakvoj kaj la fluejo sinkos, aliflanke la altakvoj iĝos pli altaj.

Kiel jam menciite, Vásárhelyi konsideris en unueca tuto la riverreguligon kaj la inundprotektadon. Laŭ li: „la digoj ne nur de inundoj devas protekti, sed pere de ilia lokigo oni strebu samtempe korekti la riveron: malhelpante la leviĝon de la riverlito, male, ĝi eĉ profundiĝu." Li avertas: tre grave estas ĝuste determini la distancon de digoj disde la riverbordo. Celante korekti forfluon de la rivero, de la altondo, pliigi ties rapidon (do malhelpi masiĝon de sedimentoj en la fluejo) li proponis digojn laŭeble paralelajn kaj al la bordo proksimajn: „oni devas la fluon laŭeble kunteni por la plej rapida forfluado", kaj li aldonis: „la ĉefa tasko estas... se la lokaj cirkonstancoj permesas, konstrui plej proksime regulan digon..."

Tiurilate li rimarkis, ke proksime al la fluejo la inundareo ĝenerale situas pli alte, pl malproksime de la fluejo. Sekve la proksimaj digoj estas ne nur pli praktikaj, sed ankaŭ pli malkaraj. Por ili necesas konvena antaŭareo, kie estus dezirinde planti arbarzonojn, tiel ŝirmante la digojn de rompado de ondoj. Poste li detaligis kiel direkti kaj kalkuli la digojn, kaj donis praktikajn konsilojn koncerne ties materialojn (ĝusta miksado de sablo kaj argilo), elfosejon de materialoj, pri kompaktigo kaj gazonigo de digoj, eĉ pri daŭra protektado de la gazono.

Videble, la projekto de Vásárhelyi konsideris dise ĉiun iom gravan detalon de la reguligo de Tiso. Ties principoj pruvas, ke li rimarkis kaj utiligis la teoriajn rezultojn de la tiama hidrologio, same la praktikajn spertojn de la hidraŭliko, eĉ, apud la korpa forto de la terlaboristo li jam kalkulis ankaŭ je eblecoj de la disvolviĝanta maŝintekniko. La akumulitan scion, kiun liveris la tiamaj scienco kaj praktiko, li kompletigis per siaj novaj ideoj. Pro tio oni rajte konsideras lin ne nur eminenta inĝeniero, sed ankaŭ pionira sciencisto de la akvomastrumo kaj hidrologio.

Ankaŭ nuntempe plene validas la gvidprincipo de lia projekto – kaj laŭ tio agas la Hungarlanda akvomastrumado: por venki la naturfortojn oni observu kaj utiligu ties leĝojn! Liajn ideojn pruvis la tempo: la principon de reguligo, kiu utiligas la naturfortojn por kune agi, konforme al la „naturo" de la rivero.

La granda naturtransformado en la valo de Tiso montras sin des pli impona, se oni scias, ke la amasegon de

tero – gigantan eĉ por la nuna tekniko – dekmiloj da terlaboristoj tra la Granda Ebenaĵo plenumis plejparte per primitivaj rimedoj peze laborante, per ĉaretoj manaj kaj ĉevalaj. Rezulte, la regulita riverlongo malpliiĝis de 1419 km al 964 km (32%) pere de 414 novaj fluejoj, tranĉaĵoj. La falo de la rivero iĝis pli granda. Pro la tranĉaĵoj kaj la riveron kunpremantaj digoj la nivelo de la altakvo leviĝis, sed la tempo de ĝia forfluo grave malpliiĝis kompare al la antaŭa situacio.

Kaj la efiko de la granda verko: la rivero „akceptis" la novan situacion, „adaptis sin" al ĝi. La rivero „enlitiĝis" tutlonge en la fluejon. La digoj iĝis sinsekve pli sekuraj, pli ŝirmantaj la ĉirkaŭaĵon, ankaŭ la navigado plifaciliĝis. La ciferoj montras kiel grandioza estis la plenumita laboro, direktita de geniaj ideoj de Pál Vásárhelyi, farintaj la bazon ankaŭ por la moderna akvomastrumo en tiu granda regiono.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

* klafto: iama mezurunuo, ĉ. 1,90 m



La tombomonumento de Pál Vásárhelyi en la Budapeŝta „Kerepesi-tombejo"

Danubo fariĝis fidinda ŝipvojo: oni transportas dom-panelojn el Győr al Budapeŝto





ORION TV RADIO

SPEAKER SYSTEM

HS 500

SONRADIATORO

* Tribranĉa elektroakustika aparato kun tri megafonoj
* Nominala ŝarĝebleco 80 W
* Muzika ŝarĝebleco 100 W
* Zonamplekso de sonreprodukto 40– 20 000 Hz
* Frekvenco de rezonanco 55 Hz
* Sontralasiva armaturo kun kovrilo de speciala jersey-teksaĵo
* Enmuntita defenda elektroniko, kiu ĉe maksimuma ŝarĝebleco ŝaltiĝas, kaj defendas la sonradiatoron de troŝarĝo

HiFi

Tre moderna fabelo

Ferenc Szilágyi

Tiun ĉi eksterordinaran kaj freŝdatan fabelon mi nur peras, transigante la respondecon al mia tre fidinda amiko – ni nomu lin Sen Dubo –, kiu la unuan fojon, rakontis ĝin ĉe blanka tablo, kie ne mankis glasoj.

„Aŭdu nur", diris Sen. „Mia amiko, Ripsrops, veturis antaŭ nelonge per sia beleta ĉaro[1], vi scias, tiu „Mercedes", inter Arhangelsk kaj Kopenhago sur la ŝoseo[2]. Sed li jam ne estis malproksime de Kopenhago, kiam ĉe benzinputo[3], kie li aĉetis hejtmaterialon kaj kie, dum la agado de la benzinulo, li iom promenis. Subite li aŭdis voĉon sub si:

„Sinjoro Ripsrops, sinjoro, bonvolu atendi..."

Ripsrops rigardis malsupren kaj vidis ranon[4], ruliĝantan al li. Li ne estas speciala ŝatanto de ranoj, sed io kaptis lin en la afero.

„Ĉu *mi* komprenas rane? Kaj ĉu vi povas paroli? Ĉu vi konas min? "

La rano respondis:

„Jes, kara sinjoro Ripsrops, mi povas paroli; sed mi ne parolas rane, sed dane. Mi petas vin, sinjoro Ripsrops... Mi frostas. Metu min en vian poŝon! Ĉu mi rajtas kunveturi al Kopenhago? Por bonfaro vi ricevos bonon! "

Ripsrops tre miris, precipe, ke la rano frostas, kiam estas varme; sed rano estas rano, kaj ĉar la petita varmo ne kostos al li elspezojn, li metis la ranon en sian poŝon. Kion vi diras? Jes... Jes, li estis sobra[5] kiel mi.

Iom post iom la rano iĝis hejmeca ĉe Ripsrops. Ĝi petis eĉ manĝon kaj iom da akvo, kiujn Ripsrops, kiu konsideris la ranon cetere tre modesta, donis al sia kunvojaĝanto. Tiel, ili alvenis al la metropolo[6], eĉ al la loĝejo de Ripsrops, ĉar la rano petis ripozlokon. Ripsrops malfermis la pordon de sia loĝejo, kaj, tiam, la rano denove ekparolis:

„Kara sinjoro Ripsrops, mi estas dormema. Ĉu mi rajtus dormi en tiu lito? "

Ripsrops ekmeditis[7]. Estis la unua fojo, ke iu fremdulo volis dormi en ilia familia lito, sed efektive, sinjorino Ripsrops estis for, kaj tiu ĉi mirinda rano estis tiel dormema. Li metis la ranon en la apudan liton, kaj demetis sian jakon, kaj komencis pretigi sin por la nokta trankvilo. Li volis jam mallumigi, kiam li alrigardis la apudan liton, kaj tiam li rimarkis, ke el la stranga rano fariĝis belega reĝidino, kiu supozeble apenaŭ estis provizita[8] per noktovestoj. Lia rigardo ekglitis sur la marmoraj[9] ŝultroj de la reĝidino. Ripsrops tute teruriĝis. Li frotis la okulojn. La reĝidino alrigardis lin kaj diris:

„Ri-i-ipĉjo! "

Sen Dubo, t.e. la rakontanto, nun faris longan paŭzon[10], kaj sekvis iom malcerte la ŝvebon[11] de la cigareda fumo.

Mi urĝigis:

„Nu, kaj kiel estis poste? "

Sen Dubo alrigardis min kaj diris:

„Ĉu vi vere kredas tiun ĉi historion? "

„Kredi? Tute ne. Kial mi kredu? "

„Nu ankaŭ sinjorino Ripsrops, kiu tiumomente revenis neatendite el sia feriado[12] en Polinezio kaj malfermis la pordon de la dormoĉambro, ne kredis ĝin. Eĉ ne unu vorton..."

El la revuo *„Juna Amiko"*

1. aŭtomobilo / 2. ĉefvojo / 3. benzino: hejtmaterialo por aŭtomobiloj / 4. malgranda saltanta besteto, kiu loĝas ĉe bordo de lagoj, kaj kiu „kvakas" / 5. malebria / 6. urbego / 7. mediti: profunde pensi / 8. provizi: surhavi, posedi / 9. speco de ŝtono peza kaj valora / 10. interrompo de parolo aŭ alia ago / 11. ŝvebi: malrapide leviĝi, flugpendi / 12. ferioj: libertempo

Ridu kun ni!

Mano manon lavas

Ja, proverbo, certe, sed kelkloke oni modernigis ĝin tiel: „Mano manon oleas".

Nefum-kampanjo de l' panjo

– Panjo! mi alkutimiĝis jam al nefumado. Pri tiu hobio mi nur malfacile povos dekutimiĝi!

Ĉu de paĉjo konsilite?

– Amiko, mi estas feliĉa! – Gratulon! Kiel do? – Nur dum sonĝo mi renkontas la damon de miaj revoj – do ŝi ne kostas multe...

Ankaŭ de panjo konsilite

– Filino mia, vi estas jam fianĉino! Memoru bone: ne tre urĝigu la divorcon!

En akcidenta ambulanco

Kirurgo: Via vizaĝo terure deformiĝis pro la aŭtokarambolo.
Aŭtisto: Ho ne, la karambolo estis nur simpla kunpuŝiĝo. Sed poste ni interboksadis dum la disputo: kiu havis prioritaton?

Meritis laŭdon

En la tramo la kontrolisto varme manpremis kun junulo kaj karesis lian vizaĝon dirante: – Nur tiel plu, sinjoreto! Mi ĝojas, ke vi havas validan bileton.

Iom da gr-amatiko

– Imagu amikino, mi amas kaj estas amata! – konfesas junulino.
– Vi estas do feliĉa kun li, ĉu ne?
– Kiel do kun li? Temas pri du viroj...

Orientiĝo

Veturanto stiras sian aŭton eksterlande. – Nu fine – li ĝemas. – Post plurhora vagado ni sukcesis trovi liberan parkejon. Restas nur esplorende, en kiu urbo ni troviĝas.

Malfidulo

– La asekureja kuracisto rifuzas akcepti de mi monon. Do mi jam eĉ tion ne kredas, ke li havas diplomon!

Tiuj viroj...

– Se mi hejmenvenas eĉ je la kvara horo matene – diras la olda fraŭlo –, estas neniu, kiu dirus al mi almenaŭ unu mallaŭdan vorton...

... kaj ilia vidpunkto

– Mi ankoraŭ havas nur kvardek jarojn. Sed Elena ĵus plenumis jam la kvardekan jaron...

E.F.

La nova Esperanto — domo



Baldaŭ en la sino de la Rodopi-montaro en Bulgario malfermos sian pordon impona Esperanto-hejmo. Ĝi estos tamen ne nur impona Esperanto-domo, sed ankaŭ signifoplena simbolo de io nova. Ĝi estos simbolo de la jam delonge aspirata pli intensa proksimiĝo de la esperantista movado al tiu potenca socia faktoro, kies nomo estas *ŝtato.*

La domo estas donaco de la bulgara ŝtato. Jam temas ne pri pago, kiun la ŝtato donas al lektoroj pro instruado de Esperanto, ne pri subvencioj, donataj al esperantista asocio por sin vivteni aŭ okazigi kongreson. Temas pri io alia, pri io grandioza. La bulgara ŝtato apartigis el sia buĝeto unu milionon da levoj por konstruo de domo-palaco, dediĉita al la efektivigo de la ideo pri internacia lingvo. Tio jam ne povas esti nomita helpo. Tio estas agnosko al la socia valoro de movado, kiu meritas havi sian indan lokon inter ĉiuj aliaj valoraj sociaj fortoj.

Ne estas malpli indika ankaŭ la jura maniero, laŭ kiu estas disponigita la nova domo. Ĝi estas transdonita, jure valide, al internacia Esperanto-Kursejo ekzistanta sub la tegmento de la Bulgara Esperantista Asocio. Internacia Esperanto-Kursejo estas memstara organizaĵo, kun propra statuto, propra buĝeto, propra bilanco. Nun, inter la havaĵoj de la Internacia Esperanto-Kursejo elstaras kiel ĝia plej valora proprietaĵo la belega domo en Rodopi-montaro. Nun la celo de la Internacia Esperanto-Kursejo, tiel kiel tio estis formulita en ĝia statuto, disvastigi la internacian lingvon Esperanto kaj perfektigi ĝian uzadon, trovos efikan realigilon.

La domo ne estos sezona domo. En ĝi estos okazigataj kursoj dum la tuta jaro, ekde la unua de januaro ĝis la 31a de decembro. Sub gvido de specialistoj, per la helpo de moderna ekipaĵo por lernado kaj praktikado de la lingvo, la kursanoj havos la eblon en mallonga tempo akumuli riĉaĵon, por kies akiro, alie, ne sufiĉus kelkoble pli longa tempo kaj kelkoble pli granda fortostreĉo. Al tiu ĉi celo kontribuos nature la internacia medio, kiun la Internacia Esperanto-Kursejo strebos garantii al la partoprenantoj.

La Rodopi-montara domo-kursejo ne estos nur kursejo. Ĝi estos ankaŭ feriejo. Ne nur pro tio, ke ĝi troviĝas alte en la montaro, je pli ol 1000 metrojn super la marnivelo, en montaro alloga dum ĉiuj sezonoj de la jaro. Ĝi estos feriejo ankaŭ pro tio, ke ĝi estas fakte moderna hotelo, kun pli ol 200 litoj en dulitaj ĉambroj, kaj, kun, memkompreneble, ĉio, kio estas necesa por komforta kaj agrabla restado. Ne mankos eĉ dancplaco kaj aliaj distroeblecoj, kiuj kontribuos, por ke la restado fariĝu neforgesebla travivaĵo.

La Internacia Esperanto-Kursejo havos la ambicion vidi sian domon en Rodopi-montaro kiel veran internacian forĝejon de ardaj adeptoj de la internacia lingvo Esperanto. La realigo de tiu ambicio tamen altgrade dependos de la apogo, kiun la Internacia Esperanto-Kursejo ricevos de la internacia esperantistaro.

Ljubomir *Miĥajlov*
Ĉefdirektoro de IEK

recenzoj

Grava kulturhistoria verko

La Klasika Periodo. Tra la parko de la franca poezio. Poezia antologio franca–Esperanta. Enkondukoj, notoj kaj tradukoj de Gaston Waringhien. Eldono Gabrielli, Plejado, Ascoli Piceno, 1980. Beletra Eldono-Serio n-ro 14. 252 p. 20 cm. Prezo: 20,– ned.gld.

La esperantista legantaro estas tre feliĉa: ĝi povas travagi la riĉan „parkon" de la franca poezio per la helpo de kompetentega ĉiĉerono – profesoro Gaston *Waringhien.*

Per la libro „La Renesanca Periodo" li jam bele pruvis sian ĉiĉeronan kapablon. Li kapablis ne nur belege – kaj per la paralele aperantaj francaj tekstoj kontroleble – traduki en Esperanton la senmortajn verkojn de Belajo kaj Ronsardo, sed ankaŭ inici eĉ la plej neinformitan leganton en la etoson de la 16-a jarcento. Liaj erudiciaj, tamen babile facilvortaj enkondukoj kaj klarigoj ravis min ne malpli, ol la majstre tradukitaj poemoj: Waringhien sukcesis bildigi por mi la vivon de antaŭ kvarcent jaroj.

Tion saman mi atendis de lia nova libro, kiu plukas el la franca poezio de la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Oni povas legi trafajn specimenojn interalie el la verkoj de tiaj granduloj, kiel Corneille, La Fontaine, Molière, Boileau, Racine, Voltaire ktp. – kompreneble en tradukoj konsterne fidelaj kaj tamen nature klaraj, kiel oni povis jam kutimiĝi al tio ĉe Waringhien.

Ankaŭ en tiu ĉi libro Waringhien majstre eksplikas la esencon de la traktita epoko. Li avertas, ke kontraste al la renesanco, en la „klasika periodo" poezio perdis sian socian influon, iom post iom ĝi fariĝis salona ludo. La renesanca „Ronsardo povis admoni la reĝojn pri iliaj devoj, (la romantisma) Hugo povos malbeni la imperiestron pro liaj krimoj, sed Malherbo klarvidis en la siatempaj aferoj, deklarante, ke poeto ne pli utilas al la regno ol bona kegloludanto." Pro tiuj koncizaj, trafaj karakterizoj tiu ĉi nova tradukvolumo de Waringhien estas ne nur tre bona poemaro, sed ankaŭ grava kulturhistoria verko: ĝin legos ĝue ankaŭ tiuj, kiuj eble ne speciale entuziasmas pri poemoj, sed volonte penetras en la esencon de pasintaj epokoj.

V. *Benczik*



Rava libreto

B. Prus: LA FARAONO. Bildrakonto. Adapto kaj teksto de Tibor Cs. Horváth, desegnoj de Attila Fazekas, Esperanta traduko de Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1980. 44 p. 24 cm. Prezo: 4,80 ned. gld.

Ĉiam, kiam temas pri bildrakonto farita surbaze de fama kaj granda verko, oni emas paroli unuavice pri formo. Do, unue pri eksterajo. Ĝi estas rava. Foje ekvidinte la orkoloran kovrilpaĝon, oni ne kapablas resti trankvila ĝis oni povos ekspozicii ĝin sur sia hejma librobreto, kaj preni ĝin de tempo al tempo en siajn proprajn manojn. Tio ne estas indiferenta vidpunkto ĉe populara eldono.

Ankaŭ min foje ĉarmis la kovrilo – kaj jen fine mi tenas en manoj mian propran ekzempleron. Ni nun iom trafoliumu la kajeron, antaŭ ol komenci la legadon.

La plej unuaj bildoj promesas strecan temon kaj ties rapidan disvolviĝon. Scenoj ŝanĝiĝas sur la fono de la antikva Egiptio. Kalejdoskopas kamparana vivo, kortega akcepto de diplomatoj, mirakloj kaj taŭrbatalo en cirko, kronprinca dibocо kun nudaj belulinoj, templo, pastroj, amo, milito, morto, paradizaj oazaj pejzaĝoj, skeletoj en subterejo, kolere krianta homamaso, popola ribelo, soleca homo sur dezerta vojo, kvazaŭ observanta ĉion elekstere... Kaj ĉie – profunde enpensiĝintaj vizaĝoj, strecа pensado. Pri kio?

Nun ni tralegu la tekston, por tion eksciis.

Ĝuste en tia ordo mi konatiĝis kun la enhavo de la kajero: antaŭ ol mi komencis legi ĝin, jam fiksiĝis en mia imago la pejzaĝoj, la scenoj, la ĝenerala fono – mense mi jam estis en Egiptio en la dekunua jarcento antaŭ Kristo.

Do tiel komenciĝis atenta legado. Mi legis kaj vidis, kiel ĉio okazas – vidis kune kun talenta pentristo. Ĝis la fino mi legis kun intereso. Poste mi pripensadis. Kion? Homaran pasintecon, estantecon kaj estontecon. Ja pri tio pensigas la bildrakonto.

El la vasta temaro kaj problemaro de la granda verko, la bildstria „La Faraono" elmontras al nia konscio kelkajn plej versajne eterne aktualajn problemojn – la moralajn problemojn en la soci-politika vivo. La temo kaj eldiroj en la rakonto tuŝas: interrilatojn de la regantoj kaj la regatoj; celojn kaj rimedojn, kaj moralajn motivojn en tiu sfero; la „sorĉistan" potencegon de la inicitoj en la sciencajn konojn – la soci-moralan aspekton (ja la problemo pliakriĝas en la nuna mondo!); tian noblan aferon, kia estas servado al sia popolo – kaj noblajn motivojn de tio... Sufiĉas la nombrado. Oni vidas, ke la moralaj problemoj en la socia vivo, kie esence temas pri rilato de homo al homo, staris samkiel ĉe ni jam en pra-Egiptio, do en la lulilo de nia civilizacio. Ĝis hodiaŭ ili restas solvotaj problemoj de l' mondo. Solvendaj.

Oni iafoje dubas, ĉu valoras fari bildrakontojn el grandaj. verkoj de la mondliteraturo. Certe valoras! – nur tion oni povas diri post tralego de „La Faraono". Ja tiu ĉi malgranda adaptajo estas unu el la plej seriozaj inter multego da diversaj filmigoj, surscenigoj, aliaj mallongigoj (resumoj, revuoj, recenzoj, parafrazoj en lernejaj lernolibroj, serioj da pentrajoj fare de aparta pentristo ktp.) el la mondliteraturo. Tio ankoraŭfoje pruvas, ke ĉio fariĝas serioza, se ĝi estas farata de seriozaj kaj talentaj personoj. Ĉi foje – serioza en esenco kaj samtempe belega en arta plenumo. Kaj facile legebla en Esperanto. Dankon al HEA!

Apartan dankon oni volus esprimi al HEA pro la uzado de disponeblaj rimedoj, monaj kaj aliaj, por aperigo de ne sole verkoj el sia nacia literaturo, sed ankaŭ el alilandaj literaturoj. Tiamaniere oni plilarĝigas niajn internaciajn horizontojn.

Nun pri la metodikaj valoroj de la eldonajo. Certe ĝi estas legajo interesa kaj relative facila – sed tamen ne tiom facila por komencantoj. Tamen jen la ĉefajo: oni nepre tuj havigu al si „La Faraono"n de HEA – ĉar vidante ĝin komencantoj urĝe ekvolos scipovi la lingvon sufiĉe bone por tralegi la belegan libreton kun plezuro.

Resume: bela malgranda grafikarta-literatura adaptajo de mondfama verko en Esperanto, kiu certe plezurigos ĉiun esperantiston.

Naĉo Kemalov

Naŭ jaroj en la infero

„Internacia patrujo de suferado"

Naĉo Kemalov: NAŬ JAROJ EN LA INFERO. Memuaro. El la bulgara tradukis: Ivan Kovaĉev. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1980. 111 p. 20 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

Survoje el Moskvo al Parizo, de kie plua vojo kondukus lin al batalanta respublikana Hispanio, trafis en Hitleran koncentrejon bulgara komunisto Naĉo Kemalov. Lia vojaĝcelo estis helpi al la hispana popolo, kaj eble doni sian vivon por ĝia libero. Anstataŭ tio li travivis 9 jarojn en infero, kie faŝistoj, kiuj senigis sian propran popolon je libereco, provis fizike neniigi tutajn aliajn popolojn.

Vaste konataj estas la bestaĵoj de la „plenumantoj de ordonoj" en la faŝistaj koncentrejoj, la inventemo kaj amuzigo, kiujn ili montris ĉe la „plenumado"... Ĉion ĉi la leganto trovos ankaŭ en „Naŭ jaroj en la infero", eldonita de HEA en Esperanto. Sed ne nur tion.

Sur multaj paĝoj li trovos ankaŭ alian Germanion, aliajn germanojn – tiujn, kiuj portis ne SS-uniformon, sed uniformon „Zebro". Unu el tiaj germanoj, en la komenco de la milito kontraŭ USSR, laŭtvoĉe profetas antaŭ SS-kanibalo, ke, anstataŭ standardo kun svastiko sur Kremlo, ekflirtos la ruĝa standardo sur Reichstag. Ĝuste tiajn 25 germanajn antifaŝistojn masakris kaj cindrigis dum unu nokto la SS-anoj, kiam ili eksciis pri konspira centro en la koncentrejo. Ni legas ankaŭ pri fervola germana komunisto Willy Gutdorf, redaktoro de la gazeto „Rote Fahne". Kiam Willy Gutdorf, post kvarjara restado en la koncentrejo, estis liberigita kun siaj ekskolegoj el „Rote Fahne", li komencis eldonadon de nova gazeto, „Interna Fronto" en kvin lingvoj. En 1943 la faŝistoj gilotinis lin en Berlino malliberejo. Tiajn homojn oni ne povis rompi spirite, tiaj homoj ne povis agi alie, ili ne povis agnoski la rasbarieron, kaj ili kredis je la internacia frateco – ilin Naĉo Kemalov nomas „veraj germanoj", kaj inter ili li sentis sin „en familia rondo" dum tiuj teruraj jaroj. Dank' al tiaj germanoj oni povis revi kaj paroli, en la infero, pri pli bela postmilita Germanio.

En tiu „internacia patrujo de suferado" troviĝis ankaŭ sovetaj militkaptitoj. Du sovetaj generaloj konstante provas organizi kontraŭstaron (eĉ armilojn oni akiradis), juna soveta soldato verkas poemojn, kiuj finiĝas per la vortoj:

Ĉi fabriko de la morto ja disfalos
dank' al tutpopola lukt'!

Ĉiutage oni transformis sovetianojn (kiuj antaŭ du-tri monatoj estis bravaj soldatoj) en fumon el kremaciejoj. Kaj kiam, ĉe la fino de la infero, ĉar jam proksimiĝis Soveta Armeo, oni elvokis ĉiujn koncentrejanojn el la barakoj pro nekonata kaŭzo, estis interkonsentite, ke la soveta grupo marŝos inter la germana kaj ĉeha grupoj, por ŝirmi la sovetianojn.

La aŭtoro mem trafis en la inferon kiel komunisto – kaj tio li restis, kun fera volo elirinte el la terura provo, kune kun aliaj diversnaciaj komunistoj. El la rakonto ni komprenas, kiel idea parenceco inter komunistoj helpas al ili supervenki nacikulturajn barierojn. Forigi la lingvajn barierojn helpis al Naĉo Kemalov ankaŭ Esperanto. Fakte, per Esperanto li faris siajn unuajn kontaktojn en la koncentrejo – nome kun „admirinda germana komunisto" Willy Gutdorf. Dank' al tio li jam ne pli sentis sin solulo. Dank' al letero en Esperanto, kiun sendis al Bulgario angla kamarado, liberigita el la koncentrejo, la familio de Naĉo Kemalov eksciis, kie li troviĝas. La aŭtoro bele omaĝas sian Esperanto-instruiston, bulgaran komuniston David Sasonov, kiu kun Hristo Gorov tradukis en Esperanton la poemon „Septembro" de Geo Milev, kaj eldonis ĝin, antaŭ la milito, en Sovetunio. En 1942 David Sasonov, terure torturita en la policejo, tamen nenion konfesis kaj ne denuncis siajn kamaradojn. Li baldaŭ grave malsaniĝis kaj mortis en ekzilejo. Iu policano akompanis la ĉerkon ĝis la gepatra domo de David, kaj jene rikanis al la patrino: „He, judino, bonvenigu vian filon! " – „la patrino ĉirkaŭprenis la ĉerkon kaj tiel restis dum la tuta nokto. Matene oni trovis ŝin kun blankiĝintaj haroj kaj kun konfuzita menso..."

Suferoj, malhomaj humiligoj plenigas la rememorojn pri la 9 jaroj sub la „nova ordo". Sed ankaŭ nevenkeblan senton de homa digno kaj aktivan kontraŭstaron, eĉ en la koncentrejo, renkontas la bestosimilaj faŝistoj. Ĉar homoj restas homoj: ili rakontas anekdotojn kaj „multe ridas", ili sekrete festas Kristnaskon kaj Novan Jaron, kun literatur-muzikaj programoj kaj buŝharmonikoj ktp. Faŝisma doktrino fiaskis interalie pro sia kredo pri humiligeblo de amasoj dum daŭra tempo. Tiu bazo de la potenco estas efemera, se popolamasoj ne estas malkleraj. Por atingi daŭran malklerecon kaj spiritan malvastecon de sia propra popolo, la faŝistoj, samtempe kun sia naŭza propagando, devis esti ekstreme netoleremaj al ĉiu provo de sendependa pensado, al ĉiu originaleco, finfine al ĉiu homo, kiu simple iomete grumblas. Kiel rimarkas Naĉo Kemalov, la preferata vorto de la hitleranoj estis „Verboten! " (malpermesite). Tia perversa netoleremo kaŭzas, ke plej diversaj homoj fariĝas samsortanoj en surtera infero: komunistoj, anarkiistoj, religiuloj (Naĉo Kemalov atestas pri dekoj da pastroj-kontraŭfaŝistoj, enterigitaj ĝis la gorĝo), seksperversuloj, hebreoj, danoj, bulgaroj ktp. ktp. – ĉiuj sin trovas en faŝista koncentrejo „sen ia ajn verdikto, sed ankaŭ sen ia espero". Ĉar fakte estis perversa la faŝista koncepto pri la homo, pri sia kaj aliaj nacioj, kaj tiu koncepto kondukis al tute kontraŭnaturaj situacioj: „... la devo de la kuracistoj ne estas kuraci la homojn, sed ilin mortigi – jen infero! "

Naĉo Kemalov avertas: „Oni akiras percepton pri la faŝismo, kiam jam estas malfrue." La ĉefa zorgo de la bulgara komunisto estas pri estonteco – por ke la infero neniam plu ripetiĝu. En la libro ni multe legas pri la sento kaj agoj de vera interhoma solidareco, kiujn stimulis la malhomaj kondiĉoj; pri tio, ke eĉ Norvegio kaj Bulgario jam ŝajnis al la malliberuloj tute najbaraj landoj. „Ĉe la multmila plurnacieca loĝantaro de tiu ĉi infero ĝermis amikecoj – strangaj kaj neeblaj ĉe aliaj kondiĉoj. La nazioj... helpis – maldezirante tion – por la intensigo de la internacia unueco."

Ĝuste pro tio, sin trudas al mi jena demando: ĉu ni ĉiuj, homoj el la tuta mondo, nepre bezonas trovi nin en la infero, por ke ni finfine eksentu „veran solidarecon de fratoj"?

La animo kaj vivspertoj, la mondkoncepto de bulgara komunisto Naĉo Kemalov plej trafe, ŝajnas al mi, esprimiĝas en du liaj frazoj, per kiuj li kvazaŭ aludas al ni la ĝustan vojon hodiaŭ kaj en estonteco. La unua el ili tekstas: „Ekzistas ne „malproksimaj" kaj „proksimaj" landoj... ĉiu terangulo de nia planedo estas peco de nia karno." Kaj la alia mencias la rusan, sovetan vorton „tavariŝ", kiu tiam, en la faŝisma infero, estis „signalvorto de la solidareco, de la amikeco kaj de la internaciismo".

Kaj multsignifa estas la fino de la historio: la liberigo, fare de Soveta Armeo, venis al Naĉo Kemalov kaj liaj samsortanoj la Unuan de Majo – festo de internacia solidareco de laboristoj kaj ĉiuj veraj homoj.

Viktor *Goŝtejn*

Bulgara Esperanto-poeto

Grigorov, Asen: Gardu la pacon! (Poemaro.) Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1980. 120 p. 19 cm. Prezo: 10,80 ned. gld. (Por Hungario 40,– forintoj.)

Jam dum pli ol duonjarcento Asen Grigorov verkas Esperante. Esperanto-poeziamantoj ankoraŭ rememoras liajn unuajn poemojn, kiuj aperis sub la pseŭdonimo Ljubin. Dum la lastaj tridek jaroj liaj originalaj Esperanto-poemoj kaj tradukoj aperas dise sur la paĝoj de diversaj Esperanto-revuoj, ĉefe en „Bulgara Esperantisto" kaj „Paco", sed ĝis nun la Esperanto-kritikistoj preskaŭ ne rimarkis lian long-

jaran kreadon. En la diversaj studoj pri Esperanto-poezio ni ne trovas lian nomon. Pri li tre malmulte diras ankaŭ „Enciklopedio de Esperanto" kaj aliaj, pli malampleksaj, sed pli novaj gvidlibroj pri Esperanto-literaturo.

Pasintjare aperis la nova poemaro de Asen Grigorov „Gardu la pacon! ", sed ankaŭ ĝi restis ekster la observo de la Esperanto-kritiko. Pri tiu ĉi poemaro, se mi bone scias, aperis nur tri recenzoj: unu en „Bulgara Esperantisto", alia en „Paco" kaj la tria en „Budapeŝta Informilo". En „Heroldo de Esperanto", revuo „Esperanto" kaj aliaj Esperanto-ĵurnaloj aperis nek vorto pri „Gardu la pacon! " kaj laŭ mi, tiu ĉi silento pri unu el la plej elstaraj bulgaraj Esperanto-poetoj estas maljusta.

Asen Grigorov dediĉis sian tutan vivon al Esperanto kaj liaj poemoj ne estas sensignifaj por nia poezio. Tion plej bone pruvas lia nova poemkolekto. „Gardu la pacon! " respegulas poeton kiu posedas profundan emocion kaj originalan talenton. Grigorov kreas poemojn, kiuj ravas nin per sia melodio.

La ĉeftemo de lia poemaro estas la paco kaj amikeco inter la popoloj kaj tiun ĉi temon ni trovas en ĉiuj liaj poemoj, sed la eterna temo pri paco kaj amikeco, en la poemoj de Grigorov, neniam sonas deklare. La poeto esprimas ĝin delikate, per trafaj metaforoj kaj emociaj komparoj.

Grigorov estas Esperanto-poeto en la plej bona senco de tiu ĉi nocio. De ĉiu lia poemo senteblas la voĉo de la internaciisto, la voĉo de la poeto, kiu vivas kun la ĝojoj kaj doloroj de aliaj popoloj kaj nacioj. Tion elokvente respegulas la poemoj „Vjetnamo", „Paco en Vjetnamo", „Tjanj Ŝanj", „Figyelem" kaj aliaj.

Bulgario estas malgranda lando kaj la eksterlandaj esperantistoj ne tre bone konas bulgaran historion, literaturon, kulturon. Sporade aperas bulgaraj libroj en Esperanto-traduko kaj tre malmultaj bulgaraj esperantistoj dediĉas sin al Esperanto-verkado kaj tradukado. Grigorov provas iomete malfermi la kurtenon antaŭ la nuntempa bulgara literaturo kaj en „Gardu la pacon! " li donas lokon al modesta poezia antologio. Liaj tradukoj el klasika kaj moderna bulgara poezio estas bone elektitaj kaj majstraj. Dank' al tiuj tradukoj la eksterlandaj esperantistoj verŝajne por unua fojo havos eblon legi poemojn de la plej elstaraj nuntempaj bulgaraj poetoj kiel ekzemple G. Ĝagarov, N. Zidarov, V. Rakovski, B. Dimitrova.



„Gardu la pacon! " montras, ke Grigorov ne nur havas poezian talenton, sed li penetris en la specifon de la Esperanto-poezio, kaj, malgraŭ ke li ne ŝokas nin per novaj formoj kaj esprimoj, lia stilo estas klara, liaj rimoj riĉaj kaj la ritmo flua.

Niaj poetoj ne tre sufiĉe esploris la eblojn de la balado kaj nun mi ne povas eviti la tenton citi du versojn el „Vitoŝa-balado", kiu laŭ mi estas unu el la plej sukcesaj poemoj en la kolekto.

„Atingante la ĉielon, spegulante
ĝian helon
ĝi rakontas la fabelon sen komenco
kaj sen fin'! "

En tiu ĉi balado kaj preskaŭ en ĉiuj poemoj de Grigorov senteblas la influo de la bulgara popolkanto, kiu influo sendube riĉigas nian Esperanto-poezion.

Mi kredas, ke la nova renkontiĝo de la bulgara Esperanto-poeto kun la legantoj estos emocia kaj ĝuoplena.

G.M.

Pri martira pastro

Jan Dobraczynski: La dia avarulo. El la pola tradukis Boleslaw Monkiewicz. Eld. Gabrielli (Serio Plejado), Ascoli Piceno, Italio. 1979. 88 p. 19 cm.

Kun vera intereso mi eklegis tiun ĉi biografion de la franciskana pastro Maksimiliano Kolbe, kiu rajte famiĝis pro sinofera martiriĝo en Auschwitz. Tie li iris memvole en morton anstataŭ alia malliberulo... Tiu glora, heroa vivfino mem meritigas lian personon por ke oni vaste ekkonu pli proksime lian personecon. Kaj vere, helpe de la aŭtoro – lia kunlaborinto dum la nazia okupado – ni ricevas informon pri neĉiutaga vivo, pri eksterordinara eklezia agado, kiu kvazaŭ konsekvence kondukis al sinofero. Estu sufiĉe ĉi tie nur aludi al la ripetiĝintaj kontraŭadoj, kiujn Maksimiliano Kolbe devis elteni, ofte forigi el sia lukta vojo: kaj liaj kunfratoj en la ordeno, kaj liaj superuloj ree kaj ree ne inklinis akcepti la renovigajn, por ne diri: reformajn intencojn kaj agadmanierojn. Ne nur, sed ĉefe, tiu agado celis vastiĝantan religian propagandon, ankaŭ en „misiaj" landoj, en Japanio kaj Hindio, jen kun ŝajnaj sukcesoj, jen sen iaj rezultoj.

La aŭtoro sukcesis la diversajn agadojn iom proksimigi al la legantoj, malgraŭ la malfacileco konigi la komplikajn farojn por eksteruloj. Lerta ĵurnalisto vicigas en la libro pli-malpli interesajn epizodojn kun la celo: montri la noblan karakteron, ties disvolviĝon, de admirinde kuraĝa, eĉ la naziojn defianta, patriota pastro. Li estis laŭ la biografio, en ĉia okazo ideala pastro, homo sindona, religie saturita. Certe, la libro estas same saturita de pensado, ne nur religia, sed eĉ mistika. Inter tiuj du ekzistas kompreneble distingebleco, kaj mi bedaŭras, ke la aŭtoro, eble pro rajta laŭdemo por Kolbe, tro emfazis, konsentante, la siatempe jam disputitajn mistikajn pensiradojn. Sen aŭ kun malpli de tiu flanko, la intenco de la verko estus pli sukcesinta.

La traduko legiĝas ĝenerale flue, kvankam ne ĉiam klare, sed pri tio probable respondecas la originalo. Ripro ĉeti mi devas nur la ne ĉiam konvenе uzitajn artikolojn, kaj kelkajn tro peze tradukitajn nacilingvajn dirmanierojn. Montriĝas kelkloke la neceso – kiel ofte en tradukitaj verkoj pri naciaj okazaĵoj –, ke la tradukisto *iom aldonu* al la teksto por klarigi ion-tion al la eksterlandanoj, por kiuj ne nepre estas evidentaj certaj situacioj aŭ fenomenoj. La esperantigo de la verko ja okazis precipe por eksterlandanoj; mem la aŭtoro ne ilin celis, tial iĝis ĝenerala – kaj sekvinda – kutimo *fari transpontadon* favore al la verko kaj... al la legantoj.

E. *Fenyvesi*


malmultekosta,
bongusta novaĵo
HOT-DOG
KOLBASO
48 Ft/kg
HÚSIPAR

Aforismo pri aforismo

Ni citas latvan verkiston Janis Rainis: *„Poezio estas kvazaŭ suno, kiu vivigas ĉion..."* – la daŭrigon vidu en linioj **H.1., H.53., V.15., V.40.** (Alsendendaj linioj).

Limdato: unu monato post la alveno de la revuo.

Inter sendantoj de ĝustaj solvoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj: 15. Opero de Verdi **16.** Laŭ nomo **17.** Aranĝo de partoj similaj kaj sammaniere ordigitaj (Radiko) **18.** Kolekto de proverboj, parolturnoj (R) **20.** Manĝebla fiŝo el fam. de karpoj **21.** Identaj vokaloj **22.** Vegetaĵo kun alta trunko (R) **23.** RI **24.** Persono deca, bonvola (sen „o"-finaĵo) **25.** Persona nedifinita pronomo **26.** Kombinaĵo de metalo kun sulfuro (R) **28.** Laŭorde, taŭge, ĝuste **30.** Kvar – per Romiaj ciferoj **32.** Leviĝas kaj malleviĝas (ekz. akvo) **34.** Sin movi reen (R) **36.** Adverbo **37.** Numeralo **39.** Reen: poseda pronomo **40.** Tubero produktita de intesto, operaciinda ŝvelaĵo sub la haŭto **41.** PS **42.** Ĝojo pro malfeliĉo de aliuloj **44.** REŜ **45.** Produkti ian efikon, fari ion (R) **46.** Numeralo **47.** Impresas flarsenton **48.** Nevole malleviĝis **50.** Laŭ alia maniero **52.** GA **54.** Ano de vaganta gento deveninta el Hindujo (R) **59.** Konforma al ideala modelo **61.** Muzika sono (R) **62.** TL **64.** Monkesto (R) **65.** Interkonsento de labordonantoj fermi entreprenon por premi laboristojn (R) **66.** AT **67.** Komencas batalon **69.** Virina nomo **70.** Pinta vergeto, uzita per pafarko (R) **72.** Juvelŝtono (R) **73.** En stato natura, sen vestoj **74.** OOM **75.** Speco de pleŭronekto (R) **77.** Kortbirdon **79.** TU **81.** Multepova prepozicio **82.** Japana havenurbo **84.** Reen: interjekcio pro doloro **85.** Superi malamikon (R) **87.** Legomo kun dika, manĝebla radiko (kun artikolo) **89.** Ankaŭ Kalocsay estis tio **92.** Longdaŭra iro de iu loko al alia **94.** Flava ekskrementa likvaĵo, el veziko (R) **95.** Akra bruo de skrapado (R) **96.** Finaĵo por frakcia numeralo

Vertikalaj: 2. Alparolo al grandsinjoro **3.** EDA **4.** Loĝanto de izola, kvazaŭ insula loko en dezerto **5.** Sendistinga admiranto kaj imitanto de laŭmodaj aferoj (R) **6.** Teksaĵo el lino aŭ kanabo (R) **7.** Sekse amus **8.** Dentumita ŝtala klingo por tranĉi (R) **9.** Finaĵo por kondicionalo **10.** Koncerna venenan alkaloidon de tabako **11.** Lando ĉe suda parto de Araba Duoninsulo **12.** Mitologia anĝelforma estaĵo (R) **13.** Loĝantoj de Eŭropa lando **14.** Arbara, montara rabobesto (R) **19.** Malgranda insektomanĝanta mambesto kun pikiloj **24.** Alkoholaĵo (R) **26.** Natria klorido (R) **27.** Igas ion pli freŝa **29.** Tute certe **31.** Daŭra plendkrio (R) **33.** Supernatura estaĵo **35.** Ĉefurbo de Latvio **38.** Konciza frapa formulo reklam- aŭ propagandcela (R) **43.** Mezorienta lando (R) **44.** Ekzistas tia partio **46.** Kaldronforma muzikinstrumento **48.** FRC **49.** Stato de organismo normale funkcianta (R) **51.** Diletanta, neprofesia **56.** Ĉion amplekSanta (R) **57.** Vira nomo **59.** Emo por elteni ion (R) **60.** Aŭtomobiloj – mallonge **63.** La ridiga imito de serioza verko (R) **65.** Malgranda angla kaj germana mezurunuo de peso (R) **68.** Mallarĝa, pintfina kanoto de indianoj kaj sportistoj (R) **69.** Ankoraŭ ne grandaĝa (R) **71.** Georgo – en pluraj slavaj lingvoj **73.** Urbo en norda Italio **76.** Restu senmove sur piedoj! **78.** Estanta sen, danĝera situacio (R) **80.** Senkompare, sensimile **83.** Danĝera sentaŭgulo en metropoloj (R) **85.** Moviĝi, proksimiĝi al tiu ĉi loko **86.** Alta herbo, kreskanta en akvo **88.** Reen: demanda tabelvorto **90.** DIP **91.** Nenormala malgrandulo (R) **93.** Identaj vokaloj



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: **Georgi Mihalkov**

Gardu la pacon!
de Asen Grigorov

Tiu talenta Esperanto-poeto kaj liaj originalaj, tradukitaj poemoj estas vaste konataj en Esperantujo. Antaŭ nelonge Hungara Esperanto-Asocio eldonis lian novan poemaron „Gardu la pacon! "

1. Kiom da memstaraj verskolektoj eldonis Asen Grigorov?
2. El kiu poemo estas la citita strofo.
   „En tia nokto vi min perdos.
   La strigo ekululos vee
   Kaj la silento regos ree."
3. Kiu poemo komenciĝas tiel:
   „Li vivas! Vivas! Sur la Balkano."

Limdato por la respondoj: unu monato post la apero de la revuo.

Solvoj de la demandoj

En la n-ro 1979/5: 1. „Feliĉa amo". 2. „Superstiĉo". 3. La novelo „Kain kaj Abel" presiĝis kun tiu ĉi titolo dum la vivo de la aŭtoro (cetere, kun lingva aprobo de K. Kalocsay) kaj pro tio la redaktoro de la volumo elektis tiel la titolon. Libropremion gajnis: Kassai Aladárné, Sátoraljaújhely (Hungario), Diana Velkova, Sofio (Bulgario). *En la n-ro 1979/6:* 1. „Hungara problemo". 2. „La stelo de steloj". 3. „Alflugis la pavo..."
Libropremion gajnis: František Bárta, Žilina (Ĉeĥoslovakio), Jerzy Banacki, Tomaszów Maz (Pollando). *En la n-ro 1980/5:* 1. La soldato havis 28 tagojn da libertempo. 2. Eszter Szabó. 3. „... kompatinda, baraktanta viro."
Libropremion gajnis: Fogarassy Gábor, Budapest, Tövisháti Ferenc, Békés (Hungario).

LETERKESTO

Korespondi deziras

Bertil Englund, Hof, FRG: Evidente, en HN nro 6/80, la facila blovinstrumento *fluto* iĝis kvazaŭ de facilaj ventoj forblovita tuta *floto* – kvankam ĝi bezonas multe pli da maristoj ol simpla triopo povus sufiĉi, eĉ se *baroka.* Ni faras ĉion eblan por redirekti la simpatiajn artistojn al la kvieta maro de ll muziko – *flutludi.* – Eble en la venonto estos grava la afero de satelitoj, kiuj dissendos rekte al televid-riceviloj, sed – verdire – ni apenaŭ aŭdis ion pli proksiman tiuteme. Se komercaj entreprenoj kaptos en la manon ties eventualajn programojn, la monda kulturo probable ricevos novan minacon, kion detale priskribi en kultura revuo kiel la nia, apenaŭ necesas. Kiel vi skribas: „bonkvalitaj, seriozaj, edifaj, edukaj programeroj trovos minimuman lokon, anstataŭe programeroj kun vantaj enhavoj regos..." se profitemaj rondoj formos la enhavon de tiaj programoj. Tamen ni ne aŭdis ankoraŭ pri diskuto tiurilata.

Dobjazko Volodja, Kievo, SU: Kun granda intereso ni legis vian leteron pri via klubo „Kopeko", kie tamen estas alte taksata la lingva valuto kaj valoro, do la scio de Esperanto. Teamoj de komencantoj, kiuj konkursas pri gramatiko ankaŭ lude, kaj laŭ difinitaj gradoj de scipovo la lernantoj atingos la „Oran pordegon", t.e. la tielnomatan klubon de la perfektiĝintaj – ŝajnas aparte sprite elpensita, distra maniero de grupformado por Esperanto. Ankaŭ viaj postuloj de la lernantoj tre plačis al ni: lego de *tri libroj,* lerno de lantoj, havi korespondantojn ks.

C.G. Torino, I: Diskuti pri kritikoj ĝenerale povas efiki eduke, en vasta senco de la vorto. Kvankam ne multfoje, sed HV volonte donis spacon tiucele se... la debata temo tion meritis, kaj interesaj frontoj prezentis sin. Tamen ne ŝajnas ĝuste (aŭ edife, se vi volas) diskuti pri eta parto de recenzo, kiu nek brilas de graveco, nek estas objektive juĝebla. Vi komprenis, eĉ impresive ĝuis en HUNDBAZARO i.a. la verson: „Tra fenestro dom' elsaltis" – kaj „komprenis" ĝin ankaŭ via eta nevino – kaj tio igas vin kontraŭdiri al la alte respektata recenzinto (nro 4/80. p. 157.). Permesu, ke ni ne interdiskutigu vin ambaŭ. Kaj sen Salomona juĝemo ni devas diri, ke vi ambaŭ estas pravaj: G.W. plenrajte perceptis la verson enigma – el realisma vidpunkto; vin levis la poemo en feliĉa minuto al revado, kie povas aperi nerealaj grimacoj kaj figuroj, nur enreve-ensonĝe eblaj fenomenoj, superrealisme (tiajn esprimas elprofunde la arto de surrealismo), do via poezia kompreno/percepto jesas la verson el same prava (eble praava?) vidpunkto. Dankon pro via atentemo.

Vladislav Virśila, Panevežis, SU-Litovio: Kia bela, brava iniciato estas la via: ekscianteе pri forpaso de Ludmila *Jevsejeva,* vi kolektis el arkivoj centon da ŝiaj poemoj por eventuala eldono, precipe por gardi ilin kunbinditajn. Laŭ instigo de Hilda *Dresen,* nia redakcio, respektive HEA ekhavis la intencon eldoni poemaron de L.J., kaj ŝi transdonis jam siatempe la manuskripton. La eldona redaktado jam okazis – sed nia Eldona Komisiono volonte akceptos por eventuala revizio almenaŭ la titolliston de via kolekto, kaj poste ĝi petos la eble mankantajn tekstojn. Akceptu varman manpremon!

Tóth G., Budapeŝto, H: Permesu – ke ni ne cedu. Ne nur de vi, ankaŭ de aliuloj venas proponoj aŭ deziroj por legi *pli* da artikoloj gramatikaj – venis foje eĉ deziro pri Volapuk-priskriboj! En kultura E-revuo, kiel la nia, prilingvaj-gramatikaj aferoj ja devas havi lokon – sed limigite. Ni ne emas ŝovi nian direkton (aŭ rigardon) tro forte al tiu flanko. Stilo kaj teksto de la revuo devas lingve orienti (se vi deziras: instrui). Ni forte esperas, ke nia legantaro akceptas, se ni persistas tiurilate.

Sviridova Elena (17) studentino, dez. praktiki Eon k havi amikojn en div. landoj, certe resp. SU–65200 *Jurga* (Kemerovsk. obl.) ul. Komsomolskaja 8/62. –– F-ino *Viive Pallias* kaj patrino, pri virinaj temoj. Estonio SU-200 016 *Tallinn* Liiva 15. – *Csupor Anna* (35) oficistino, R-4000 *Sf. Gheorghe,* Alea Hârniciei, Zona Gării, Bl. 36, ap. 42. – *Gecző Edit* (22) oficistino, pri lit. muziko, turismo. R-4000 *St. Gheorghe,* Str. 1 Mai, 33. – *Gaputin Vladimir* (20) pri tekniko, muziko, skisporto, SU–660075 *Krasnojarsk,* pk. 2420. Esp. Klubo. – *Laptev Vladislav* (20) sama adr. pri fotogr. medicino, E-aĵoj. – Inĝ. *Kerekes Péter* (26) pri sporto, junularo, turismo. R-4000 *St. Gheorghe,* Str. Luceafarului 15, Bl. 60/D ap. 10. – *Lelle Leo* (19) pri fotado, moderna k klasika muziko, interŝ. bk, pm, E-aĵojn. Estonio SU–200 035 *Tallinn* Õismäe tee 112-6. – *Ajse Velijeva* (29) instruistino, Uzbekistano, SU–703 033 *Samarkand* ul. Promišlennaja, Tupik 4. dom. 26. – Inĝ. mek. *Krysztof Sikorski* (33) pĉt, kol. pm, bk, precipe el Hungario. PL–75-347 *Koszalin,* Wladyslawa IV 62/25. – *Gerasevič Sergeo* (20) studento pri mod. muziko, radiotekn, interŝ. diskojn, bk, pm. SU–333 024 *Simferopol* str. 60-let Oktabria 17/65, ap. 76. – *Franstejn Irma* (20) studentino, pri mod. muziko, lingvoj, turismo, belarto, interŝ. bk, pm. SU–335 000 *Sevastopol* str. Lenina 64-18. – *Laimius Stražnickas* (22) ktm, interŝ. bk, diskojn, pm. resp. certa. Litovio SU–234 580 *Alytus,* Topoliu 4-41. – Prof. *Bálint Mihály* (30) pri lit, turismo, sciencaj temoj ktm. R-4000 *St. Gheorghe* Cart. Ciucului 23/C ap. 6. – *Petki Irma* (22) prof-ino, pri literaturo, muziko, turismo ktm. R–4037 *Micfaláu.* – *Nagy Sarolta* (27) oficistino, pri literaturo, turismo, kol. bk. R–4034 *Zálan* nro 9. – *Bartók Piroska* (17) lernantino, pri muziko, scienco, literaturo ktm. R–4000 *Sf. Gheorghe* str. Hârnickel 18, Bl. 34. ap. 7. – Geedzoj *Fjodorov Aleksandro* k *Natali* (25) pri lingvistiko, filozofio, historio, folkloro, E-instruado; kuirarto, infaneduko, junularto, belarto. Interŝ. bk, E-aĵojn. SU–335 045 *Sevastopol,* str. Jerošenko 14-34. – *Jelena Tjutjungi* (21) studentino, SU–703 058 *Samarkand* ul. F. Hodĵajeva 13, kv. 94. Uzbekistano. – *Alisa Minasjan* (21) studentino, SU–703 008 *Samarkand* ul. R. Luksemburg 51. – *Ivan Gjuzelev* (47) oficisto de Nacia Biblioteko, pĉt. ankaŭ france, germane, ruslingve, interŝ. poŝkalendarojn, kol. bk. BG–1408 *Sofio* bul. Petro Todorov 11/A. – *Šulak Aleksandr* (23) pedag. studento de lingvoj, pri muziko, sporto, beletro, kol. bk urba. SU–662 600 *Abakan* Čertigaŝeva 118-250. – *Nikonova Sveta* (17) pri historio, muziko, literaturo. SU–335 007 *Sevastopol* str. Nar. Opolčencev 15. – *Andreeva Nina* (18) kun Pollando, Anglio pĉt. SU–660 075 *Krasnojarsk* str. Lebedeva 31-179. – *Petrov Anatoli* (18) pĉt. kun Bulgario, Hungario. SU–660 075 *Krasnojarsk* av. Krasnojarski raboĉij 69-63. – *Narbekova Ludmila* (19) kun Bulgario, Japanio, pri fotografio, E-aĵoj. SU–660 075 *Krasnojarsk* pk. 2420. – *Jakab Judit* (27) teknikistino, pri turismo, literaturo, muziko ktm. R–4000 *Sf. Gheorghe* str. 16 Februarie 3/A. – *Szász Edit* (25) teknikistino, pri literaturo, pentraĵoj, turismo ktm. R–4000 *Sf. Gheorghe* Ale Luceafarului 1, Bl. 60/F ap. 24. – *Borodin Anatoli* (31) fridujo-maŝinisto, pri radio, tv. fototekniko, muziko, kol. stamp. pm, resp. garantita. SU–323 500 *Pokrovskoe* str. K. Marx 11. Ukraino. – *Damira Inatullajeva* (21) studentino, Uzbekistano SU–703 008 *Samarkand* ul. Frunze 68. – *Lilia Katkova* (25) epidemiologino, pri kulturaj, sciencaj temoj, *Samarkand* ul. Dagbitskaja 24, kv. 7. Uzbekistano SU–703 010. – Prof. *Makai Sándor* (36) div. tem. ktm, R–4000 *Sf. Gheorghe* Cv. Ciucului 14/B ap. 11.

ENHAVTABELO 1979

REDAKTORAJ ENKONDUKOJ

Hungara Vivo komencas... = 1/1
La 11-a de aprilo... = 2/41
Pri unu afero... = 3/81
Ni sentas dilemon... = 4/121
La nuna numero... = 5/161
La frontpaĝa foto... = 6/201

ORIGINALA PROZO

BÁLINT, Sz.: La kaptilo. = 3/114-115
BÁLINT, Sz.: La mistera fraŭlino. = 1/34
BÁLINT, Sz.: La sorto de la bankrabisto. = 5/194
KNICHAL, O.: Militfino. = 5/168
MASON, D.L.: Patro mia. = 3/96-97
MIHALKOV, G.: La vitrino. = 5/197
NEMERE, I.: La frenezulo. = 5/197
TÓTH, E.: Pordoj. = 1/13

TRADUKITA PROZO

BIRÓ, L.: La helo. (Trad. Podani, J.) = 5/171
DOBAI, P.: Elsuĉilo. (Trad. Nagy, I.) = 5/177-179
HILAROVÁ, D.: Budapeŝta romanco. (Trad. Marik, J.) = 5/164-165
JÓZSEF, A.: Redaktora Mesaĝo. (Trad. P.A.R.) = 2/44
KAFFKA, M.: Maja pluvego. (Trad. Mauksinszky, L.) = 3/86-87
LENGYEL, M.: La mirinda mandareno. (Trad. Benczik, V.) = 2/48-51
NAGY, L.: Absurda biontologio. (Trad. Takács, I.) = 6/208-209

ORIGINALA POEZIO

BALBIN, J.: Dink Coca Cola. = 3/111
BALBIN, J.: Mauthausen. = 2/58
BESSENYEI, T.: Kvar elementoj. = 3/94
COLOMBINI, A.: La ruĝo. = 3/111
DE KOCK, E.: Dankon al du. = 4/155
DE KOCK, E.: Haladzo el Kamboĝo. = 3/85
DE' GIORGI, A.: Pretertempe. = 3/111
FRANCIS, J.J.: Tempa rotoro. = 3/111
GABRIELLI, L.: Panjo. = 3/111
JEVSEJEVA, L.: Ĉiu dormas. = 4/131
: Danĝeraj bestoj. = 4/131
: Malsukcesa semajno. = 4/131
: Nur lukto! = 4/131
: Strigo sur mia librošranko. = 4/131
LONG, K.: Post vespero de hungara poezio. = 5/175
MIYAMOTO, M.: Al Kim Jiha. = 5/198
TÓFALVI, É.: Omaĝe al Blaise Cendrars 1913. = 4/129

TRADUKITA POEZIO

BEEKMAN, V.: Lumo de Orienta Eŭropo. (Trad.: Dresen,H; Ojalo, J.; Sama, H.) = 1/18
BLOK, A.: Dek du. (Trad. Nekrasov, N.; Tornado, B.) = 4/144-145, 5/192-193
CATULLUS: Ni vivu kaj nin amu... (Trad. Kalocsay, K.) = 5/166
DRAĈ, I.: Balado de malfermitaj infanaj okuloj. (Trad. Andrianova, N.) = 2/77
EMINESCU, M.: Sola sopir' de l' sin'. (Trad. Kalocsay, K.) = 3/110
: Deziron havas mi. (Trad. Petrin, J.) = 3/110
HIKMET, N.: La nuboj ne mortigu homon. (Trad. Hjusejinov, N.) = 3/87
JEVTUSENKO, J.: Ravado. (Trad. Rados, P.A.) = 1/15
JÓZSEF, A.: Ĉe Danubo. (Trad. Kalocsay, K.) = 2/43
: Senespere. (Trad. Fejes, M.) = 2/45
: Sub firmamento ferkolora. (Trad. Fejes, M.) = 2/45
MICKIEWICZ, A.: Ventego. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/167
NGUYEN, T.: Konfeso de kredo. (Trad. Fenyvesi, E.) = 2/64
: Maljusteco. (Trad. Fenyvesi, E.) = 2/64
: Nokte en sampano. (Trad. Fenyvesi, E.) = 3/65
: Reveno al Con Son en sampano. (Trad. Fenyvesi, E.) = 2/64
: Vespero. (Trad. Fenyvesi, E.) = 2/65
PALLADAS: Epigramo. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/166
SHAKESPEARE, W.: Soneto LXXV. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/167
SIMONIDES: Epitafo. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/166
SOFOKLES: Antigona. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/166
SZABÓ, L.: Poliartrito. (Trad. Szabó, I.) = 6/213
TOMONORI: * . (Trad. Kalocsay, K.) = 5/166
VÁCI, M.: De tiam. (Trad. Benczik, V.) = 3/95
VIHAR, B.: Preĝo. (Trad. Benczik, V.) = 6/215
VILLON, F.: Epitafo. (Trad. Kalocsay, K.) = 5/167
VÖRÖSMARTY, M.: La maljuna cigano. (Trad. Kalocsay, K.) = 1/12

RECENZOJ

AVOTO: Gutaro. (Fejes, M.) = 1/38
BENCZIK, V.: Libro de romanoj. (Audl, W.) = 3/117
BOATMAN, D.P.: Kara Diablino. (Benczik, V.) = 1/37
133 tagoj. (Goňstejn, V.) = 2/56
EROŠENKO, V.: Lumo kaj ombro. (Fenyvesi, E.) = 4/157
FUČIK, J.: Riporto skribita en pendumila maŝo. (Knichal,O.) (Knichal, O.) = 4/157
Gvidlibro por supera ekzameno. (Ĝivoje, M.) = 3/117
Hundbazaro. (Waringhien, G.) = 4/156-157
LIIV, J.: Al abelujo ĝi flugas. (Mihalkov, G.) = 6/235
STEVENS, W.: Ferio en realo. (Király, I.) = 3/117
SZATHMÁRI, S.: Kain kaj Abel. (Conterno, C.) = 1/37
TEO, J.: Ĉiu ĉiun. (Benczik, V.) = 3/116

ARTOJ

FEJES, M.: Jubileas Hungara Baroka Triopo. = 6/203
FEJES, M.: Lajos Bíró en vico de niaj „centjaruloj". = 5/170
: Literatura metiejo. (Pri József, A.) = 2/74-75
FENYVESI, E.: Trai, Nguyen (1380–1442.) = 2/64
GERGELY, M.: Attila Kiss. = 3/99
: Ligno-skulptarto en Hungario. = 1/19
: Realo kaj arto. = 2/59
: Talenta fabelistino. = 6/219
: Zoltán Váli. = 5/185
KNICHAL, O.: „Bardo de mia animo." (Pri József, A.) = 2/45
LÁSZLÓ, I.: Gyula Germanus mortis. = 3/84
LÁSZLÓ, I.: Internaciaj konkursoj de dirigentoj en Hungario. = 6/204-205

RADOS, P.A.: Li estus nur 75-jara. (Pri József, A.) = 2/42-43
ŜOMUĤAMEDOV, Ŝ.: Verse pri medicino. (Al la 1000-jara jubileo de Abu Ali ibn Sina.) = 6/234
TODOROV, G.: Muzeo (en Ŝumen). = 1/12

ESPERANTO-MOVADO

ABONYI-NAGY, Á.: La kooperativoj kaj la Internacia Lingvo. = 1/4-5
BENCZIK, V.: Esperantisto el la infero de Pol Pot. = 3/85
GOLDEN, B.: Rabindranath Tagore kaj Esperanto. = 6/209
ĤARKOVSKIJ, A.: Kiu scias dekojn da lingvoj. (Trad. Rados, P.A.) = 2/57-58
MAROSÁN, Gy.: Vastiĝantaj ebloj de la malvastiĝanta mondo. (Trad. Verzár, I.) = 6/214-215
- czik: Por pli efika nacilingva informado. = 6/207
RÁTKAI, Á.: Verda estas nia plago. = 3/88
SZABÓ, I.: Junularo kaj futuro. = 6/217-218
SZABÓ, Ir.: La kooperativo „Interhelpo" ĉe la piedoj de la montaro Tjenŝano. (Trad. Fejes, M.) = 4/142
VARGA-HASZONITS, Zs.: Esperanto antaŭ parlamenta komisiono. = 4/123

ESPERANTA KULTURO

ABONYI-NAGY, Á.: Renkontiĝo kun Ludmilla Jevsejeva. = 4/130-131
Esperantaj libroj en Biblioteko „Gorkij". = 6/205
GÉRGELY, M.: Ĉu vi konas la kvarkon? (Al la portreto de K. Kalocsay.) = 1/14-15
GOLDEN, B.: Memorigo pri pioniraj hungaraj volapukistoj. = 3/89
: Traduttore - traditore. = 1/35
KNICHAL, O.: Konsoli aŭ stimuli? = 6/234-235
KÖKÉNY, L.: Kiel realiĝis la Enciklopedio de Esperanto. = 5/169-170
KÖKÉNY, L.: Paŭlo Varsányi, grafikartisto kaj esperantisto. = 4/128-129
POV, K.: Esperanta literaturo en 1979. = 4/125-127
RADOS, P.A.: „Mi, ribela, Liberon deziras..." Pri la ĉefa trajto de la Esperanta poezio. = 6/224-225

INTERVJUO

... kun Imre Pozsgay. (Sugár, A.) = 1/2-3
... kun profesoro Waringhien. (Benczik, V.) = 4/136-137

HISTORIO

HALÁSZ, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo. (Trad. Varga-Haszonits, Zs.)
13. Kompromiso en 1867. = 1/8-9
14. La unua mondmilito kaj la 1918-19-jara revolucio = 2/52-53
15. La Konsilia Respubliko kaj la kontraŭrevolucio. = 3/90-91
16. La intermilita periodo. La dua mondbrulo. = 4/132-133
17. La socialisma transformiĝo. = 5/172-173
18. Konstruado de la evoluinta socialisma socio. = 6/210-211

DIVERSAJ TEMOJ
Pri Hungario

ACZÉL, Gy.: Por la ordo de la libero. (Trad. P.A.R.) = 4/162-164
BÁLINT, Sz.: Ĉu vi ŝatas hungaran salamon? (Viandprodukto en Hungario.) = 3/82
BENCZIK, V.: Prezoj kaj produktokostoj. = 2/46
FENYVESI, E.: Internaciaj ŝancoj de malgrand-nacia kulturo. (Pri la Libroeldonejo CORVINA). = 4/124-125
: 35 jaroj. = 2/47
KAPITÁNY, L.: Pri la hungara medikamento-industrio. = 6/206-207
: Sekretoj de la porcelano. = 1/6-7
KNICHAL, O.: Sociala turismo per la hungaraj sindikatoj. = 3/84
Laborkongreso de hungaraj komunistoj. = 4/122
LÁSZLÓ, I.: El la gastlibro de Hungario. = 3/83
VERZÁR, I.: Kiel vojaĝi en Hungario? = 6/202

Aliaj temoj

BENCZIK, V.: Rolo de lingvo kaj literaturo en la formiĝo de Orient-Eŭropaj nacioj. = 1/16-17

KONSTANTAJ RUBRIKOJ

FARKAS-TATÁR, É.: Panoramo. = 1/20-21, 2/60-61, 3/100-101, 4/140-141, 5/180-181, 6/220-221
FENYVESI, E.: Revuo de revuoj. = 1/22, 2/63, 3/103, 4/143, 5/183, 6/223
Gaja paĝo. = 1/36, 2/76, 3/113, 4/153, 5/195, 6/236
Korespondi deziras. = 1/33, 2/80, 6/240
Krucenigmo. 1/39, 2/79
LÁSZLÓ, F.: Budapeŝto, urbo de banejoj. (Trad. Fenyvesi, E.) = 1/26-31, 2/66-71, 3/104-109, 4/146-151, 5/186-191, 6/226-231
Leterkesto. = 1/40, 2/80, 3/120, 4/160, 5/200, 6/240
MIHALKOV, G.: Ekzameno sen risko. = 1/39, 2/79, 5/200, 6/236
Paĝo de komencantoj.
Amuzaj dialogoj en Esperanto. (Lienhardt, A.) = 1/25
Nanaja fabelo. = 2/77
Mihalkov, G.: Infana pilko. = 3/115
Bálint, Sz.: La hundo. = 4/156
László, I.: Letero al mia amiko. = 5/199
TORDA, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo. (Trad. Rados, P.A.)
5. Literaturo dum la reform-epoko. = 1/10-11
6. Du popolaj poetoj. = 2/54-55
7. „Nacia klasikismo" kaj la jarcentfino. = 3/92-93
8. La literatura revolucio. = 4/134-135
9. La Granduloj de „Nyugat". = 5/174-175
10. Aliaj verkistoj de „Nyugat". = 6/212-213

E HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** Respondeca redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Tatár-Farkas.** Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. + Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** + Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtocifejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA, P.O.B. 149, H–1389, Budapest Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro. + **Indexszám: 05 377 ISSN 0018–7704**

BONAJO
EL HUNGARIO

HUNGAVIS



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

BÁV